N° 1
oktobro 1929

643
1.10.1979

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la Geesperantistoj de la Kortrejka regiono

APEROS LAŬ BEZONO KAJ TIOM LONGE OL LA KASISTO HAVOS MONON. - TAMEN NI KLOPODOS APERIGI ĜIN PLI REGULE OL BELGA ESPERANTISTO.

Esperanto-Fondaĵo C. Fambiervliet - Urba Publika Biblioteko - Kortrijk

---

Jaŭdon, 3Ian de Oktobro venonte, la Esperantista Grupo, Kortrejk, organizos ĝian trian publikan kurson. Denove la urbestraro disponigis al ni ĉambregon en la urbdomo. Ni ne dubas, ke, kiel la antaŭaj jaroj, ĉiu membro alportos kelkajn lernantojn. La lastaj disponoj estos aranĝataj dum la semajna kunveno de la 30.IO.29. Cies helpon estas bezonata, do ĉeestu multnombre !

-------------------------

Ĉi-tiun monaton foriris pluraj fidelaj samideanoj al la universitato. Ni deziras al ili plej bonan sanĉon en iliaj studoj, kaj ke ili profitu la okazon por vigle propagandi en iliaj rondoj. Post kelkaj jaroj ni esperas revidi inter ni areton da eminentuloj..... advokaĉoj, doktoroj, apotekistoj; tiam komencos por ni novaj tempoj de prospero... Ni paciencu ĝis tiam !

-------------------------

La verko de Remarque "En okcidento nenio nova" la plej multe aĉetita libro pri la mondmilito, aperos tradukite, en Decembro 1929. Ĝi kostos broŝurita 5 RM kaj bindita 7 RM. Se kelkaj personoj deziras aĉeti ĝin, ni mendus ĝin kune; tiel rabato estos verŝajne havebla.

-------------------------

Een dringende oproep wordt gericht tot al onze vrienden om leerlingen aan te werven voor den leergang die begint Donderdag 3I.IO.29. Zelfs deze die de lessen niet meer noodig hebben moeten tegenwoordig zijn. Waar veel volk is wil veel volk zijn; dit hebben wij vroeger ondervonden en dit zal nu ook nog wel van toepassing zijn.

Woensdag avond 30.IO.29 zullen wij in het lokaal "De Tuin" de laatste schikkingen treffen. Tracht veeltallig aanwezig te zijn.

-------------------------

En "Heroldo de Esperanto" estas menciita pri juna hindo, instruisto ĉe la lernejo de Tagore apud Kalkutta, kiu venis al Svedujo por studi la manlaboron en la lernejoj kaj la Svedan literaturon.

Hasarde li ekvidis anonceton pri Esperanto, tuj rapidis por trovi instruiston de nia lingvo. Post ses-semajna studado li venis por esti ekzamenata de la sveda ekzamena komisiono kaj li obtenis la plej bela atesto, kun honoro aprobita.

Tiu ĉarma junulo, ĝojega pro akiro de nia mirinda bona lingvo, kiu permesas al li tute libere komuniki al la svedojn niajn pensojn kaj sentojn, vestita en la pure blanka kostumo de sia lando, nun travojaĝas Svedujon parolante en diversaj asocioj.

Ĉie por li, en ĉiuj rondoj, la plej granda intereso. Oni miras ke li parolas Esperanton kvankam ano de l'brita imperio. Gazetistoj vetkuras por intervjui lin. Longaj artikoloj kun bildo lia en nacia kostumo. Grandioza propagando kaj tute ne artefarita.

Kia mi havos tian propagandiston en Kortrijk? ni esperu !

-------------------------

+++++La ĉeĥoslovaka filmaktorino Anny Ondra, kiu lastatempe kreis lolon en parolanta filmo, lernas Esperanton.

+++++La konsilantaro de la Franca Komerca Ĉambro en Londono decidis, ke de nun aperos en la Bulteno de la Ĉambro artikolon en Esperanto pri komerca aŭ industria aktuala temo.

+++++En Hispanujo la Inspektorestro de Unua Instruado de la provinco de Madrido permesis kurson por geinstruistoj, kaj la Ministerio por Maraj Aferoj kurson en la Lernejo de la Martera Kreditkaso de Gijon.

+++-++La gazeto "Monde" en Parizo, publikigas regulan kronikon pri Esperanto kaj esperantajn tekstojn, rilate al la laborista movado.

+++++En Anglujo funkcias multaj kursoj de Esperanto kun ŝtata subteno. En Londono la salajroj de instruistoj pri Esperanto ne diferencas de tiu je instruisto de iu alia lingvo. Ili estas pagataj de la urba konsilantaro.

+++++La paradizo de la ĉapelistoj.- La 1an de septembro, en Usono, ĉiuj stratoj estas kovritaj per pajloĉapeloj. Estas kutimo. La Usonanoj, ja, ne metas zorge sian pajloĉapelon en keston, atendante la novan sezonon, ili ĵetas ĝin sur la straton. Kaj estas stranga vidaĵo tiu amaso da ĉapeloj kun diverskoloraj rubandoj. Vere Usono estas paradizo por la ĉapelistoj.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.
Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso :
Markesteenweg, 18, Kortrijk

- N° 2 -
Novembro
1929

GENERALA MONATA KUNVENO
DE LA KORTREJKA GRUPO ESPERANTISTA OKAZOS EN LA TAVERNO "De Tuin" IJZERWEGLAAN, MERKREDON, 4an DE DECEMBRO, JE LA 8a VESPERE.

Woensdag, 4 December aanstaande, te 8u. 's avonds, maandelijksche vergadering van den Esperanto groep, in "De tuin", Yzerweglaan. - Niemand ontbreke.

---

La malfermo de niaj novaj kursoj en la Urbdomo, kvankam ne havante la ampleksan sukceson de la du antaŭaj jaroj, tamen estas ege kontentiga; ni povas kalkuli almenaŭ 50 novajn gelernantojn. Se ni ne pli havas la amasegon da ĉeestantoj tamen ŝajnas ke proporcie la finaj rezultatoj estos pli bonaj ol antaŭe. Efektive post 5 lecionoj ni konstatas nur tre eta kvanto da forrestintoj.

Okaze de tiu kurso ni demandas al niaj gemembroj ke ili propagandu persone kiel eble plej multe ĉe iliaj konatuloj kiuj sekvas la kursojn, por ke ili aliĝu la grupon.

Kompare kun la estinteco, nia grupanaro suferas pro anemio kaj ege necesas kompleti niajn rangojn. Ni devas celi al pli da palpeblaj rezultatoj, ankaŭ pli grandan nombron da lertaj esperantistoj ni bezonas. Nia grupo devus jam esti pli forta kaj ampleksa kompare al la faritaj klopodoj. La nuna apatia stato certe ne povas daŭri sen danĝero. Vere multege da simpatiantoj ni gajnis, sed fakto estas ke ili ne antaŭenpuŝas nian movadon. Certe ne ĉiuj povas sin senti apostoloj, sed tamen al neniu estas maleble iom propagandi en sia ĉirkaŭaĵo.

Forskuu la indiferencon, kaj de nun konsideru kiel devo helpi al revigligo de nia grupo. Rekonduku al ni la forrestintoj !

---

Ricevitaj korespondaĵoj dum la monato:
a) Medecina Revuo;
b) Invito de la "Verda Stelo" el Antverpo, por ĝia ĉiujara festeno, Sabaton, 25.I.1930;
c) Invito de la "Flandrema Grupo Esperantista" por kunveno en Antverpeno la I.12.1929.
Ĝi proponos organizon de kongreso dum Pentekosto de proksima jaro.

---

+++++FILMO "PAROLANTA". Antaŭ nelonge, ĉe la Instituto de Surdmutuloj en Parizo, oni donis kinematografan prezentadon al la junaj pensionuloj. En la momento, kiam estis prezentata la sceno la plej kortuŝa de la filmo, subite ekridegis la surdmutuloj. Oni petis klarigon. Ĝi estis jena: la aktoro, kies ludo tiam estis drama, sidiĝante sur apogseĝon, ne povis sin deteni de ekkrio: "Ho, mi ĵus estis pikita ĉe la... postaĵo!" Kaj la surdmutuloj, kiuj legis la vortojn sur liaj lipoj, ne povis sin deteni de rido.

+++++S-ino Ensom, kiu post nelonge mortis en Christchurch (Nova-Zelando) postlasis sumon da 75.000 frankoj al la "Worker's Educational Association" por organizo de esperantaj kursoj.
La Domo de Esperanto el Parizo ricevis de malavara anonimulo donacon de 50.000 francaj frankoj.
Bedaŭrinde ke ankoraŭ nenion simila okazis al nia grupo.

+++++Laŭ ricevita informo samideano-soldato, Raoul Vanfleteren, estas proponita kiel korporalo.
Sincerajn gratulojn. Lia amiko Noël ploris pro ĝojo.....

+++++Oni flustras ke baldaŭ la Kortrejka grupo nombros ĝian unuan intergesamideanan edzecan feston. Nedubeblaj antaŭsignoj tion profetas. Ni ŝparu jam de nun por deĉe festi tian okazintaĵon !

+++++Por la grupflago estas jam kolektita 133,42 fr. Kiuj helpos per malavaraj donacoj ?

+++++Nove fondita eldonejo "Le Verda Velo" en Antverpeno, ĵus eldonis "La du amatinoj" kaj "La Kapricoj de Mariano" de Alfred de Musset. Prezo 10 frankojn. Estas alloga libro bele eldonita. Ne preterlasu la okazon pliriĉigi vian bibliotekon per tiu valora libro.
Estas anoncitaj tradukoj de diversaj verkoj de Timmermans.

+++++LA GAJNINTO. La profesoro.-Delponto ne estas en la klaso. Ĉu iu scias, kie li estas?
Unu lernanto.-Jes, Sinjoro, li estas ĉe la hospitalo.
La profesoro.-Ĉe la hospitalo! Nu, kio do okazis al li ?
La lernanto. -Ni organizis konkurson: oni devis sin klini plej malproksimen de la fenestro, kaj estas li, kiu gajnis.

+++++Oni ĵus festis Edison pro la kvindekjara datreveno de la eltrovo de la "inkandeska lampo"
Pri la fama usona inventisto ni rakontu la jenan anekdoton :
Amiko venas por viziti Edison.
-Kara Tomaso, li diras, vi tro malzorgas pri la malgrandaj detaloj. Via enirpordo malfacile malfermiĝas. Mi devis puŝi per mia tuta forto. Ŝmiru do ĝiajn hokojn. -Tute ne, respondis Edison.
-Kial ? -Ĉiufoje, kiam iu vizitas min, supreniras en la akvujon de la ĝardeno de kvindek ĝis cent litroj da akvo, laŭ tio se oni puŝas la pordon kun pli aŭ malpli da forto.

NE FORGESU LA MONATA KUNVENO - NE FORGESU VARBI NOVAJN MEMBROJN !

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :

**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N° 3

Decembro

1929




La Estraro de la Kortrejka Esperantista Grupo salutas elkore siajn gemembrojn kaj sendas al ili siajn plej bonajn dezirojn por la nova jaro .

---

Nia venonta ĝenerala kunveno okazos merkredon 8.I.1930 en la kafejo "De Tuin".-je la 8a vespere.

La grupestraro devas esti parte renovigata.

Ĝi konsistas nun el: S-oj Mattelaer,Debrouwere, Vanbiervliet,S-ino Byltjauw, S-oj Steelant, Mandeville, Casier, R.Bossuyt, Vanfleteren, Genin kaj Heffinck.

-BELANGRIJK -

Woensdag,8-I-1930,te 8u.'s avonds, algemeene vergadering in "De Tuin" IJzerweglaan.-

Dagorde :

Gedeeltelijke vernieuwing van het Bestuur.-

Art.9 de la Fundamenta Regularo mencias ka "la estraro renoviĝas po unu duono ĉiujare.

~~xxxxxx~~ La 6 unuaj estis elektitaj la I8an de julio 1928 kaj la 5 lastaj la 9an de januaro 1929.

La unuaj devas do esti anstataŭataj aŭ reelektitaj.

---

La ĝenerala kunveno de la 4a decembro estis iom malhelpata pro gravega malsano de la estrino de nia ejo kaj ne estis eble havi nian kutiman interparoladon.

Kiam ĉiuj niaj kutimaj kaj fidelaj amikoj estis alvenintaj,la tuta grupo migradis al la domo de Samideanino R.Casier, kie ni pasigis plej agrable la reston de la vespero.

Inter alie estis proponite festi tie la duan datrevenon de la fondiĝo de la grupo. Tiu memoraĵo koincidas kun la nova jaro kaj allogos do duoble aj ĝojigo !

Ium posta kunveno finaj aranĝoj estis faritaj kaj nia festtago fiksita je la 3I-I2-29, vespere.....

Certe neniu miros se ni diras ke pluraj kiuj ordinare ne trovas tempon por veni al la kunvenoj aŭ kurson, tiam ne forrestis.

Kiel en ĉiu bonfama rondo ni komencis per demokrata sed tre bongusta manĝeto.

Nia mallongmemora samideano-bakisto Bossuyt preskaŭ kondamnis nin al malsato sed telefona admono lin tuj rekondukis al pli ĝentilaj sentoj.

Kion diri pri la direktoro de nia fest-sekcio Juliano Reynaert? Vere li estis la animo de ĉio,kaj sia barbo lin aspektigis kiel impona eminentulo. Pro ŝia bona ideo vendi surprizon li meritas almenaŭ dekoracion kaj tiucele estos farita propono al la Centra Komitato de la Esperanto Movado.

La surprizongajnis S-ro Olivier D'Hont kiu plej ofereme ĝin donis por nova vendo !

La tombolo favoris al S-ino Bassleer kiu malŝparare partigis sian premion kun la ĉeestantaj fraŭlinoj.

La plej bona flanko de la loterio estis ke ĝi raportis I90 da frankoj por la flago. Vendo de kantoj same raportis 7,80 fr. Ni esperu ke ankoraŭ multfoje ŝiajn festojn okazu je la sano de nia kaso !

Ankaŭ nia amiko Petro meritas plene niajn laŭdojn. Senlace, ĝis matene, li "tirsakis" je plej granda ĝojo de la juna popolo. Li,kiu tro multe humile diris ke li estis nur modesta amatoro, tiris el sia instrumento tiom da agrablaj kaj sorĉaj tonoj ke niaj gedancemuloj kvazaŭ ŝvebis kaj ne sentante lacecon forgesis ke horloĝo ekzistas.

Nun,ke estas spertita ke kunlaboro de ĉiuj povas igi la kunvenojn plej agrablaj,ni esperu ke venonte ni havos iom pli multe dum la kunvenoj ol ĉiam oficiala parolado seka. Ke ĉiu bonvolulo helpu, la ĉielo lin rekompencos !

---

Se kelkfoje vi legas erarojn,ne atentu multe pri tio. Estas la kulpo de nia presisto kiu ne ankoraŭ sufiĉe bone scias nian lingvon. Li tamen promesis seriozan studon.- Pripensu la proverbon: Sur la Tero nenio estas perfekta.....

---

Estas kutimo ke okaze de la novjaro oni forsendas multe da poŝtkartoj. Ĉu iu sin jam rememoris ke ni havas ankoraŭ stokon de 4.000 da bele presitaj kartoj ? Se ne estas ankoraŭ tempon por fari mendon. Tamen rapidu, por ke vi ne malfruiĝu se la vendo devus esti tro granda......

NE FORGESU KE VI DEVAS ĈEESTI NIAN KUNVENON, MERKREDON 8an de JANUARO 1930 !

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N° 4
Januaro
1930


Diversaj skribaĵoj kaj invitoj rilate al la Esp.kongresoj kiuj okazos sammomente en Antverpeno kaj Liège, instigis pritrakti nun unue iom ĝenantan historion.
De nia grupa-kroniko, kvankam ĝi pli multe interesas la gemembrojn, estu lokita en malpli honora vico (!)

De kelke da tempo, precipe okaze de ĝeneralaj kunvenoj, estis ofte kaj ripete kritikitaj la agoj de la oficiala esperantista centro en Antverpeno, kiu ĉu konscie ĉu nekonscie mortigas la enlandan movadon.
Necesus ekzameni aparte la respondecon de la Belga Esp.ligo kaj tiun de la Belga Esp. Instituto sed ŝajne tiuj du organizoj tiom kunfandiĝis ke al profanulo ne pli estas eble dispartigi la respondecon.
Je starigo de la Kortrejk-a grupo en 1928 ni kontaktis kun (laŭ nia opinio) bone gvidata centra oficejo. Plej afable ni ricevis ĉiujn demanditajn helpojn por fruktedonanta propagando kaj reciproke entusiasme servemaj, ni kvitancis per varbado de novaj liganoj.
La feliĉo tamen ne longe daŭris. La prepara laboro por la internacia kongreso malhelpis la ligan laboron. "Belga Esperantisto" okupita por tedaj listoj de kongresanoj, malaperis tuj kiam ĉiuj listoj aperis. Estis la momento kiam ni komencis varbadon de novaj membroj okaze de la 2a esp.kurso, gvidata de S-ro Groverman en la urbdomo. Pagintaj abonantoj ne ricevis bultenon; la grupgvidantoj sendis plendon post plendo, sed vane. La kongreso laboro estis tiom granda ke eĉ ne estis eble respondeton kaj inter la amasego de Antverpenaj Esperantistoj verŝajne ne trovis eĉ unu samideano kiu konsentis iom kunlabori. Tiu neakceptebla silento ege malhelpis nian lokan movadon kaj ĉe multaj tute senkreditigis la Belga ligo. Unu jaro post la kongreso tiu malĝojiga stato ne jam likvidiĝis. Oni kulpigis la presiston pri neregula apero de la bulteno; tamen intertempe estis sukcese eldonita novan revuon "Flandra Esperantisto" !
Same la aferoj de "Belga Esp.Instituto" fuŝiĝis. Mendo de poŝtkartoj ilustritaj tiom prokrastis ke intertempe la prezoj altiĝis. Liverado ankaŭ tiom longe daŭris kaj estis plenumita nur post la kurso, kiam amasa vendo ne pli estis ebla.
Okaze de publika kurso, lernolibroj menditaj ekspresletere ne alvenis. Pluraj tagoj post nova demando per telegramo, ili estas sendataj sen ia ajn vorto da klarigo... Ne estis koncerton da laŭdoj ke oni aŭdis tiuokaze... Ni tamen estis bonaj klientoj de la Instituto.
Sekve al tio ĉio, nia plej bona respondo estos ke ni restu kiom eble plej pasivaj kontraŭe al la Ligo kaj la Instituto. Tia indiferenco havis ankaŭ iom neatenditan rezulton.
Multajn vortarojn ni jam vendis kaj ankaŭ vendus. Ni traktis kun loka librejo por ke ĝi venigu "Schidlof's" vortarojn el Holando. Ili ne estis haveblaj ĉe la eldonisto pro la fakto ke la "Instituto" havis solvendrajton. Kvankam tio, la vortaroj alvenis en Kortrejk-on kie ili estas publike vendataj 18,15frankojn. Ĉe la "Instituto" la prezo estas 20 frankojn. Grupoj ricevas rabaton de 10% sed devas pagi la sendkostojn. El tio sekvas ke niaj Antverpenaj amikaj aldonas unue 10% por poste per grandanima gesto redoni tiun procentegon.....
Provo estis ankaŭ farita per aĉeto de la libro "Vila Mano". La Instituto ĝin vendas 55 fr. En Kortrijk ĝi estas havebla por 47,50 fr.
Nu, iu kredis ke estas permesata skribi pri tio al la Instituto, sed serene estis demandita ĉu oni donis al si ideon pri la oferoj de kelkaj, por ke tiuj libroj estu aĉeteblaj? - Ĉu la oferoj estas pli grandaj ol tiuj de privata vendejo? Ĝi verŝajne ankaŭ ne vendas sen gajnon.
Verŝajne kelkiuj opinios ke oni tro multe grumblas por kelkaj postmilitaj frankoj. Tamen oni ne forgesu ke ni staras ankoraŭ tro malfortaj por forlasi la idealistan terenon kaj konsideri esperantismon kiel komerca varo.
Tiuj konsideroj profunde senkuraĝigas tiuj kiu celante nek profiton nek famon, senlace laboras por la Zamenhofa idealo.
Ĉiuj Esperantistoj certe sincere bedaŭros la sengloran disfalon de la Ligo. Ni suficis ke ĝi jam tiom malfortiĝis; senkonscie la ligestraro metis la kronon sur ĉio per la malllerta aranĝo de la oficiala akcepto de la urbestro de Gento. Ne necesis organizi kongreson en Flandrujo se ĉio okazas franclingve. Kiam la urbestro rifuzis paroli frandralingve kial ne rezigni je sian ĉeeston ?
La "Flandra Ligo" decidis organizi propran kongreson en Antverpeno. Sed kial ĝi elektis por tio Pentekosto? Ĉie estis konata ke la Belga ligo kongresos la samajn tagojn. Ĉu oni jam pripensis ke unu el la du aŭ eble ambaŭ malsukcesos pro tio ?
La Liegaj samideanoj ne kulpas pri la liga eraroj; estas do ne multe maliĉa malhelpi ilian laboron.

Jam pli frue estis priparolata eventuala organizo de la venonta kongreso, sed la nunaj okazintaĵoj tute malebligas tion. Tiom longe el unueco ne plu regos,ni rezignos.

Same pri abono al iu Belgeno. Ĉiu membro restos libera ĉu aboni ĉu neaboni unu el la du naciaj presaĵoj. Intertempe ni daŭrigos la eldonon de nia propra "Informilo" kiu provizore estas la oficiala ligilo inter niaj gemembroj.

La estonteco decidos pri nia venonta agmaniero.

(Hundo al leterportisto).

---

Post la supra enuiga rakonto al kiu daŭrigon ne estas dezirata, ni ne povas forgesi la lokajn okazintaĵojn de la monato.

La 8an de januaro la grupanoj kunvenis en "De Tuin" por renovigi la estraron.

Ĉiujne la eksiĝintaj estraranoj kontentigis ĉiujn, ĉar post sekreta baloto ili estis reelektitaj, krom S-ro G.Mandeville kiu forrestas el la urbo.

La estraro konsistas nun el:

S-oj Matteleer,prezidanto; Debrouwere,vicprezidanto; Vanbiervliet kasisto; S-ino E. Byltjauw; S-oj Steelant, Casier, Bossuyt R.,Vanfleteren, Genin, Heffinck & Misschaert.

Do antaŭen kun nova kuraĝo,por la plej granda profito de la movado.

---

++++++Jaŭdon,18an,la estraro kunvenis en kafejo "Het Zweerd" por priparoli demandon pri subteno. Estas demandata al la urbestraro 1000 frankojn da subvencio por la publika kurso. Ni esperu je bonan resultaton.

Samtempe estis decidita renovigon de la abonoj al "Heroldo de Esperanto" kaj al "La Movado".

------En la lasta monata kunveno S-ro Casier proponis altigon de la kotizo. Pro diversaj kialoj estas preferinde ne fari tion nuntempe.

Tamen ni malfermis liston por libervolaj donacoj je profito de la kaso.

La unua enskribo ne jam ricevis, ke multe sekvu !

- SUBTENU LA KASON -

Por ke ĉiuj pagu regule sian kotizon........................................... 1.oo fr.

------Dum la pasinta jaro estis ricevita kiel kotizoj 364.-- frankojn.

------La enkaso por la flaĝo jam sumiĝas je 298,22 frankojn.

------Skriba kurso organizita de la Nimega Propaganda-komitato (Nederlando) nombras 4.700 partoprenantojn. Inter ili troviĝas ĉirkaŭ 1.500 lernejestroj kaj geinstruistoj.

------Laŭ lasta statistika Esperanto estas instruata en pli ol 300 popollernejoj en Germanujo.

------S-ro Benoit, hôtelestro en Oostduinkerke, plej efike propagandas en "L'Avenir d'Oostduinkerke" . La pasintan jaron la "Brita esp.Asocio" aranĝis tie internacian esperantistan semajnon kiu tre bone sukcesis. Ĝi denove okazos je komenco de julio. Eble ke tiam estos eble ekskurson al Oostduinkerke.

========================

Woensdag, 4 Februari 1930, te 8 uur 's avonds,

algemeene vergadering in "De Tuin" - IJzerweglaan.

D A G O R D E :

Bijwoning van het aanstaande kongres.

Ten zeerste wordt aangedrongen op eene talrijke opkomst. Verscheidene leden zijn ook ten achter met de betaling hunner bijdrage.- Mogen we beleefd vragen om vereffening ?

Door het zenden van ons bulletijn worden de leden die verhinderd zijn regelmatig de vergaderingen bij te wonen, ingelicht over het gebeurde. Het is dus eene nieuwe uitgave die onze magere inkomsten aantast.

De opbrengst der bijdragen voor verleden jaar beloopt tot 364 fr. Het is zeker niet noodig u te verklaren dat we daarmee geen bergen kunnen verzetten. Zonder de opoffering van enkelen waren we reeds lang failliet. Wees dus ook ons steunfonds indachtig.

Ĉi kune troviĝas ekzempleron de propaganda marko por la flandra kongreso de Esperanto en Antverpeno. Ĝi estas havebla ĉe la Flandra esp.Instituto.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N° 5

Februaro

1930


Ĉi sube estas montrata nian bilancon por la jaro 1929.- Multaj verŝajne ne sciis ke ĝi estas tiel grava.- Vi konstatos ke ĝia ŝtato estas sufiĉe sana. Tion ni dankas al la monsubteno ke la urbkonsilantaro voĉdonis en 1928. Por la jaro 1929 ni esperas pli altan subtenon, kiu ebligos grandskalan propagandon kaj eble partopreno al la venonta loka komerca foiro.

| ENSPEZOJ : | | ELSPEZOJ : | |
|---|---|---|---|
| Saldo de la jaro 1928 | 605.10 | Diversajn elspezojn, Pm. | 177.80 |
| Grupa kotizo | 494.00 | Afiŝoj, presadoj, administrado | 200.50 |
| Kolektadoj kaj donacoj | 216.25 | Abono gazetoj | 127.70 |
| Vendado de diversaĵoj | 406.20 | Libroj, muzikaĵoj, lernolibroj | 616.45 |
| | | Vojaĝkostoj profesoro Grosverman | 230.00 |
| | | Aranĝo kursejo | 75.00 |
| Sume | 1.721.55 | Floroj por blinda j esperantisto j | 42.00 |
| | | Sume | 1.471.45 |

Restas saldo 250.10 fr.

Ĉiuj membroj jam pagis por la tuta jaro. Jen tre imitinda ekzemplo; sed tute ne imitinda ekzemplo: pluraj jam nenion pagis por 1930 kaj eĉ ŝuldas kotizojn por 1929 ! Pagu tuj por ke ni ne estus devigataj publiki nigran liston !

-------------------------

POR LA PROPAGANDA KASO : Antaŭa listo 1.-; Steelant Oscar 1: Casier Pierre 12, Boudens Cécile 2, Casier Rachel 3, Dercleder Marc (bakisto) 4. Delbare Albert 8, GI.monato 1. Entute : 32 frankojn.

-------------------------

POR LA FLAGO : Antaŭaj listoj: 298.22 fr; Bossuyt Roger 1.-; Demey Urbain 1.-; Vanroye Henri 1.20. - Entute: 301.42 frankojn.

-------------------------

La 13an de Februaro okazis la lasta leciono de la kursoj organizitaj en la urbdomo. Dankaze la gelernantoj kaj la grupanoj oferis al la kursgvidantoj S-roj Génin kaj Debrouwere tre belan artan argilaĵon. Tiel finis denove en "sankta harmonio" la 3a kurso organizita de la loka esperantista grupo. Ke multaj ankoraŭ sekvu je plej granda bono de la movado !

> Merkredo, 5an de Marto 1930, je la 8a vespere, ĝenerala monata kunveno en kafejo "DE TUIN"
>
> Tagordo :
>
> 1-Kunveno de la Belga ligo en Bruselo la 23.3.30.
>
> 2-Speciala grupkunveno kie ĉeestus delegito de la Belga Ligo.
>
> 3-Abonoj al Belga Esperantisto.

+++++La 19 de februaro 1930 mortis, post longa malsano, la estrino de nia kunvenejo. La Esperantista grupo prezentas al la familianoj ĝian partoprenon en la funebro.

+++++La Greka ministro de publika instruado, denove sendis cirkuleron al la Inspektoroj de Publikaj Lernejoj, permesante instruon de Esperanto en mezgradaj lernejoj.




La fakto, ke la ministro dum pluraj jaroj ripetis dekreton por nia lingvo, montras ke en Greklando la oficialaj rondoj konscias pri la valoro de nia lingvo.

+++++En "Virina Paĝo" de tre serioza esperantista revuo, estis legebla jenan frazon:

"Oni ne surmetas la ĉapelon sur la kapon, oni enmetas la kapon en la ĉapelon: diferenco tre grava, kiu povas igi ridinda la plej beletan virinon kaj la plej nunmodan ĉapelon". - Ĉiu viro certe konsentos ke tio vere estas tre tre grava.....ke nia ina memoraro profitu el tiu diro.

+++++La komerca foiro de Lyon denove eldonis belan afiŝon kaj diversaj esperantaj propagandiloj. La grupo ricevis ekzempleroj kiu certe multe taŭgos por nia propagando.

Same eldonis glumarkojn la Komitato por ekspozicio de higieno en Dresden, kaj ankaŭ belaj faldprospektojn. Ni esperu ke tiu propagando helpos multe por la sukceso de la ekspozicio.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso : Markesteenweg, 18, Kortrijk

N° 6 Marto 1930


Merkredo, 2an de Aprilo 1930, je la 8a vespere, ĝenerala kunveno en "De Tuin"

TAGORDO :

1. Komuniko de letero de la "Belga Esperantista Instituto"
2. Vizito de Polaj Esperantistoj.

Pro la graveco de la punkto I. ni demandas la ĉeeston de ĉiuj niaj gemembroj.

---

Dimanĉo, 6an de Aprilo 1930, je la 10 1/2 okazos eksterordinara kunveno en nia ejo "De Tuin", kie parolados S-ro Frans Schoofs el Antverpeno. Temo: "Ŝpertoj de malnova Esperantisto". - Ni esperas je sufiĉe multnombra ĉeesto de nia anaro

---

La 5an de marto okazis la kutima monata kunveno en "De Tuin". -Post kelkaj komunikoj, okazis vigla diskuto pri nia sintenado rilate al la Belga ligo. Kompleta interkonsento inter la diversaj vidpunktoj oni ne atingis. Tial estas preferinde ke la grupo restu provizore kiel eble plej pasiva koncerne ambaŭ enlandaj ligoj, ĉiu membro restante izole libera ĉu aliĝi aŭ ne la Belgan aŭ la Flandran ligon. Nia ŝipeto restos do balancante inter la bordoj de la Skeldo, ĝis la situacio fariĝos pli serena.

Al la Belga Ligo estos komunikata la deziresprimon ke je oficialaj akceptoj okaze de kongresoj la lingvo estu Flandra en Flandrujo kaj France en Valonujo.

---

Dum kunsido de Lundo, 10an de marto 1930, la urbkonsilantaro voĉdonis 1.000 frankojn da subteno por niaj vintraj kursoj. Estos do eble propagandi grandskale por la venontaj kursoj, ne estante devigataj ĉiam serĉi el kiu angulo de la ĉielo falus la manaon kiu devas nutri nian kason.

Multaj Esp. societoj certe envios la malavaran donacon, kiun ni esperas ricevi ankoraŭ multajn fojojn!

---

+++++La 1an de ĉi-tiu monato geedziĝis gesamideanoj Gerard Heffinck kaj Maria Callemeyn. La Esp. Grupo prezentas al ili ĝiajn elkorajn bondezirojn kaj esperas ke neniam ili forgesos ke dank' al Esperanto ili trovis la plej grandan feliĉon sur la tero!

Ke iliaj "Blankpan' semajnoj" ne fortenu ilin de niaj merkredajn renkontiĝojn !

+++++Rekompence por siaj bonegaj servoj al la Patrujo, al nia amiko Louis Génin estis proponita la gradon de Generalo de la Belga Armeo. Pro sia konata modesteco li obstine rifuzis tiun honoron.

Tamen, konsiderante ke tio ankaŭ honorigus la Esp. Grupon, li akceptis du pliajn sardinojn sur la maniko, kaj tiel fariĝis "la Pit".

Post aŭdo de tiu bona novaĵo, Sinjorino Génin tuj kreskis je unu metro, pro ĝojo!

Al la du fidelaj gemembroj, la esperantista grupo prezentas la esprimon de ĝiaj plej bonaj sentoj.

N.B.-La kasisto insiste petas la supre cititaj gesamideanoj nepre ĉeestu la kunvenon. Li ege deziras renkonti ilin por urĝa komuniko.

---

En "Heroldo de Esperanto" troviĝis ĉi-suban artikolon, ke ni represas ĉar ankaŭ al ni ĝi ŝajnas tre ĝusta:

LA "MORTA PUNKTO" EN KURSOJ.- En Heroldo oni denove legas plendojn pri malbonaj rezultoj en kursoj. Vere, tio estas malesperiga fakto, ĉiu peno kaj ĉiu admono pri persisto restas vanaj; en mia kurso eĉ okazis, ke lernantoj vizitantaj la trian lecionon rigardis ĉirkaŭen kun timesprimo, ĉar ili ne ĉeestis la duan lecionon kaj teruriĝis pri tio, ke iliaj kolegoj jam reagis al ŝercoj kaj respondis mallongajn frazojn per jam konataj vortoj. Helpis nenio, ili forrestis, kvankam ni ripetadis ĉion lernintan.

Do, kiel fari? Se la instruanto prelegas el gramatiko (kiel ofte okazas), tiam la instruado fariĝas seka, teda. ~~xxxx~~ Laŭ mia opinio la kaŭzo estas duflanka, sed ĉiam nur la facila lerneblec o de Esperanto. Unue inter la lernantaro ĉiam troviĝas personoj, kiuj certe ne intencus lerni iun nacian lingvon, eĉ personoj, kiuj pene skribuzas sian propran gepatran lingvon. Oni jam dekomence povas diri, ke ili ne finlernos. La dua grupo estas pli inteligentaj sed iom maldiligentaj homoj. Kial lerni? La vortoj ja estas tiom facilaj, la reguloj tiel klaraj, malmultaj, kaj neniam plu forigeblaj el la memoro. Sed post kelkaj pliaj lecionoj montriĝas, ke lingvoscio ne flugas al la emulo, sed ke oni mem ĝis devas perlabori.

Ekzistas nenia rimedo kontraŭ ili; helpos nur la tempo, kiam oni Esperanton ne plu lernos pro ideala celo, sed liberdevige, kiam oni ĝin bezonos por trovi sian vojon tra la vivo.

---

Pro manko de loko la listoj de donacoj por la flago kaj la propaganda kaso aperos nur en nia venonta numero.

ESPERANTISTA GRUPO ESPERANTO ★ KORTRIJK

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N° 7
Aprilo
1930

RECHT OP ANTWOORD - AANGETEEKEND VERZONDEN.

BELGA ESPERANTO-INSTITUTO — Antverpeno, la 28an de Marto 1930.

Al S-ro G. DE BROUWERE,
Eldonanto de "NIA INFORMILO"
Kortrijk .

Estimata Samideano,

Ĉi sube vi trovos la tekston de letero, kiun ni sammomente sendas al la eldonantoj de "Flandra Esperantisto", kaj kiu rilatas al la artikolo presita en Januaro 1930 (N°.4) de "Nia Informilo" :

Sinjoro Redaktore-Administranto,

Ni hazarde ricevis la Martan numeron de la revuo "Flandra Esperantisto", kies redaktoro-administranto vi estas kaj kiu enhavas sur siaj paĝoj 135, 138 kaj 139 artikolon "La Okuloj malfermiĝas", en kiu vi represas kun komentarioj, artikolon el la publikaĵo "Nia Informilo" (Januaro 1930) eldonita en Kortrijk.

Se ni, en la unua momento, kiam tiu publikaĵo aperis, povis konsideri, ke la eldonanto en Kortrijk pekis pro nekompreno de la aferoj, ni nun tamen devas konstati, ke la celo, kiun vi volas atingi per la represo estas nepre malutili al nia komerca firmo. La fakto, ke vi kreis organizaĵon "Flandra Esperanto-Instituto", kun sama celo kiel nia firmo, flanke de la propagandaj organizaĵoj, montras, ke vi bone kapablas fari la distingon, kiun la Kortrejka eldonanto ŝajne ne kapablis fari. Via celo malutili, kaj tiel malhoneste favorigi la firmon de vi kreiton, kaj kies anonco aperas en sama numero, -estas do tute klara.

Tial, laŭ la Belga leĝo kaj sekve al artikolo 13 de la Dekreto de la 20a de Julio 1831, ni postulas de vi, ke vi en via plej proksima numero, t.e. tiu de Aprilo, aperigu la respondon ĉi tian, kiu povas enhavi la duoblan amplekson de la artikolo de vi presita. Ni diras: en la numero de Aprilo, ĉar de la momento kiam vi ricevis tiun ĉi leteron, restas al vi la du tagoj, pri kiuj parolas la ĉi supra dekreto.

Kvankam por eksterstaranto povus esti pli malpli malfacile, apartigi la funkciadon de de la diversaj Esp.-organizaĵoj en Belgujo, la celo de nia respondo estos tamen nur refuti la argumentadon, kiu estas farita speciale kontraŭ "Belga Esperanto-Instituto".

Kiam en 1926, "Belga Esperanto-Instituto" estis kreita kun tre malgranda kapitalo, la plej unua celo estis renovigi kaj pliampleksigi iom post iom la propagandan materialon Esperantistan en Belgujo, kaj ĉefe krei la neekzistintan flandran propagandilaron. La nominala kapitalo, kiu estis Fr. 12.500, --el kiuj nur la kvinono estis pagita, ne permesis efektivigi en la unuaj momentoj la tutan programon, kiun la Administrantaro fiksis al si. Ni presis kaj represis en ambaŭ naciaj lingvoj la elementan gramatikon, konatan sub la nomo "Ruĝa Broŝuro", ni fabrikigis malmultekostajn insignoj de diversaj modeloj, ni iom post iom eldonis ilustritajn poŝtkartojn kun Esp.-teksto pri la plej grandaj urboj belgaj, ni re-eldonis la "Flandra'n Fundamento'n", fine ni aperigis la du volumojn de "Belga Antologio" grava verko pri flandraj kaj franclingvaj belgaj aŭtoroj.

La kapitalo, pri kiu ni disponis kaj kiu feliĉe pro la fido, kiun nia laboro alportis al nia firmo, kompreneble ne estis de la unua momento tiom granda por ke ni estus povintaj efektivigi niajn projektojn tiom rapide, kiom ni deziris, kaj tre certe okazis prokrastoj, kiujn ni mem unue bedaŭris, sed ni tamen ĉiam havis la konscienctrankviligon, ke tio, kio ne efektiviĝis tuj, ne povis esti tuj efektivigata kun la rimedoj teknikaj je nia dispono.

Dank'al la ĉiam kreskanta fido de la Belga Esperantistaro, nia kapitalo regule kreskis ĝis 120.000 subskribita, kaj 82.700 Fr. pagita kapitalo.

Ĉiuj komprenos ke tio estis ebla ne nur pro malgrandaj subskriboj sed pro efektive gravaj kontribuoj de kelkaj el niaj amikoj en la lando. Kaj de tiu momento pli ol iam, ni, ĉiam laborante sur la Esp.-kampo, havis kiel tskon (ni diru kiel devon) rentumi la monon enmetitan en nian firmon. Tiuj kiuj pri tio faris aŭ faras riproĉojn al nia societo, montras, ke ili nenion komprenas pri la vivo de movado kiel la nia. Ĉiuj Esperantistoj verŝajne estas pretaj oferdoni iom da mono, sed kiam kapitaloj estas bezonataj, tio kompreneble estas nur ebla kiam oni povas garantii aŭ almenaŭ duon-garantii honestan rentumon de la pruntedonitaj sumoj.

Tion ni diras nur por klarigi ke estas absurde, postuli de ni, ke ni liveru la librojn, kiujn ni en grandaj kvantoj aĉetas aŭ kiujn ni presas, je la prezo mem, je kiu ni ilin aĉetas aŭ pagas.

Ĉiu scias, ke se firmo eldona aĉetas grandan kvanton de unu libro de la eldonanto, ĝi akiras tre gravan rabaton. Se do, kiel temis pri la Schidlof-vortaro, "Belga Esperanto-Instituto" enmetis milojn da frankoj por aĉeti grandan kvanton de tiuj vortaroj, ĝi do ankaŭ akiris grandan rabaton. De tiu rabato tamen ĝi devas, se ĝi volas vendi la librojn, cedi al la revendistoj-libristoj kaj al la profesoroj parton pli aŭ malpli gravan. Por la

libristoj komprenebble tiu procento estas multe pli granda ol tiu por la profesoro, kies rabato estas ĉiam kaj en ĉiuj fakoj 10%.

Kiam do Kortrejka samideano mendis ĉe kortrejka libristo vortaron Schidlof de Fr.20.- tiu libristo ĝin mendis ĉe la Instituto kaj ricevis la revendistan rabaton. De tiu ĉi rabato, la kortrejka samideano akiris la profesoran rabaton, kaj tiel okazas ke li aĉetas ankaŭ en Kortrijk libron je la sama prezo, kiel ĉe ni, okaze de rekta senpera aĉeto, eĉ malplialte se oni konsideras la unuopan afrankelspezon. Kiel en ĉiu komerca fako, la nura diferenco estas ke per tiu aĉetmaniero eksterstaranta peristo (libristo) akiras parton de la profito sur tiu libro.

La aserto, ke ni reprenas la 10%-an rabaton, por afranko, estas tute malvera. Ni kalkulas nur la efektivajn send-elspezojn.

Ni estas do provaj dirante ke via malbona fido estas klara, ĉar vi ne faris eĉ unu klopodon por antaŭe kontroli la erarajn klarigojn. Tiu kontrolo estis por vi des pli facila, ĉar vi mem jam ĝuis revendistan rabaton ĉe nia societo.

Kaj jen la plej grava kulpigo, kiu troviĝas en la artikolo "La Okuloj malfermiĝas", ĉar la aliaj riproĉoj pri prokrastoj kaj ceteraj, ja temas pri okazintaĵoj de longe for, kies publikigo do estas duoble malhonesta kaj mallojala.

Post la febra laboro por la Universala Kongreso kaj ĝiaj sekvoj, la liverado de libroj okazas tute regule.

La afero pri la "telefonlistoj" en "Belga Esperantisto" ne rekte rilatas nin. Vi tamen estus povinta atentigi viajn legantojn pri la fakto ke la Kongresa Komitato de Antverpeno abonigis ĉiujn kongresanojn al "Belga Esperantisto", el kiu rezultis profito granda por la propaganda societo en la Lando, kaj ke estus vere malĝentile la unuluran linion rifuzi, kiun ricevis en tiu listo ĉiu el la 1500 kongresanoj-abonantoj. La ekzemplo estis tiom taŭga, ke de tiam ĝi estis imitata en la postaj kongreslokoj. Kaj cetere la kutimaj abonantoj nenion perdis ĉar en 1928 la paĝokvanto de nia nacia revuo estis eksterordinare pli granda.

Pri la prokrasto en la apero de la revuo, ni same povas diri ke temas pri fora estinteco, kaj ke nia nacia revuo nun aperas tiom regule kiom monata revuo Esperantista povas regule aperi.

Pri la personaj atakoj, kiuj en tiu Marta kaj en antaŭaj numeroj estis faritaj kontraŭ iu aŭ iuj gvidantoj de nia Belga movado Esperantista, rilate al liaj aŭ iliaj agoj, en aŭ ekster la Esperanto-Instituto, ni eĉ ne volas paroli, ĉar ĝis nun vi tamen ne jam presis, ke la gvidantoj de la Esp.-movado Belga estas ŝtelistoj aŭ mortigistoj kaj ĉar la aliaj personaj atakoj devas esti pardonataj al personoj, kiuj deflankiĝintaj de la bona vojo de lojala laborado por Esperanto, nur ankoraŭ sin okupas pri dividiga laboro, klopodante forpreni membrojn de unu societo aŭ grupo, anstataŭ klopodo interesigi eksterstarantojn neesperantistojn al nia movado.

Krom tio v i a flandra movado efektive nenion intencas. Ĝi ne volas, flanke de la Belga, ekster la Belga eĉ, varbi novajn Esperantistojn, ĝi precipe kaj nure kontraŭbatalas la ekzistantajn organizaĵojn. Vi volas detrui ĉion kio enhavas la nomon "Belga", ĉu tio nomiĝas "Belga Ligo", "Belga Esperantisto", aŭ "Belga Esp.-Instituto", kaj por tio ĉiaj rimedoj estas bonaj. Tiel ĝi ne agas laŭ la deziro de la flandroj, sed nur laŭ tiu de la "Front"-partio, politika partio en kies hejmo cetere la movado naskiĝis.

Tial la represo ne estis certigi aŭ plifaciligi la bonan laboron de viaj organizaĵoj sed vere malutili la laŭ vi detruindan "Belga Esperanto-Instituto"-n. Tion ni ne povas permesi, kaj tial ni respondis. Ne kredu tamen, ke ni mem per samaj rimedoj atakos. Ni ĉiam memoras pri la versoj de granda "franca" poeto Victor Hugo, kiujn ni tradukas: "Kiam infan' naskiĝas, -La familio per grandaj ĝojkrioj aplaŭdas", kaj ni malgraŭ ĉio esperas ke viaj ĵusnaskiĝintaj infanoj povu esti feliĉaj kaj prosperaj laŭ Esp.-vidpunkto, kaj ni sincere deziras al la familianoj, ke neniam troviĝos inter ili, iuj, kiuj iam sekvos la malbonan ekzemplon, kiun vi nunmomente donas, ne irante vian vojon, sed malhoneste insidante kontraŭ viaj ĝisnunan kunlaborantoj kaj amikoj, kiujn vi malprave, mallojale kaj malĝentile deflanke atakas.

Ni prezentas al vi, Sinjoro Administranto-Redaktoro, niajn salutojn.

(subs.) Maur. Jaumotte Fr. Schoofs.

Se la artikolo, kiun vi presis, nur estus aperinta en "Nia Informilo", kaj se ni estus povintaj konsideri ĝin kiel privataĵon, ni ne estus respondintaj al vi.

Sed tamen, kiam ĝi estis publikigita en revuo, kiu disvastiĝas ankaŭ ekster la Kortrejka regiono, ni tamen ne povis plu preterlasi sendi al vi ankaŭ tiun ĉi Respondon, kiun vi ankaŭ lojale bonvolos presi en la tuj-sekvanta numero de "Nia Informilo", laŭ la art. 13 de la Dekreto de la 20a de Julio 1831 jam menciita supre.

Belga Esperanto-Instituto
(Koopera Societo)

La Admin.-Delegito, (subs.) Maur. Jaumotte.

La Admin.-Prezidanto, Fr. Schoofs.

---

Tiujn kiujn ĝis la fino estos legantaj supran epistolon, ekkaptos verŝajne ofte dormemon, pro ĝia longeco.

Multajn komentariojn ne necesas aldoni, ni tamen notu:

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
Markesteenweg, 18, Kortrijk

N° 8
Majo
1930


MERKREDO, 4an de JUNIO, je la 8a vespere, ĜENERALA KUNVENO, en "De Tuin" Yzerweglaan

Pro la granda malfacileco trovi konvenan loĝadon, kaj pro la multekosteco de la restado en la urboj Antverpeno kaj Lieĝo, la plejmulto decidis ne ĉeesti la kongresojn ĉi tiun jaron.

Kompence, ekskurso estas aranĝita al insuloj Walcheren kaj Beveland (Nederlando).
Sabato 7an de Junio, je la 6,15 h. vespere, foriro vagonare ĝis Brugge. Bicikle ĝis Damme, kie loĝado.
Dimanĉo, le la 7a, Diservo en Damme; poste biciklado al Breskens;
poste per boato de Breskens al Vlissingen; tagmanĝo en Middelburg;
loĝado en Zierikzee aŭ Goes; la vojo sekvota dependas de la vigleco de la partoprenantoj; pri tio ni decidos surloke.
Lundo, daŭrigo ĝis Antverpeno. Je la 7,40 h. vespere, reveno vagonare el Antverpeno, kie ni renkontos la partopreninto j de la Flandra kongreso.
La bicikla veturado sumiĝas je 150 km. por la du tagoj.
Pliaj informoj estos donataj en la merkreda kunvenejo.

-----------------------

Por la vizitontoj de la Flandra Kongreso en Antverpeno: Gvidanto S-ro Bassleer.
Foriro Dimanĉe je la 7.10 h. Reveturo Lunde je la 7.40 h. vespere.

-----------------------

Ĝis nun neniu firme sin anoncis por Lieĝo. Kiu konsentas tie reprezenti la Kortrejka esperantistaro ?

-----------------------

Vendredon, 23an de majo, S-ro Debrouwere vizitis Meenen por pritrakti la eventualan arangon de publika kurso. Tiu punkto estis jam tuŝita la pasintan vintron sed ne efektiviĝis.
La diskuton ĉeestis 6 personoj, esperantistoj kaj kandidatoj-esperantistoj, kiuj plej entusiasme deklaris sin pretaj labori por propagandi la Zamenhofan idealon en ilia urbo.
Jen ĝojiga konstato kiu plej bone sin anoncas por la disvastiĝo de nia movado en tiu najbara urbo.
Nian lastan kurson partoprenis ankaŭ personoj el Mouscron; ĉu ankaŭ tie ne estus ebla ion fari ?

-----------------------

La 18an de majo estis fondita en Gent la "Flandra Ligo Esperantista".
Kiam infan' naskiĝas
La familio per grandaj ĝojkrioj aplaŭdas.....
Ni gratulas la gepatrojn de la ĵusnaskiĝinta infano kaj deziras lin feliĉa kaj prospera laŭ Esperanta vidpunkto.
Nia grupano S-ro Bassleer estis elektita kasisto de la provizora komitato.
Ankaŭ al li, feliĉon kaj prosperon!...(Bonvolu atenti ke ne li estas la ĵus naskiĝinta infano).

-----------------------

La abonprezo de "Belga Esperantisto" altiĝis por izoluloj ĝis 30 fr. po jaro.
Same altiĝis la abono al "Flandra Esperantisto" ĝis 15 fr. jare.

-----------------------

La 23.5.1930 la grupestraro akceptis la proponoj por paroladoj en nia urbo de S-ro Julio Baghy el Budapest kaj de S-ro Sinha el Calcutta.
Por ambaŭ paroladoj estas antaŭvidita elspezo sume je 500 frankojn.

-----------------------

"Heroldo de Esperanto" sciigas nin pri grava novajo en Esperantujo: fondo de Ce-instituto.
Jam de kelke tempo ni aŭdis pri daŭra sukcesplena propagando por Esperanto per kursoj gvidataj de pastro Andreo Ce. Dum la lastaj jaroj oni ofte esprimis la deziron organizi pli grandskale tiajn kursojn, kaj tiucele estis kreata specialan oficejon aŭ, kiel oni esprimis instituton, kies sidejo estas en Hago.
La ĉiam grandiĝanta intereso pri Esperanto kaj deziro ĝin lerni, ĉiam pli kaj pli klare montriĝis la neceso formi ian centran oficejon kun la tasko reguligi la kursfaradon, eduki la necesajn taŭgajn instruistojn, prepari por ili laborkampojn, havigi al ili la necesajn helpojn kaj plenumi la diversajn bezonojn ligitajn al la kursoj.
Ni esperas ke la Ĉe-instituto estos por tuta Esperantujo fonto de nova vigla kaj viviga energio.

-----------------------

La listo por la flago kaj subtenkaso, aperos la venontan monaton; ĉiam memoru ĝin.....

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :

**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

n°9

Junio

1930


MERKREDO, 2an de JULIO, je la 8a vespere, GENERALA KUNVENO, en "De Tuin" Yzerweglaan

---

La kunveno de la 4an de junio aprobis aĉeton de ŝtofo por esp.flagetojn - kosto: I5 fr. Al la ekskursontoj ni rekomendas uzi ilin por la biciklaj ekskursoj.

---

"Espero Katolika" komunikas ke S-ro Vanbiervliet anoncis sian edziĝon kun F-ino Rysman, kaj ke kvankam F-ino R.ne jam estas esperantistino estos tamen esp.edziĝo.

Jen do fine kuraĝega samideano kiu, jam antaŭ sia edziĝo, asertas ke ne sole li restos esperantisto sed ke ankaŭ sia edzino esperantiĝos !

Jam pli ol unu fojo ni spertis ke edziĝo entenas malfarantan aĵon kiu katenas kaj fortiras de ni la plej fortajn volojn. Eĉ antaŭbatalanto, idealisto, instiganto de la tuta loka movado, neniam timanta la danĝeron, ne sukcesis sin tiri el la ungegoj de tiu malfaranta (?) edzaĵo....

Sekve neniu miros ke al tia ŝajne malgrava okazontaĵo estas dediĉita tiom da loko. Do vivu Cesaro ! Ke la muziko ludu ! Li vivu longe kaj zorgu rapide por la ampleksiĝo de nia grupo !

---

POR LA FLAGO.- antaŭe: 309,42 fr. anonima bonfaranto I0,00 - P.Casier 5.00 - Mark Bakisto 2.00 - Petro ne volas la rentumon de la vojaĝŝparoj 25.00 -
Sume : 35I,42 frankojn.

PROPAGANDA KASO.- antaŭe 44.00 - La sama anonima bonfaranto: 5.00
Entute: 49.00 frankojn.

---

S-ro Baghy el Budapest, kiu proponis fari paroladon por niaj gegrupanoj, skribis ke li ne venos, ĉar el Köln li iros rekte al Arnhem. Tie verŝajne li partoprenos la Ĉe-kursojn organizitajn de la urbestraro.

---

Dum la semajna kunveno de la I8an de junio, S-ro Bassleer raportis pri la flandra kongreso en Antverpeno,kiu treege sukcesis. Li bedaŭras ke nia grupo ne estis oficiale kaj ke pluraj promesis ĉeesti sed restis netroveblaj en Antverpeno, malgraŭ liaj diligentaj klopodoj trovi ilin.
La Urbestraro donis 3.000 frankojn por subteni la kongreson.

---

El banloko ĉe la marbordo, la grupo ricevis karton kun salutoj de pluraj japanaj samideanoj. Nia amiko Juliano kiu hazarde troviĝis la saman tagon en la sama loko multe miris pri tio ĉar en la tuta vilaĝo li ne vidis eĉ unu japanon.-Tamen la japanaj literoj sur la karto asertas ke ne temas pri mistifikaĵo aŭ artefaritaj japanoj... Kiu solvos tiun strangan problemon? La familio Cognie promesis belan premion por la gajnonto !

---

Diversaj junaj kaj ankaŭ aliaj gesamideanoj esprimis la deziron ekskursi als Kluismonto la lastan dimanĉon de julio.-Eble tie ili povus renkonti gesamideanoj el Ronse aŭ Francujo ? Nia Kortrejka Petro promesis kunporti sian tirsakon kaj kla festdirektoro Juliano jam lernas novajn dancojn. - Ĉiu merkredo, en la kunvenejo, li faros publikan demonstracion. Ni ne dubas ke tio allogos multajn esperantistojn.....

---

LA VERDA RADO ekskursis.- Laŭ informo en bulteno n°8, la klubo "La Verda Rado" aranĝis interesplenan ekskurson al insulo Walcheren en Nederlando, okaze de la Pentekostaj tagoj.

Ĉiuj partoprenantoj atingis Bruĝo freŝaj kaj senlacaj, ĉar la vojaĝo okazis vagonare. Kun flirtanta flageto ok gesamideanoj fiere frabiciklis la urbon, kvazaŭ ili farus mondvojaĝon..... Kurioze la promenantoj haltis por rigardi kaj admiri la inajn krurojn...

La komenco de la vojaĝo ne estis tiom agrabla al la vagonara veturo; ĉar ekestis granda kontraŭa vento, baldaŭ kelkaj spiris kaj blovis kiel lokomotivoj. Tamen ili bone atingis la loĝejon en Oostkerke kaj baldaŭ ĉia suflado estis forgesata.

Tie agrable pasis la vesperon. Troviĝis amatoroj de biljardo dum la aliaj interesiĝita aŭskultis la debatojn pasiajn inter kelkaj vilaĝaj konsilantoj; Noël restis sopiranta kaj revanta pri la bela filino de la dommastro, malfeliĉe konkuranto ŝajnis havi iom pli da sukceso. La simpla vilaĝa medio plej bone plaĉis al ĉiuj, same kiel la biero, kaj tiel finis sufiĉe malfrue, sen pliaj , la unua tajo.- Pro la bona reputacio de Petro,ni ne diros ke li sin trompis je ĉambro kaj eniris ĉi la bela fraŭlino. Ni tamen kredis la aserton ke li estis trompita pro la mallumo. Noël deklaris ke li ne estis ĵaluza.-

(Daŭrigota)

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.
Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso :
**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N°10
Julio-Aŭgusto
1930


MERKREDO, 3an de Septembro, je la 8a vespere, ĜENERALA KUNVENO, en "DE TUIN" Yzerweglaan

Same kiel multaj aliaj Esperantistaj revuoj, "Nia Informilo" libertempis dum la monato aŭgusto. Kun freŝa spiro kaj renovigitan laboremon ĝi revenis el lando de revoj; per la nuna numero ĝi salutas siajn fidelajn gelegantojn kaj esperas ke same ili bone trapasis la varmajn tagojn.

---

Jam ni serĉis longtempo por trovi iun kiu konsentis sin okupi pri la pruntedono de la libroj apartenantaj al la grupo.

S-ro Cognie A. konsentis funkcii kiel „bibliotekisto" kaj ĉiu semajno alportos la librojn ke la grupanoj deziras legi.

Ĉi sube estas represita la listo de la libroj kaj broŝuroj ke la grupo posedas. Kelkaj libroj ankoraŭ mankas kaj ni petas la gesamideanojn siajn ŝrankojn traserĉi por retrovi la perditajn ŝafojn.

| LEGOLIBROJ: | LERNOLIBROJ: | BROŜUROJ: |
|---|---|---|
| Vivo de Zamenhof | Proverbaro Esperanto | Initiation à l'Esperanto |
| Norda vento | Supera kurso de Esperanto | Autour de l'Esperanto |
| Marta | Rakontetoj | La Revue (marto 1914) |
| Hamleto | Esperanto-Examenopgave | La Movado (1929) |
| Anjo | Struikelblokjes | Een uurtje Esperanto |
| Pro Kio ? | Lingvaj respondoj | Dramo (monologo) |
| La homa lingvo | | Mi ne legos ĝin (monologo) |
| Kiĉjo mensogulo | | Gentoj kaj lingvo. |
| La arto de memdiciplo | | |
| teatraĵoj | | |
| Perdkata testamento | | |
| La du amatinoj | | |
| Sieĝo de Sebastopolo | | |
| Fabiola | | |
| Landoj de l'Fantasio. | | |
| Tri angloj alilande | | |

Se iu bonkora samideano disponas pri libroj ke li ne pli legas, la bibliotekisto sin varme rekomendas por ampleksigi sian kolekton.------

Aliflanke ni insiste petas la pruntontojn ke ili bonege prizorgu la librojn, ĉar la kasisto ne kapablas fari multe da elspezojn por riparoj.

---

Nia kasisto eniris la landon de l'feliĉo ! Tiuokaze la grupo sendis telegrame la esprimon de siaj plej bonaj deziroj al S-ro Cesar kaj lia ĉarma edzino. Ili vivu longe kaj zorgu por baldaŭa ampleksiĝo de nia granda ronda familio !

---

POR LA PLAGO: Antaŭe: 351,42.-B.Bassleer 1, J.Peynaert 1, 3 amikoj 2, P.Casier 1, M.Lambert 1, okaze de ekskurso al Kluisberg 24, M.Devolder 1, André Vandenberghe 5, Gesinjoroj Heffinck-Callemeyn 8, por la 400a G.Debrouweme 4,58. ENTUTE : 400 frankojn. Okaze de la supre menciata sumo de 24 fr.kolektita okaze de ekskurso, ni gratulas la organizintojn de la kolekto kaj prezentas ilin kiel plej imitinda por ĉiuj esperantistoj kiam ili partoprenas iaspeco da festo.

---

Pro malsano S-ro Génin restis dum pluraj semajnoj en la armea malsanulejo de Antverpeno, kio malhelpis lin ĉeesti la kunvenojn. Li preskaŭ tute resaniĝis kaj promesis revenon.

---

Nia Samideano Raoul Vanfleteren revenis, sed por li estis el la kazerno. Li estas unu el niaj plej favoraj amikoj kiu regule ĉeestis la semajnaj kunvenoj kaj ni atendas lin por venonta merkredo.

---

La filo de nia komitatano S-ro Steeland, kun sukceso obtenis sian diplomon de doktoro en sciencoj. Niajn elkorajn gratulojn al la feliĉaj gepatroj.

La 9an de aŭgusto malfermiĝis en Oxford, la 22-a Universala kongreso de Esperanto, kie denove renkontiĝis la kvin kontinentoj je harmonia kunestado. Kvankam la multekosteco de la restado en Anglujo, 1200 personoj el 30 nacioj partoprenis la kongreson.

La prezidanto de la gazetaro komisiono sciigis ke estas atingata bela sukceso: la tri plej gravaj agentejoj: Reuter (Britujo), Havas (Francujo) kaj Wolff (Germanujo) akceptis disvastigi raportojn pri la 22-a Univ.Kongreso kaj ankaŭ pri estontaj okazoj en la Esperanto-movado.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :

**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N° II
Septembro
1930.


...KREDO, 1an de Oktobro, je la 8a vespere, GENERALA KUNVENO, en "DE TUIN" Yzerweglaan.
TAGORDO :
- La venonta vintrokurso -
...stas atendataj por tiu kunveno, ĉiuj gemembrojn sen escepte.

""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""

+++++La monatan kunvenon de 3.9.30 malfermis la vicprezidanto per laŭtlegado de dankesprimoj ...sendita j al la grupo, sekve al la telegramo sendita al S-ro Vanbiervliet, okaze de lia ...edziĝo. La ĉeestantoj aplaŭdis je la promeso ke li ne forlasus la grupon.

+++++Ektuŝite estis ankaŭ la venonta kurso. Kelkiuj esprimas la preferon ke la leçionoj daŭru almenaŭ I I/2 horo. La nombro de I5 lecionoj apenaŭ sufiĉas, kaj je depreno de la ...tempo perdita per malfrua komenco, kiom restas por utila laboro ?

+++++Diversaj samideanoj deziras ke la grupo represigu la leterkovertoj kun propaganda teksto en flandra lingvo,por vendo.- Generale akceptita estas tiu represigo.

+++++Antaŭ tri jaroj estis eldonitaj je l'nomo de la grupo poŝtkartoj ilustritaj kun esperanta teksto. Ĉar tiumomente la grupkaso estis malplena, kelkaj esperantistoj prenis ...r sin la elspezoj por tio. Restas ankoraŭ pli malpli por 200 fr.da kartoj. La kunveno decidas al repago kaj dankas la s-anoj kiuj faris la prunton,sen rentumo.

+++++La grupa biblioteko pliriĉiĝis je du volumoj, donaco de samideano Bossuyt (la granda ...bakisto),membro fondinto de la grupo:
1. Bonhumoraj rakontoj;
2. Esperanto, jarkolektoj 1928-1929.
Ĉar ne estas la unuan fojon ke li montras intereson por nia biblioteko, li plene meritas ...la plej grandan honordistingon de Esperantujo: La verda spickuko !
Vivu Roger !!!

+++++Alvenis je adreso de la grupo: 1 ekz.de literatura revuo eldonita en Svedujo. Ĝi ŝajnas tre interesa,sed la abonprezo kalkulita en svisaj frankoj kiuj valoras okoble la belgajn frankojn, ne estas instigo por la belgoj ĝin aboni.
Por la kolektantoj de poŝtmarkoj alvenis pli modesta revuo "Tutmonda kolektanto" kies abonprezo sumiĝas je 2.70 belgojn po jare. Aperas 6-foje dum jaro.
"Literatura mondo" kiu malaperis antaŭ kelkaj jaroj pro la inflacio en Hungarujo, denove estos eldonata. Estis siatempe la plej grava kaj interesplena literatura gazeto esperanta, enhavanta belegajn ilustraĵojn kaj desegnaĵojn.

+++++De tempo al tempo estas videblej ĉe la elmontrejo de fiŝvendisto en St.Janstraat, kestetojn kun la vorto "Esperanto" kaj enhavantaj...belajn haringojn !
Feliĉe por nia reputacio ke la komercisto ne konas la sufikso -ist, alie li estus povinta vendi kestojn da Esperantistoj.
Manĝontaj gesamideanoj trapasantaj tiun straton, ne forgesu saluti siajn manĝotajn gefratojn !

+++++La 8-an de oktobro rekomencos ĉe Radio-Belgique la kursoj de Esperantoj.

+++++En Antverpeno ekzistas faklernejo por oficisto kiu estas konata kiel la plej grava ...de la flandra landparto. La pasinta jaro ĝi nombris 2.?00 da gelernantoj. Sur sia programo estas menciata ankaŭ : perfektiga kurso de Esperanto.

-------------------------

UILENSPIEGEL EN MAGDEBURGO.

Uilenspiegel alvenis en la urbon Magdeburgo kaj diris al ĉiuj: "Mi malsuprenflugos de la urbdoma balkono." Multaj personoj,junaj kaj maljunaj,kunvenis sur la vendej-placon por rigardi la flugadon. Uilenspiegel staris sur la urbdoma balkono kaj balancis la manojn, kvazaŭ li dezirus ekflugi. La popolo staris kun malfermitaj okuloj kaj buŝoj,kaj pensis ke li efektive intencas flugi. Tiam Uilenspiegel ekridis kaj diris: Mi pensis ke en la mondo mi sola estas malsaĝulo,sed nun mi vidas,ke preskaŭ la tuta urbo estas plena de malsaĝuloj. Vi povas ĉiuj kune diri al mi,ke vi povas flugi,tamen mi tion ne kredos.Vi ne kredus al mi,kvazaŭ-malsaĝulo. Mi ja estas nek ansero,nek birdo,mi ne havas flugilojn kaj sen flugiloj kaj sen plumoj neniu povas flugi." Kun tiuj ĉi vortoj li turnis sin kaj forkuris de la balkono,lasante stari la popolon,kiu parte malbenis,parte ridis: "Tiu ĉi estas ruzaĉulo," ili diris, „sed tamen li diras la veron."

-------------------------

+++++Iu Sinjoro Buchanan,kiu mortis en Anglujo,testamentis 4000 funtojn al la Universitato de Liverpool,por certigi Esperanto-prelegojn kaj por instigi per premioj la studon de nia lingvo en aliaj universitatoj.

+++++La fama kreanto kaj estro de la "Universala Film-Korporacio" en Usono,S-ro Carl Laemmle, interesiĝas pri Esperanto. Al samideano J.F.Scherer el Los Angeles li ekkleris ke li jam antaŭ kvar jaroj opiniis,ke Esperanto bone taŭgus por internacie sukcesigi la parolfilmojn.

-----------------------------

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N°I2
Oktobro
I930


MERKREDO, 5$^{an}$ de Novembro, je la 8$^{a}$ vespere, ĜENERALA KUNVENO, en "De Tuin" Yzerweglaan

JAUDO, 6$^{an}$ de nov. okazos la 1$^{a}$ leciono de la 4$^{a}$ kurso, aranĝita en la urbdomo.
Dum la daŭro de la kurso, la semajnaj kunvenoj ne pli okazos, por ke ĉiu povu ĉeesti la lecionojn. Nur la monata kunveno okazos kiel kutime la 1$^{an}$ merkredon de la monato.
Ĉiuj gemembroj estas insiste invitataj ĉeesti regule la lecionoj kaj varbi almenaŭ kelkajn novajn lernantojn. Necesas ke la kurso denove nombru multe da gepartoprenantoj ĉar de tio dependas la ampleksiĝo de nia grupo.

---

+++++En la tagoj de 11/I2.8.I930 kongresis en Paris la ĝenerala konsilantaro de la Internacia Profesia Sindikato de l'Instruistoj. Punkto 5 de la tagordo pritraktis Esperanton. Kelkajn frazojn kiujn parolis Esperantista instruisto en la mondhelplingvo, trovis aplaŭdon ne nur pro la belsono, sed ankaŭ pro tio ke la neesperantistaj reprezentantoj de la diversaj landoj ilin komprenis senpere.
La kunveno decidis unuvoĉe,peti ĉiujn alligitajn organizaĵojn propagandi Esperanton inter siaj membroj kaj en la publiko; krom tio Esperanto estas allasota kiel intertrakta lingvo ĉe la Internacia Profesia Sindikato de l'Instruistoj.
+++++El la estraroj de la kvar ĉeforganizaĵoj por la Esp.-movado en Nederlando, nome de la neŭtralaj, de la laboristaj, de la katolikaj kaj de la protestantaj grupoj,fondiĝis komitato. Tiu komitato batalos por akiri en Nederlando la liberecon,instrui Esperanton en ĉiaj kaj ĉiuj popollernejoj.
+++++Responde al petskribo de laborunuiĝo de Berlinaj instruistoj scipovantaj Esperanton la lerneja estraro en Berlino decidis enkonduki Esperanton en dudekkvin popollernejojn.
Per la enkonduko de la lingvo internacia en la popollernejojn oni ne nur malfermas al larĝaj popolrondoj la aliron en vastan alilingvan mondon,fermitan al ili sen helpa lingvo tutmonda,sed samtempe oni konsiderinde akcelas la instruon de la gepatra lingvo. Estas laŭfakta konstato,ke Esperanto-instruo surprize bone influas la instruadon de nacia lingvo.
+++++La urba konsilantaro de Rahovo (Bulgarujo) apud Danubo, oficiale nomigis "Esperanto" insulon en la mezo de Danubo.
La urbestro kaj la prezidanto de la esperantista societo subskribis kontrakton kiu konfirmas la societan posedrajton je ĉi tiu insulo (I50-200 hektaroj) dum 20 jaroj kaj kiu rajtigas konstruon de ferkolono tursimila por propagandaj celoj; ĝi estos kronita je la pinto per granda verda stelo,kies rando havos la surskribon "Esperanto - lingvo internacia".
+++++La 3$^{a}$ Sudamerika Kongreso de Turismo,kunveninta en Rio de Janeiro dum la tagoj 8a-I7a de septembro,aprobis unuanime la jenan dezîresprimon :
La 3-a Sudamerika Kongreso de Turismo rekomendas publikigi en la internacia helplingvo Esperanto la gvidlibrojn kaj flugfoliojn dissendotajn en la landoj ekster Latinameriko kaj instruadi tiun lingvon en la publikaj lernejoj de ĉiu lando apartenanta al la sudamerika Federacio de Turismo,tial ke ĝi estas la plej facila interkomprenilo inter la popoloj.
+++++Per la memorando de Briand,la projekto krei "Unuiĝintaj ŝtatoj de Eŭropo" (Paneŭropo) estas -kiel ĉiu scias- grave progresinta. Ke la multlingveco de eŭropaj nacioj finfine devigos la gvidantoj de Paneŭropo elekti por komunaj organizaj aferoj ankaŭ komunan lingvon,pri tio ili ĝis nun ne pensis. Cetere en la nuna stato de preparaj laboroj tio por ili ne estas aktuala. Tiom pli aktuala estas por ni esperantistoj en Eŭropo la akcelado de Paneŭropo. - Esperanto kaj Paneŭropa Unio jam de pli ol tri jaroj kune agadas. La I2-an de februaro I927 estis fondita "Esperanto-sekcio de Paneŭropa Unio" kun la celo uzi nian lingvon por korespondado,propagando en Esp.-gazetoj kaj por broŝuroj. Tiu sekcio,apartenanta kiel fako al la centra oficejo de Paneŭropa Unio,estas interŝtata; povas aliĝi al ĝi ĉiu persono,deziranta subteni ĝiajn laborojn.
Por faciligi kaj ebligi la registradon de ĉiuj samideanon simpatiantaj kun la paneŭropa movado,necesus tamen fondi landajn sekciojn,kies organizon ple bone povus aranĝi la landaj esp.societoj.
+++++Dimanĉe, 9-an de novembro,okazos en Lille jara kunveno de la Esp.Federacio de Norda Francujo. - Ankaŭ eksterlandanoj estas invitataj. Por informoj kaj aliĝoj oni sin turni al S-ro R.Curnelle,39,rue Canrobert, Marcq-en-Baroeul.
+++++Donacoj por la flago de la grupo: Antaŭe 400 fr. Devolder Marc 1 fr.; Vandenberghe André 1fr. Entute 402 fr.
+++++Laŭ ricevita informo "Belga Esperantisto" denove vidos la lumon dum la monato novembro.- Estas tamen malbona metodo ĝin nur eldoni kiam alproksimiĝas la tempo de renoviĝo de la abonoj, por poste denove malaperi, kiel poliĉinelo el skatoleto.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso:

**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

N° 13-14

Novembro

1930.


Merkredo, 3-an de Decembro, je la 8a vespere, ĝenerala kunveno, en "De tuin" Yzerweglaan

T a g o r d o :
Aranĝo de la grupa laboro.

---

Jaŭdo, 6-an de novembro, malfermiĝis en la urbdomo, la 4-a publika kurso, organizita de nia grupo.

Kvankam la esperoj estis bonaj, neniu verŝajne antaŭvidis tian sukceson: almenaŭ 100-on da ĉeestantoj por la unua leciono aŭ pli bone varbvesperon, el kiuj 58 tuj enskribiĝis; la 2-a semajno alportis 10, la 3-a 5, kaj la 4-a 1 enskribojn; do entute 74 lernantoj. Ĉu ne oni rajtas esti kontenta ? Kiu kultura organizo en Kortrijk povas apogi sur tia rezultato ?

Ĉio tio ni dankas al niaj fervoraj membroj kiuj senlace propagandis, kaj ĉefe per persona varbado.

El Harelbeke ni nombras 8 enskribojn kaj ankaŭ diversaj el pluraj vilaĝoj, unu eĉ el Thielt !

Tamen la laboro ne estas finita; ni streĉu niajn fortojn por interesigi ĉiujn ĝis la fino de la kurso. Necesas ke ni varbu novajn grupanojn kaj por tio estas plej bone alparoli viajn konatulojn. Por tio la grupestraro fidas je siajn gemembrojn kiuj jam multaj fojoj provis ke por ili Esperanto ne estas amuzilo, sed ke per ĝi ili celas helpi al paciĝo de la mondo.

Ne laciĝu - Antaŭen - kaj iam la mondo estos nia !

---

+++++En Meenen ankaŭ leviĝas la verda suno. - M.K.Depypere, U.E.A.delegito, kaptis la okazon ke la tereno estis iom preparita, por demandi oficialan kurslokon. La urbestraro konsentis kaj disponigis lernejklason en la lernejo, Ŝtacistrato, kie S-ro Debrouwere gvidos kurson dimanĉe matene. La unua leciono okazos la 9-an de decembro venonte.

Ni menciu ke amiko Casier multe faciligis la taskon, persone propagandante ĉe la urbestraro de Meenen.

Necesas ke la Kortrejkaj gesamideanoj subtenu tiun kurson per ĉeesto al la unua leciono. - Dum la kunveno de merkredo ni finaranĝos tion.

---

+++++La 5-an de Septembro 1930 alportis la gazeto "Herolde de Esperanto" sciigon, ke la ĉeĥoslovaka ministerio por fervojoj eldonis belaspektan faldprospekton pri Ĉeĥoslovakujo, kaj serion da belegaj poŝtkartoj ilustritaj, kiuj prezentas famajn ĉeĥoslovakajn kastelojn.

Unufoja represo de tiu ĉi sciigo en Herolde vekis tiom da intereso en la tuta mondo, ke la nomita ministerio estis superŝutata de petskriboj el la tuta mondo.

La petskriboj venis el ĉiuj mondpartoj - el 24 ŝtatoj.

La ministerio por fervojoj estis plene konvinkita pri la seriozeco de Esperanto, kaj pri ĝia speciala taŭgeco por eksterlanda propaganda. La ministerio sekve de tio faris tuj tre gravan decidon. Ĉiuj eldonaĵoj kiuj estas de la ministerio eldonataj en diversaj lingvoj por eksterlanda propagando, estos estontece ĉiam eldonataj ankaŭ en Esperanto !

---

La Mondmilito pensigas.

Antaŭ kelkaj jaroj la sveda gazetaro presis historion el la mondmilito, historio, kiu pli bone kaj pli klare ol longaj kaj meditigaj disertoj klarigas la kernon de la problemo pri la mondpaco. Eble ĝi estas elpensita - sed tiuokaze bone elpensita...

Soldatoj el la armeo de la interligitaj ŝtatoj iun tagon vidis stangon suprenigata el la germana tranĉeo. Sur la stango estis tabulo, sur kiu estis skribite :

" La angloj estas idiotoj."

Ili per pafoj detruis la tabulon, sed tuj alia tabulo estis suprenigita, kaj sur tiu oni legis :

"La francoj estas idiotoj".

Ĉi tiun tabulon oni ankaŭ per pafoj detruis.

Sed tuj la germanoj suprenigas trian tabulon:

"La usonanoj estas idiotoj."

La tabulo estis detruata.

Sed jen la kvara tabulo :

"Ni ĉiuj estas idiotoj."

Tiu tabulo ne estis detruata. La respekto por la simpla, fine komprenita vero estis tro forta.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
Markesteenweg, 18, Kortrijk

No 15
Decembro 1930

La estraro de la Kortrejka Esperantista Grupo salutas elkore siajn gemembrojn kaj sendas al ili siajn plej bonajn dezirojn por la nova jaro.

.......................................................................................................................

Nia venonta ĝenerala kunveno okazos merkredon 7-an de Januaro 1931, en "De Tuin" Yzerwerlaan, je la 8a vespere.

La grupestraro devas esti parte renovigata; do ke ĉiu ĉeestu !

La estraro konsistas nun el : S-oj Mattelaer, Debrouwere, Vanbiervliet, S-ino Byltjauw, S-oj Steelant, Misschaert, Casier, Bossuyt, Vanfleteren, Genin kaj Heffinck.

Art.9 de la fundamenta regularo mencias ke "la estraro renoviĝas po unu duono ĉiujare". La 6 unuaj estis elektitaj la 8.I.30 kaj la 5 lastaj la 9.I.1929. Tiuj kvar lastaj devas do esti anstataŭataj aŭ reelektitaj.

La momento alvenis por varbi novajn membrojn. Se vi havas konatulojn inter la kursanoj, propagandu kaj insistu ke ili vin akompanu al la kunveno.

---

Nia amiko Louis Génin forlasis la armeon pro malsano kaj nun loĝas en Jette, kie li trovis oficon ĉe la urbestraro.

Ni dankas lin por la servoj ke li faris al nia grupo kaj ĉiam konservos bonan rememoron pri li.

---

Por la flago : M.Devolder 1.- ; entute 403.00 fr.

Por la propaganda kaso: C.Sierens Meenen 10.-; entute 59.00 fr.

---

+++La Ŝtatgazeto menciis la oficialan fondiĝon de "Flandra Esperanto-Instituto", kiu celas propagandon kaj vendon de libroj, eldonadon, k.t.p.

Ni forte rekomendas al niaj legantoj la akciojn de tiu organizaĵo kiu plenumos grandan mankon en nia enlanda movado.

---

+++La urba konsilantaro de Arnhem (Nederlando) en sia kunsido la 17-an de novembro 1930, unuanime decidis disponigi al la Ĉe-Instituto de Esperanto grandan modernan konstruaĵon kun bela parko kun la celo helpi la Instituton en la disvastigado de Esperanto per Ĉe-metodaj kursoj kaj edukado de instruistoj.

Ĉi tiu decido estas unika okazaĵo en la historio de la Esperanto-movado, kaj ni devas ĝin rigardi kiel frukton de la Ĉe-kursoj okazintaj en Arnhem dum la printempo kaj somero de la jaro 1930. Tiujn kursojn vizitis inter aliaj eminentuloj la urbestro de Arnhem kaj la ŝtabeno de la instruado, kiuj ne nur iĝis varmaj amikoj de Esperanto, sed ankaŭ klopodis havigi kiel eble plej efikan helpon al la pedagogia laborado de la Ĉe-Instituto.

La Ĉe-Instituto deziras instali en la domo konstantan internacian renkontejon de esperantistoj kaj aranĝo internaciajn daŭrigajn kaj superajn kursojn, kie oni povos sin trovi kiel en vera Esperantujo kaj per teoria studado kaj praktika ekzercado rapide proksimiĝi al la perfekteco en la lingvo. Ni klopodas doni baldaŭ detalajn informojn pri la estontaj aranĝoj. La tuta gazetaro de Arnhem kun plena simpatio kaj entuziasmo aprobis la grandaniman geston de la urbestraro, kaj en la bondezirioj al la Ĉe-Instituto oni esprimis la esperon, ke per la Esperanto-Domo ne nur la Esperanto-movado, sed ankaŭ la internacia interkompreniĝo ricevos fortan antaŭenpuŝon.

Ni pacience atendu ke ankaŭ la urbestraro de Kortrijk disponigu grandan modernan konstruaĵon kun bela parko por la esperantista grupo... Ĉar por la monato aŭgusto estas projektita nova vojaĝo al Holando, ni enskribu la bonan urbon Arnhem sur la vojaĝplano!

---

+++La publika kurso de esperanto organizita en Meenen, nombras 27 da partoprenantoj kiuj ĉiuj tre regule ĉeestas la lecionojn. Pri tia reguleco eĉ en Kortrijk oni ne kutimas.

Se tiel daŭras, tre certe estos eble starigi en Meenen grupon da fervoraj amikoj de Esperanto; tiom da bona volo ne povas perdiĝi.

---

+++La libro pri la polusekspedicio de Andrée en 1897 aperis samtempe en 12 lingvoj, inter kiuj ni kun fiero povas mencii Esperanton.

La rajton eldoni la libron en Esperanto akiris la "Eldona Societo Esperanto" en Stockholm. La libro enhavas ĉirkaŭ 450 paĝojn kaj ĝi estas presita sur luksa papero.

# NIA INFORMILO


Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.
Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso :
Markesteenweg, 18, Kortrijk

N° 16
Januaro
1931.


MERKREDO, 4-an de februaro 1931, monata kunveno en "De Tuin" Yzerweglaan, je la 8-a. ke ĉiu alportu almenaŭ unu novan membron !

Voor de maandelijksche bijeenkomst, aanstaande woensdag, wordt gerekend op eene nieuwe aanwerving van leden.-Maakt persoonlijke propaganda, en brengt uwe vrienden mede, desnoods aan uwe hand !

---

La ĝenerala kunveno de la 7-an de januaro komencis iom malfrue, pro la novjarfestuloj. ni atentu ke tio denove ne okazus .

Estis elektitaj kiel estraranoj, ĝis 31.12.1933, S-oj Delbaere & Verfaillie; reelektitaj: S-oj. Casier, Bossuyt & Vanfleteren.

Niajn gratulojn al la elektitoj kaj ke ili daŭrigu senlace ilian laboron por la venkigo de nia Esperanta celo.

+++++S-ro Casier proponis duobligi la kotizon sed el la pridiskuto sekvis ke estas preferinde konservi la nunan kotizon kaj denove malfermi subtenan konton je intenco de la gemembroj kiuj libervole konsentas pagi pli altan kotizon aŭ fari de tempo al tempo donacetojn. Ni sube sekvas la unua listo da subtenoj.

+++++S-ro Steelant bonvenigis la novajn gemembrojn kaj disdonis laŭdojn laŭ intenco de la kunlaborulo j de la grupo kaj ĉiuj kvitancis per aplaŭdoj.

---

PROPAGANDA KASO: P.Casier 12.-, Bossuyt P.1; Boudens C.4; Cognie A.12; Lambert M.12; Vandenberghe A.6; Verfaillie P.050; S-no Vanneste 1; Vandeleene P.3. ENTUTE 51.50fr.
POR LA FLAGO: antaŭe 403.oo; 0 la bonfaranto! 20.oo ENTUTE 423.oo + VanRoye 8. 431.oo

---

## O n i d i r o j :

ONI DIRAS: ke dimanĉe 8-an de februaro, okazos kunveno kaj festeto en Gent, organizota per Flandra Ligo Esperantisto, kaj ke tie estos amuza;

++.Ke ankaŭ la Kortrejka grupo festos la finon de ĝia kurso, la 1-an de marto, posttagmeze. en kafejo "De Tuin";

.ke multaj jam sin prezentis por kanti sed ke ĉefe estos bezonataj bovolemaj muzikantoj;

.ke estos familia festo kaj ke tial por unu fojo la estraro permesos al la gemembroj ke ili alportu siajn amik(in)ojn, infanojn, edzinonkaj eĉ bopatrinojn;

++.ke la familio de S-ano Depypere el Meenen bone prosperas, ĉar ĝi akriris filon nomita Prospero. Gratulojn al la gepatroj !

+++ke en Aalst okazos je Pentekosto esp.kongreso al kiu jam aliĝis pluraj eksterlandanoj;

++.ke en 1931 aperos en Esperanto "Pallieter".

++.ke en "Flandra Esperantisto" de Februaro 1931 aperis sur la unua paĝo artikolon kiu certe meritas la Nobel-premion de la Esperanto-Akademio.

ke tiu artikolo diras inter alie :

" Mi konas junajn virojn, kiuj antaŭ sia edziĝo estis fervoraj servantoj de la bono.
" Ili estis laboremaj- kaj ne simple honoraj- anoj de studkluboj, asocioj, kongresoj. Mi
" vidis tiujn samajn junajn virojn post sia edziĝo forlasantaj unu post la alia sian
" socialan laboron. La antaŭa arda sindonemo ŝajnis anstataŭita per bedaŭrinda egoismo.
" La edzino ofte estas kaŭzo de tiu ŝanĝo. Ŝi volas sian edzon tute por si. Ŝi diligente
" atentas, ke oni ne forprenu lin de ŝi. Ĉu li deziras ĉeesti kunvenon? Ŝi ekĝemas: "Ĉu
" do mi devas pasigi ĉiujn vesperojn sole?" Ŝi ne estas edziniĝinta por vivi en soleco !
" Kaj la edzo, por ne ĉagrenigi sian edzineton, rifuzas la inviton kaj restas hejme. Kaj
" ĉiujn laborojn, kiuj estis ardigintaj lian junecon, kiuj estis gardintaj lin kontraŭ
" multe da danĝeroj kaj kiuj havigis al li nekompareblan memrespekton, li forlasas.
" Tiu ĉi edzino komprenas nek sian socialan rolon, nek la taskon, kiun ŝi devus plenumi
" ĉe sia edzo. Anstataŭ estingi la fervoron de sia edzo, ŝi devus preni sur sin la konser-
" vadon en lia entuziasma koro de tia sakta fajro. Kio fariĝos el niaj socialaj asocioj,
" se tiuj ĉi jam ne povas fidi je la sindono, la sperto, la noblanimeco de la edziĝintaj
" viroj? Se tiuj laboroj postulas de juna familio la oferon de kelkaj horoj, la edzino
" devas libere kaj tutkore konsenti pri tio, pripensante, ke ŝia devo tie ĉi, kiel ĉie,
" akordiĝas kun ŝia intereso."

Ĉu necesas aldoni komentariojn? "Och heere, wat is me dat toch schoone gelapt!" diros la Kortrejkanoj.

Diversaj samideanoj sin jam prezentis al la redakcio de "Nia Informilo", plorpetantaj ke ni publike anoncu ke ili ne kulpas pri la publikigo de la supra artikolo, precipe ĉar ĝi estas kvazaŭ verkita por nia grupo. -

++.En la semajna gazeto "Volksrecht" aperis artikolon kiu favore pritraktas nian movadon.

++.La administrado de la Informilo serĉas redaktantoj kiuj ne postulas tro altan

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso:

Markesteenweg, 18, Kortrijk

N°17
Februaro
1931


MERKREDO, 4-an de marto 1931, monata kunveno en "De Tuin" Yzerweglaan, je la 8-a.

Vanaf 4-n maart, wordt opnieuw iederen woensdag, te 8u. bijeenkomst gehouden in het gewoon lokaal.

---

Dimanĉe, 1-an de marto, je la 4-a posttagmeze, la grupo organizos feston okaze de la fino de la publika kurso, en kafejo "De Tuin", Yzerweglaan.

La estraro faris multe da kostoj por havi agrablan programon; neniu do povas forresti kaj ĉiu devas montri per sia ĉeesto ke almenaŭ unu fojo po jare, li rememoras ke li estas esperantisto; la horo estis tiel fiksita ke tiuj kiuj kutime grumblas ke ni komencas tro malfrue, povus retrovi sian liton je deca horo.

Por la geseriozuloj okazos deklamado kaj kantado kaj por la gejunuloj poste dancado.

Ĉar ni celas propagandan feston, ĝi estos plejparte flandralingve, sekve vi povas propagandi ĉe viaj najbaroj kaj konatoj; estos ankaŭ familia festo, oni do povas alporti infanojn, edzinon kaj bopatrinon.

Ni rekomendas al tiuj kiuj deziras sidlokon ke ili venu ĝustatempe, ĉar la partopreno ŝajn anoncas kiel kolosa.

---

:-:-Ĉar detala represo de la kontoj 1930 necesus tro multe da spaco, ili ne estos represitaj en la Informilo, sed estos je dispono de la interesuloj dum la venonta kunveno.

---

:-:-La 6-an de februaro okazis kunveno de la estraro por ekzameni la kontoj de la kasisto. Pro manko de tempo, la kasisto S-ro Vanbiervliet prezentis sian eksiĝon kiel kasisto sed li daŭre funkcion kiel estrarano.

La estraro indikis S-ron Misscheert kiel anstataŭanto; de nun li sekve prenas la titolon de sekretario-kasisto.

:-:-Dum tiu sama kunveno la estraro ankaŭ priparolis la eblecon por festi en 1932, la 5-an datrevenon de la fondiĝo de la grupo.

Pri tio estos informata dum la monata kunveno kia estas la opinio de la grupanoj pri tia festo, kaj ĉu eventuale en la kadro de tiu festo, Flandra Ligo Esperantisto povus organizi sian 3-an kongreson.

Estas nur principa demando ke faras la estraro, por ke ĝi povu poste ekzameni detale tio estas farebla. Por tiu punkto ni esperas je ĉies ĉeeston.

---

:-:-Dum ĝia kunveno de la 23.2.1931, la urbkonsilantaro, kiel pasinta jaro, unuanime voĉdonis subtenon de 1.000 frankoj por nia kurso. Dankon !

---

:-:-Je Pentekosto, la 24-25an de majo 1931, okazos en Aalst, la 2-a Flandra Kongreso de Esperanto. La tiea grupo insistas por ke la partoprenontoj sin anoncu sufiĉe frue, unue ĉar loĝado ne estas tiel facila ol en granda urbo; due por faciligi la laboron al la kongreskomitato.

:-:-La Grupo Aalst eldonis sigelmarkoj por reklami sian kongreson. Ili kostas 5 fr. por cent kaj estas haveblaj ĉe nia grupa butikisto.

:-:-Oni nun klopodas multe por enkonduki Esperanton en la lernejojn. En Berlino oni organizis kurson laŭ Ĉe-metodo, al kiu partoprenis ĉirkaŭ 100 geinstruistoj. Estis organizita dua kurso, kiun partoprenis denove 90 geinstruistoj. Laŭ decido de la Berlina urbestraro, Esperanto-kursoj laŭ Ĉe-metodo komencos en 25 lernejoj.

:-:-La Internacia Foiro de Lyon, okazonta 2-15an de marto 1931, denove eldonas Esperantajn broŝurojn, afiŝojn, poŝtkartojn, flugfolietojn, k.t.p. Tio pruvas ke nia lingvo utilas kaj estas jam multe uzata de diverslandaj komercistoj. Ankaŭ la Internacia Foiro de Leipzig multe reklamas por Esperanto. La nombro de korespondaĵoj senditaj al grandaj internaciaj foiroj pruvas ke nia lingvo estas jam sur la kvara loko, post la angla, franca kaj germana. Ni esperu ke ĝi baldaŭ estos sur la unua!

:-:-En 1828, la lernejestraro en urbo Lancaster, usona ŝtato Ohio, ricevis peton por uzi la lernejojn por debatoj. La lernejestraro respondis jene:

"Ni havas nian aprobon por uzi la lernejon, por debati ĉiujn taŭgajn proponojn, escepte fervojojn kaj telegrafojn, kiuj estas malebleĉoj kaj montras fortan malkredemon. En la Biblio ne estas dirita io pri tio. Se dio intencis, ke liaj kreitaĵoj veturu je la danĝera rapideco de 15 mejloj (54 km.) pohore per vaporpovo, Li klare estus antaŭdirinta ĝin per Siaj sanktaj profetoj. Estas allogilo de Satano por konduki senmortajn animojn malsupren en la inferon".

:-:-Post la 23-a universala kongreso kiu okazos en Krakovo, dum aŭgusto venonta, estos malkovrata monumenton je honoro de D-ro Zamenhof. Multaj da kongresanoj el ĉiuj landoj

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso :
Markesteenweg, 18, Kortrijk

N° 18
Marto
1931

MERKREDO, 1-an de aprilo 1931, monata kunveno en "Te Tuin" Yzerweglaan, je la 8-a.

---

Malfrue la grupo sciiĝis pri konferenco kiu okazos en la urbdomo, dimanĉe 12an aprilo, kie parolados S-ro Vanverts, por la loka societo de kuracistoj.

S-ro Vanverts, profesoro ĉe la universitato de Lille, eminenta kuracisto, estas fervora esperantisto kaj gvidanto de la "Medicina Revuo".

La grupo ekzamenos la eblecon por aranĝi bonvenigon, eĉ se estus nur por du minutoj.

+++++Dimanĉe, 26an de aprilo, okazos en Aalst ekzameno pri Esperantokapableco. Enskribojn oni povas doni al S-ano Debrouwere. La kostoj estas 10 fr.

+++++La kongreskomitato de Aalst, insiste petas la partoprenontoj ke ili trafu decidon kiel eble plej tuj, pri loĝado kaj festeno. Ne malfaciligu la prepara laboro per malfrua aliĝo !

+++++Enskribiĝis kiel honora membro de nia grupo, S-ro Lehmann, estro de la magazeno "Ville de Paris".

La estraro de la grupo dankas ĉi tie la fraŭlinon kiu varbis S-ro Lehmann je profito de nia kaso kaj esperas ke tio servos kiel ekzemplo por la aliaj grupanoj.

+++++Subteno por la flago : antaŭe fr. 403,00; profito de la festo de 1.3.31, 83.00 ; Verfaillie 3.00; S-ro Lehmann 50.00; Entute : 539.00 frankoj.

Ĉu la sumo estos sufiĉe granda por aĉeti flagon la venontan jaron ? Ni esperu !

+++++Sekve al letero sendita de la grupo al la radio-stacio Lille P.T.T. pro la Esperanto dissendoj kiuj estas aŭskultataj de multaj samideanoj, la radio parolanto dankis per la aervojo la membrojn de la grupo kiuj faris tiel fruktedonontan kuraĝigon al la stacio.

Plie, sekvis dankkarton de la parolinto, S-ro Trottin, el Lille, kiu esprimas sian kontentecon pri la letero. - Ni esperas ke la izolaj esperantistoj radio-amatoroj same ne forgesos fari sian devon.

+++++Niaj geamikoj certe konservos longe bonan rememoron pri la festo kiu okazis la 1-an de marto, por fermi la publikan kurson.

Okazis kelkaj mankoj, sed konsiderante ke estis la 1-a festo organizita de la grupo, ni rajtas esti kontentegaj pri la neesperitaj rezultatoj. Neniu esperis pri tiom da ĉeestantoj kaj malgraŭ ke ni estis iom superŝutitaj ĉio tamen bone ordiĝis.

La muzikistaro kontentigis ĉiujn kaj per sia kvanto da ekzekutantoj sankciis ĉe la eksterstarantoj la reputation ke la Esperantista grupo estas atentinda kaj forta societo.....La mondo estas nun tiel farita ke ĝi postulas eksteran lakon pli ol idealistaj formuloj, antaŭ ol doni civitanecon al novaj ideoj !

Kaj kion diri pri la monologo de F-ino Julnjo? Ŝi lernis tiom fervore por prezenti kun sia amiko honorindan teatraĵeton, sed la kvanto da spektatoroj perdigis al ŝi iom de sia certeco; tamen la provo montris ke kun iom da ekzerco estus fareble el ĝi bonega dramatika artistino.....;ĉu ne ?

Devis ankaŭ esti prezentata la tragedio "Adamo kaj Evo" sed ĉar en ĉi tiu sezono la folioj ne jam estas sufiĉe grandkreskaj, tiu numero devis esti prokrastita; estis ja eble uzi verdajn stelojn anstataŭ foliojn, sed pro konvenajn kialojn tiu rimedo ne estis akceptita.

Ankaŭ la loterio montris la sekvindan vojon por organizo de festo, ne farante tro grandajn ĉerpojn el la kaso. La verdstelan kusenon gajnis studento; ĉu povis esti pli bone? Certe ne; estis feliĉa destino kiu faris bonvenan donacon al tiu junulo; vere kio estas pli agrabla post laciga studado ol dolĉe ripozi sian dolorantan kapon, danke pri la samideaninoj kiuj tiel boni sciis disvendi la lotojn !

Fine dankon al la francaj kaj al la eksterurbaj gesamideanoj kiuj provis sian solidarecon per ilia ĉeestado.

Por fini, dankon al ĉiuj helpintoj kaj eble ĝis baldaŭa refaro !

+++++La unua kurso de Esperanto, organizita en Meenen, finiĝis la 22an de marto 1931. La sukceso superis ĉiujn esperojn, precipe ke antaŭe ne ekzistis aŭ okazis agitado por Esperanto en tiu urbo.

Fondiĝis grupo, kiu elektis S-anon K.Depypere kiel prezidanto; pli bona elekto ne povis esti farita kaj ni estas konvinkitaj ke nia amiko Depypere sukcesos gvido la grupo laŭ lerta maniero. Vivu nia nova kolego ! Li ampleksiĝu rapide ! Tia estas la kora deziro de la Grupo Kortrijk.

+++++Nia amiko Vanfleteren, delegito de U.E.A., donis por represo alvokon pro aliĝo al Universala Esperanto Asocio. Ĝi aperos la venontan monaton, ĉar la raporto pri la festeto prenis la disponeblan lokon. Tamen ne atendu ĝis tiam por membriĝi !

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso:
Markesteenweg, 18, Kortrijk

No 19
Aprilo
-1931


Merkredo, 6an de majo, 1931, MONATA KUNVENO en "De Tuin" Yzerweglaan, je la 8-a.

=====================================================================

Mortis la 4.5.31, en Kortrijk, la bofrato de S-ro Steelant, ĉe kiu la grupo faris viziton en Gent okaze de la kongreso en 1929. La enterigo okazos Ĵaŭdon, 7an de majo. La estraro de la grupo invitas ĉiujn gemembrojn por ĉeesti la funebran diservon, kiu okazos je la 9a, en la preĝejo St. Rochus.

-----------

+++++La belga ministerio de sciencoj kaj artoj, dissendis oficiale al la mezgradaj lernejoj gazeteton: "De Jeugd en de Wereldvrede" por disdono inter la lernantoj. La gazeto enhavas artikolon pri internacia lernejkorespondado pere de Esperanto, kaj ankaŭ bildon de la Esperanto-Domo en Arnhem (Nederlando), kie la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, fondos Internacian kulturan centron, renkontejon de ĉiuj nacioj.

Tiel ni notas neesperitan taŭgan kaj oficialan propagandon por nia movado. Paŝo post paŝo ni antaŭeniras, malgraŭ la atakoj de kontraŭuloj.

+++++Laŭ ricevitaj informoj jam sin enskribis por la kongreso en Aalst: 5 francoj, 4 germanoj kaj 2 anglinoj; iĝos do vere internacia kongreso!

+++++La ekskurso de niaj grupanoj al Aalst sin anoncas amuza. Amiko Petro, kiu estas ĉiam preta sin oferi, proponis kunporti sian "tirsakon" por agrabligi la vojaĝon. Unuanime, ĉiuj certe ekkrios: Vivu ~~amiko~~ Petro!

+++++La 26an de aprilo okazis en Aalst Esperanto-ekzameno, organizita de Flandra Esperanto-Instituto. La enskriboj sin ciferis je 18 el kiuj 17 efektive partoprenis. La venontan jaron okazos la ekzameno en Kortrijk. Necesas ke jam de nun oni sin preparu!

+++++Laŭ informo represita en "Heroldo de Esperanto", la mondvojaĝanto E. Maguire el Aŭstralio, trapasis Novi-Sad (Jugoslavio) la 23.3.31.

+++++Subteno por la flago: Antaŭe 539.00 fr.; Vanroye 8.00 - Cognie Alb. 2.00 - Bassleer 2.00; -entute: 551.00 fr.

+++++Ankaŭ la nova verko de E. Remarque: "La vojo returne", aperos en Esperanto. Do gesamideanoj, kiuj interesiĝas pri la libro, ne bezonos ĝin aĉeti en sia nacilingva eldono, sed prefere atendu la aperon de la esperantlingva libro. La nova romano de Remarque estas kvazaŭ daŭrigo de la unua. Ĝi pritraktas sian vidpunkton kontraŭmilitan.

---

Speciala ĉapitro je intenco de la komencantoj kaj la malfervoruloj

-----------

La vivo nek staras nek haltas: por esti vere vivanta, ankaŭ vi ne staru, ne vegetu. Kiam planto ne plu kreskas, ĝi jam ekvelkas. Tiel en Esperantujo: vi devas aŭ progresi aŭ malprogresi; do, zorgu, ke vi ne malantaŭeniru!

Eble vi enuas, la cerbo eble lacas (pro tro severa studado oni esperas, sed ne kredas), kaj vi imagas, ke post kelkmonata ripozo vi povos pli energie ataki esperanton. Jes! sed de la komenco; ĉar, se vi atendos tro longe, forlasos vin via pene akirita scipovo. Eble vi estas krome tro okupata, kaj lasas portempe tian bagatelon. "Poste", vi diras, "mi denove studos esperanton serioze kaj profiteme". Tempo flugas, aliaj interesoj intervenas, kaj esperanto estas tute forgesata.

Tiam, iun tagon aperas fremdulo, portanta sur la brusto la verdan stelon, insignon, kaj ĝoje li salutas vin (pro via insigno, kiun vi forgesis forigi, aŭ kiun vi portas pro parademo). Kaj kion vi diros? vi certe komencos, aŭtomate per "Bonan tagon, S-ro", sed post "ne tiel rapide...mi ne tute... mi tute ne... k.t.p." vi flustros "ĝis la revido" kaj marŝos for en ruĝiĝa konfuzo!

Ne atendu tian malfeliĉaĵon! sed atentu nun, prizorgu vian lingvoscion! Ekzercadu ĝin per parolado dum la semajnaj kunvenoj; ŝparu la titolon "segilo" kiam oni vin vokas al esperanto-parolado, por pli gustaj okazoj... kaj tiel, ankaŭ vi, kara leganto, plej multe profitos el la grupaj kunvenoj kaj ankaŭ vi povos interrilati kun la fremdaj gesamideanoj, kies viziton ni atendas okaze de la kongreso kiu okazos ĉe ni la venontan jaron.

Ĉu vi promesas apliki la suprajn konsilojn? Dankon antaŭe!

------------

+++++Estos tre utile ke ni ĉeestu kiel plej multnombre al la kongreso en Aalst, por ekzameni kiel ni devos labori por sukcesigi la nian. Ni atendas por plej malfrue venontan merkredon, la aliĝilojn.

+++++La 12an de aprilo, posttagmeze, la grupo bonvenigis D-ron Vanverts el Lille, kiu venis al Kortrijk por prefesia parolado. Kiel kutime, la vicprezidanto faris la

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?

Abono senpage por niaj grupanoj.

Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :

**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

n°20

Majo

-I93I-

Merkredo, 3an de Junio I93I, ĝenerala monata kunveno, je la 8a, en "De Tuin" Yzerweglaan.

Tagordo :

Organizo de la 3a Flandra Kongreso de Esperanto kaj festo de la 5a datreveno de la starigo de nia grupo.

---

+++ Dum unu el la lastaj ŝemajnaj kunvenoj estis decidita ke la grupo aĉetus nigran tabulon kaj organizus perfektiĝan kurson ĉiun merkredon. Ni esperas ke tiu kurso povos komenci post 2 semajnoj; estos samtempe bona preparo por la venontaj ekzamenoj.

+++ Por la flago: antaŭe 55I.oo fr. B.Bassleer I.; E.Decraene 2.; Antoine,Julien,Mariette, 3.; malriĉulo faras laŭ sia povo I.75.; entute : 558.75 fr.

+++ Al la nuna "Informilo" estas aldonita varbilo por nia festo kaj por la 3a Flandra kongreso de Esperanto, kiuj okazos je Pentekosto I932. Tiuj varbiloj bone taŭgas por aldoni al viaj korespondaĵoj. Je demando pliajn estas haveblaj.

=====Viaj amikoj kiuj ĉeestis la kongreson en Aalst, certe ne plendos ke ĝi ne estis agrabla kaj fruktedona laŭ ĉiuj vidpunktoj. La kvanto da alilandaj partoprenantoj ĝin faris kvazaŭ internacia, kaj nigrulo zorgis ke ankaŭ ĝi aspektis interrasa.

Jam sabate alvenis tuta karavano da kongresontoj, kio vekis multe da intereso ĉe la Aalstanoj,kiuj ne kutimas vidi en ilia urbo tiom da fremduloj. Vespere okazis kant- kaj dancfesto kium kiu interkonatiĝis la gesamideanoj; ĉiam estas tre agrabla ree vidi esperantistojn jam antaŭe renkontitajn.

Dimanĉe matene,post la diservo,okazis akcepto en la urbodomo,kie la urbestro persone bonvenigis nin; je la nomo de la fremduloj dankis franca militblindulo kaj la nigra samideano; ambaŭ paroladoj,kaj precipe tiu de la blindulo,multe impresis la ĉeestantojn.

Kunveno de "Flandra Ligo Esperantista" kunigis ĉiujn kaj montris iasorte "tutvidaĵon" de la amaso da partoprenantoj. Antaŭ 2 jaroj neniu certe estus kuraĝinte antaŭdiri tian sukceson por la kongreso de flandraj esperantistoj!

Ĉu ni priskribos la komunan festenon ? Regis en la salono tiom da varma entuziasmo, (la bona vino instigis al multaj honortrinkoj) ke baldaŭ eksonis ĝenerala kantado, dum kiu la samideana trinkkanto ĝuis la plej grandan sukceson.

Por pluraj motivojni ne multe diros pri la balo,ĉar diversaj geamikoj demandis ke ni ne diru al siaj gepatroj ke ili dancis ĝis la 3a mateno;pro tiuj kialoj ni do silentos.

El la dua festotago la plej amuza memoraĵo estos sen ia dubo la aŭtobusa veturado al Overmeire; precipe la fraŭlinoj laŭdis la bonegajn sidilojn sed ankaŭ pri tiu iom delikaĵa punkto estas preferinde ne doni tro da klarigoj; nur, ni bedaŭras tiujn kiuj ne estis kun ni.....

Kaj la ĝenerala impreso? Demandu nur al tiuj kiuj antaŭ 4 jaroj ĉeestis la nacian kongreson en Gento ! Regis la plej amika kaj samideana sentoj. Pli bone la Aalstanoj ne estus povintaj aranĝi kongreson; ilia laboro certe estos rekompencata per akiro de novaj gemembroj.

=====La lan de Junio I930,la registaro de l'Princlando Liĥtenstejno elvenigis serion da oficialaj poŝtkartoj kun bildoj de la lando kaj klariga teksto en germana lingvo kaj en Esperanto. Tiuj ĉi kartoj trovis multan atenton en la tuta mondo,precipe pro ilia impresa aspekto.

La registaro de la Princlando Liĥtenstejno ne eldonis la kartojn pro nure ideala intereso pri la hulplingvo,sed pro tute reala kaŭzo. Ĝi celas fari efikan turisman propagandon. Akceptante la proponon uzi esperanton,ĝi evidente estis informita pri la utileco de Esperanto kiel propaganda helpilo. Fakte la Esperanto-movado disponas nuntempe pri rete da kunlaborantoj kaj pri internacia individua rilataro,kiajn certaj malgrandaj ŝtatoj eĉ ne posedas aŭ certe ne povas efikigi per simile simplaj rimedoj.

La registaro de Liĥtenstejno kalkulis pri konstatebla rezultato. Restis la tasko igi videblan tion.

Artikoloj pri Liĥtenstejno en diversaj Esperanto-gazetoj,i.a. en "Heroldo de Esperanto", kaj distribuo de prospekto en Esperanto pere de "Esperanto" de UEA preparis la kampon inter la esperantistaro. Al tio sekvis dissendo de individua cirkularo al la naciaj societoj,la regulaj kunlaborantoj de ICK kaj al elektita nombro de delegitoj de U.E.A.

La finrezultato de tiu propagando estas 355 eltranĉaĵoj en 38 lingvoj el 4I landoj (I5 ekster Eŭropo)! Ĉu tio ne estas impona praktika demonstracio?

=====La Soveta registaro denove eldonis 2 poŝtmarkojn kun esperanto-tekste; ili valoras I kaj 7 rublojn.

=====Dum la jaro I929 okazis per radio I743 sendoj en kaj pri Esperanto. La statistiko certe ne estas kompleta ĉar multaj esperantistaj Radio-parolantoj ne sendis detalajn

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.
Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso :
**Markesteenweg, 18, Kortrijk**

nº 21
Junio
-1931


...rkredo,la 1an de Julio 1931,ĝenerala monata kunveno,en de Tuin,je la 8a.

Dum la lasta ĝenerala kunveno,nia amiko Mark Bakisto,faris grandioza ...oterion. - Malbone intencitaj personoj perfide flustris ke ĉar sia ...ianĉino lin forlasis,pro doloro li nun forlatumis sia tutanmeblaron ! ...i preferas ne kredi tiujn dirojn,sed kio estas certa, estas ke amiko Mark ...ikoltis multe da sukceso; kvankam la loterio estis senpage,tamen en la ...aso por la flago enfluis 52,50fr... Inter la feliĉaj gajnantoj estis ...ankaŭ la granda bakisto. Vivu la bakistoj !!!

Ĉi-sube troviĝas la programo de la dua parto de la festo organizota per ...a S-ro Mark Bakisto :

Parolado: M.Devolder

...rezentado al la Esperantistaro de la nova grupo "Esproko" per M.Devolder.
...oterio laŭ amerika maniero.
...urprizo por la sinjoroj
...urprizo por la sinjorinoj kaj la Fraŭlinoj.

En la nomo de la Esproko-Estraro: Mark Devolder.

Ciuj esperantistoj el Kortrijk kaj ĉirkaŭaĵo certe volos ĉeesti kaj ...laŭdi S-ro Direktoro de La Esproko.

Eniru! Eniru! Senpaga eniro! La 8-an miraklon de la mondo vi vidos!

---

...Marlo Debrouwere Dankas elkore la esperantistoj kiuj gratulis siajn ...epatrojn.

La grupo ankaŭ gratulas gesinjorojn Bossuyt,kiuj same zorgis por ke la ...rupo ne formortu.

Kie restas la aliaj ?

....Por la flago: antaŭe 558,75, festo Mark 52,50; Mark o.50; Juliano o.50 ...ntute : 6II,25 fr.

....S-ro Bulthuis El Hago,kiu tradukis la verkon "La Leono de Flandrujo" ...endis binduitan ekzempleron dediĉitan al la Urbo.

....Dum la lasta kunveno estis priparolita la ĝenerala aranĝo por la ...onta kongreso. Provizora komitato estas formita el S-roj: Misschaert ...nerala sekretario, por la propagando G.Debrouwere, por la festeno ...ro Steelant; por la loĝado S-roj Vanfleteren, Steelant & VanIseghem, ...or la festo S-roj Delbaere & Reynaert. S-ro Bassleer kontrolos la ...neralan aranĝon.

---

La plej bona lingvo.

Sepjara holanda knabo Diĉjo lernas en la lernejo pri la geografio. La instruisto klarigas pri la multnombro da diversaj landoj kaj diras ...e oni en ĉiu lando parolas alian lingvon,ke la homoj el unu lando parolas ...lian lingvon;ke la homoj el unu lando ne povas kompreni la homojn el la ...ia lando.

Diĉjo rimarkigas,ke en Holando oni parolas plej bone,ĉar tie oni povas ...mpreni unu la alian.

---

...al la koko kantas kun fermitaj okuloj ?
Ĉar ĝi scias sian kanton parkere.

...al,se doktoro malsaniĝis,li alvokas alian doktoron ?
Ĉar li ne volas esti memmortiganto.

---

En lernejo.

...nstruisto: Tradicia nomiĝas tio,kio estas transdonata de generacio al ...eneracio,de patro al idoj. Nu,donu ian ekzemplon!
...rnanto: Mia pantalono.

---

Bona aspekto.

...a: Ĉu ne ŝajnas al vi,knabinoj,ke plenbarbo plibonigas la aspekton de mia fianĉo ?
...: Jes,ĉar lia vizaĝo estas malpli videbla.

---

En la stacidoma restoracio.

...elnero,kial mia porcio estas multe pli malgranda ol tiu de l'sinjoro?
...ar via vagonaro forveturas kvin minutoj pli frue!

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj? Abono senpage por niaj grupanoj. Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso: Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

n° 22 -
Julio
Aŭgusto
1931.


Merkredo, 2-an de Septembro 1931, je la 8a vespere, okazos en "De Tuin" la kutima ĝenerala monata kunveno. Ni insiste petas ke niaj membroj kiuj estas malhelpataj veni ĉiun semajnon al la kunveno, ke ili ne preterlasu veni al tiun kunvenon.

---

Okaze de la pilgrimado al la Izero en Diksmude la 23an de aŭgusto, estis organizita en tiu urbo renkontejo; pro malbona indiko de la adreso oni ne sin trovis. La venonta jaro ni zorgos ke tio ne plu okazu.

+++Dum la lastaj semajnoj la kaso por nia flago ricevis sufiĉe notindaj subtenoj. Se tiel daŭros post mallonga tempo no kapablos aĉeti belegan flagon. Dankon precipe al Markus kiu per loterio zorgis por la grasa parto.
Antaŭe: 611,85; loterio 185.00; anonima bonfaranto 25.00; kolekto 7.00; A.Delbaere 1.00; Vanlseghem 4.25. Entute: 833,50 fr.
+++Subteno por la kaso: Roger B. 3.00; Albert D. 1.00

---

+++Ĉi tiun jaron la UEA kongreso okazis en Krakow (Pollando) Enskribiĝis 900 personoj kaj partoprenis 700.

Dum la kongreso estis parolata pri la temo "Kiel propagandi pli efike? -ĉu Esperanto progresas? " - El la raporto kiu aperis en Heroldo de Esperanto, ni ĉerpas jenon : Komparante la nunan staton de Esperanto kun la malnova, oni devas diri ke la progreso estas mirinda. Pli frue esperantistoj propagandis ĉefe de persono al persono. Eĉ hodiaŭ persona propagando estas la plej bona. Cetere ekzistas diversaj manieroj de propagando; sed la propagando estu ne teda sed interesa. Ofte oni propagandas en rondoj kiuj neniel bezonas Esperanton. Taŭga propagando ekzemple estis inter la tramistoj kaj policanoj de Krakovo. Necese estas ke oni spirite enpenetrigu la ideon de lingvo internacia ĉe la personoj, kiujn oni deziras gajni por Esperanto i.a. ankaŭ ĉe la edzinoj de esperantistoj, ĉe kolegoj, k.t.p.

Oni devas ankaŭ labori racie kaj trovi la ĝustan vojon. Ni ne agu en kiu ajn kampo sen sufiĉa preparo, sen profunda studado.

+++En Londono okazos kunveno de anglaj optikistoj. En la kongreso okazos speciala Esperanta ekspozicio kaj konferenco pri aplikado de Esperanto al scienco, ĉiu kiu estos reprezentataj Esperantaj organizaĵoj. La paroladoj estos parte en angla kaj parte en Esperanta lingvoj.

+++Internacia Kongreso de Stenografio okazis en Parizo, de la 3a ĝis 7-a de aŭgusto. La organiza komitato aranĝis internacian ekspozicion, en kiu tri fakoj estis speciale rezervitaj por Esperanta stenografio. Plie ĝi organizis internacian konkurson de Esperanta stenografado kaj rezervis fakan kunvenon por la ĝenerala kunveno de Internacia asocio de la Esperantistoj-Stenografistoj.

+++De 7-15.9 nunjare okazos en Budapest internacia kongreso de turistoj, al kiu la organiza komitato deziras inviti ankaŭ la esperantistojn turistojn kaj volonte faros invitilojn, presaĵojn, programojn en Esperanto, se montriĝos interesiĝo. Car en ĉiuj landoj estas miloj, kiuj ekskursas, la afero estas grava kaj subteninda.

+++La 26-an de Julio okazis en Boulogne-sur-mer kongreso de la Nordfranca Federacio. Ĉe estis 220 kongresanoj, inter kiuj 20 eksterlandanoj. La inaŭguro de la placo Zamenhof estis prezidata de S-ro Deligny el St.Omer, prezidanto de la federacio, kiu rememorigis pri la interkonatiĝo kun Zamenhof, kiu venis Bulonjon en 1905 por prezidi la 1-an Kongreson de Esperanto. La urbo estis ornamita per la esperantistaj emblemoj kaj multaj komercistoj flirtigis girlandojn kun la verda standardo.
Al la organiza komitato sendis salutleteron nia grupo kaj F-ino Terryn kunportis prospektojn por nia festo de pentekosto 1932.
Ni esperu ke nia kongreso tiel bone sukcesos kiel tiu de niaj francaj amikoj.

+++En Krakow ekzistas mezgrada lernejo por ŝtataj oficistoj en servo de administracio, fervojo, poŝto, telegrafo kaj ankaŭ en la kooperacioj. En la jaro 1931/32 estas enkondukota en la programo de l'instituto deviga lernado de Esperanto po unu horo ĉiusemajne dum la tuta jaro.

+++La komitato de la 2-a laborista olimpiado en Wien plej vaste uzis Esperanton kaj la servojn de laborista Esperanto-organizo por varbado kaj disvastigo de sia aranĝo. Ankaŭ el nia lando partoprenis esperantistaj sportistoj.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso:
Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

n° 23
Septembro
1931


Merkredo, 7-an de Oktobro 1931, je la 8a vespere, ĝenerala monata kunveno en "De Tuin"

+++Kelkaj samideanoj ne jam pagis sian kotizon por 1932. Car la kaso estas tute malplena, ni afable petas por baldaŭa reguligo de tiu neregula situacio.

+-+3 samideanoj, post grupkunveno, perlaboris kiel atestantoj ĉe notario 5 frankojn da trinkmono kaj malavare (!) donacis ilin por la flago. Do entute jam 838,50 fr.

--+IMITINDA EKZEMPLO POR CIUJ ESPERANTISTAJ GRUPOJ.

Ne nur la Soveta registaro havas kvinjaran planon. Laŭ la "Bulteno de Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio" S.E.U., ankaŭ la rusaj esperantistoj fiksis jaran planon laŭ kiu la esperanto-movado devas disvolviĝi.

Certe ankaŭ por niaj legantoj estos interesa scii kiel la rusoj antaŭenpuŝas Esperanton en sia lando.

Laŭ decido de Centra Komitato de SEU plano por varbado dè 10.000 membroj al SEU devas esti plenumita dum la daŭro de unu jaro. La Bulteno indikas ke la 30an de junio la varboplano estas plenumita rilate aktivajn membrojn je 41.3 %. La Kartvelia organizaĵo de SEU jam superplenumis la planon realiginte 103.5 % de la tasko.

Ne sufiĉe laboras la esperantistoj el Niĵni-Novgoroda kaj Mez-Volgaj landoj, kiuj plenumis nur 25.3 % de la plano. La komitato tute ne dolĉe traktas la mallaboremulojn kaj presliteroj ĝi anoncas: "En jenaj organizoj hontinde stagnas la varbado".

Ĉu ankaŭ ni ne provus fari la samon en Kortrijk? Ekzemple ni diru al niaj gemembroj: "En via strato loĝas 150 personoj; ni verkis planon laŭ kiu vi devas varbi el ili almenaŭ 50 por la grupo, kaj se vi ne sukcesas, vi estas hontinda mallaboremulo!...."

Ni iom dubas pri la rezultoj sed se tamen iu volas provi la grupestraro donos honormedalon se li sukcesas...

+++Sciiĝinte ke samideano, S-ro Karl Schmidt, el Bochum (Germanujo) intencas viziti Belglandon per faldboato kaj ke li faras lumbildparoladojn, pri la faldboatsporto, la grupo decidis inviti S-ron Schmidt por vizito kaj parolado je intenco de niaj gegrupanoj. S-ro Schmidt jese respondis kaj alvenos Sabate, 24an de oktobro, la parolado okazos dimanĉ e. - Detaloj ne jam estas fiksataj sed poste ni komunikos ilin al niaj gemembroj. Al la parolado ankaŭ estos invitataj ĉiuj esperantistoj el la najbareco. Ni esperas ke ĉiuj esperantistoj ŝatos ĉeesti tiun kunvenon.

Jen ~~ekst~~ eltiraĵo de artikolo de S-ro Schmidt, kiu aperis en "Heroldo de Esperanto":

Mi kredas ke mi devas skribi ĉi tiun mallongan rigardon, por fari pli bone komprenebla mian migrademon. Jam de post mia infaneco instigas min tiu ĉiopova potenco al aventura vivo, kaj ankoraŭ nun mi devas sekvi ĝian vokon. Mi ankoraŭ nun ĉiam migras.

Survoje mi trovis homojn, kiuj ĉiuj havas la samajn vivozorgojn, kiuj suferas la samajn vivomizerojn. Tamen ili ne kontraŭas kune kaj unusente tiujn mizerojn. Diversajn malhelpaĵojn estas kaŭzo de ĉi tiu situacio. Unu el la plej grandaj, kiuj malhelpas la homojn esti unusentaj, estas la multvariaj lingvoj. Tial la homoj ja sonĝas jam dum jarmiloj pri lingvo, kiun povas kompreni ĉiu. Tiu jarmila sonĝo de la homaro nun realiĝas per la grandioza kreaĵo de D-ro Zamenhof, per Esperanto. Sed multaj homoj ankoraŭ ne scias pri Esperanto, aliaj ne konas ĝin aŭ ankoraŭ ne aŭdis paroli Esperante.

Dum miaj migradoj mi renkontis multajn homojn. Mi devas paroli kun ili pri "de kio" kaj "pri kien", pri la kaŭzo kaj pri la celo de miaj vojaĝoj. Tio estas bona propagandokazo por Esperanto, kaj tial mi decidis varbi per miaj vojaĝoj.

Mi migras per faldboato, kiu pro sia speciala misio estas baptita en kunveno de nia loka grupo en Bochum je la nomo "La verda stelo".

Krom per la boato mem mi ankoraŭ varbis per lumbildparoladoj. Mi parolas Esperante, kaj por la ĉeestantaj neesperantistoj oni kutime tradukas la frazojn en la nacian lingvon. Bona propagando por la aranĝoj estis ĉie la kunfaldebla boato, kiu en Nederlando estis ankoraŭ preskaŭ nekonata. Mi starigis la boaton en la salonon kaj montris tie antaŭ la parolado ĝian konstruon.

++++Por la propaganda kaso donacis: A.Sierens, Meenen, 10.00 fr.

----Ĉiam daŭras la edziĝoj en nia grupo. Post Palmer Misschaert nun estis la vico de Marcel Algoet. Al ĉiuj multan feliĉon kaj prosperon, sed ne forgesu Esperanton....!

++++Antaŭ kelkaj tagoj trapasis la urbon senlabora esperantisto, kiu de Berlino venis piede por serĉi laboron. Apenaŭ en la urbo li jam renkontis esperantistojn, kiuj tre serveme indikis la adreson de la grupo kiel.....informejo por senlaboruloj ?.

+++++Niaj publikaj kursoj rekomencos Merkredon, 4an de Novembro. Ĉiu helpu por la propagando !

// NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso:
Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

n° 24
Novembro
1931

Merkredo 3an de decembro 1931, je la 8a vespere, generala monata kunveno

---

Ten gevolge van het voorbereidend werk voor den cursus van Esperanto, is verleden maand de Informilo niet verschenen; om reden van het aanstaande kongres zal dit in het toekomende nog wel voorvallen.

Daarom herinneren wij aan iedereen, dat gedurende de wintermaanden, zoolang de lessen duren, slechts vergaderd wordt den 1n woensdag van elke maand.

---

Aan onze leden wordt herinnerd dat in den loop der maand april 1932 een exaam zal gehouden worden. Verleden jaar hebben zich te Aalst 18 personen aangeboden voor het exaam, Kortrijk moet minstens dit getal evenaren. Daarom wordt aangedrongen op ernstige bijwoning der lessen, die voor allen kunnen dienen als herhaling.

---

Het zal zeker niet noodig wezen te herinneren dat wij op de Sinxendagen 1932 ons vijfjarig bestaan vieren ! Het is voor verscheidene misschien meer noodig eraan te herinneren dat aangezien er vele vreemdelingen zullen komen, wij stellig rekenen dat al onze leden het flink zullen kunnen te woord staan in Esperanto. En gezien onze vereeniginging niet alleen dat noodig heeft doch ook geld om de feesten in te richten, hopen wij nog meer van vele nieuwe leden te kunnen inschrijven na de lessen. De bijdrage is maar klein maar door de vele leden helpt toch om door de wereld te geraken.

---

Je komenco de la jaro 1932 devas esti reelektata parto de la grupestraro. Estras nun: S-oj Mattelaer

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-oj Mattelaer, Debrouwere, S-ino Byltjauw, S-oj Steelant, Misschaert, Vanbiervliet | ĝis 31.12.31 | S-oj Delbaere, Verfaillie, Casier, Bossuyt, Vanfleteren | ĝis 31.12.32 |

La 6 unuaj do devas esti reelektitaj aŭ anstataŭataj. - El la 2a vico ŝajnas ke S-ro Verfaillie ne plu povas ĉeesti la kunvenojn ĉar li loĝas ekster la urbo.

Konsiderante ke en la daŭro de du jaroj ofte okazas ke iu ne plu povas plenumi sian oficon, ĉu ni ne ŝanĝus la statutojn per jara reelekto de ĉiuj estraranoj ? Jam de nun la gegrupanoj interdiskuti pri tiu punkto; la situacio estos despli klara kiam okazos la elektoj.

---

Por la flago, kvankam ne venis multe tamen venis iom. Palmer aldonis 1 belgo, do entute jam 843,50 fr.

Same, por la propaganda kaso venis 2 fr.

---

Svedujo - El la vojaĝstatistiko de S-ro Scherer.

El publika dankletero de S-ro Scherer al la svedaj samideanoj ni citas la jenon: Ŝajnas esti romano, mia notlibro. Ŝajnas esti mirinda sonĝo, la tuta monato de septembro. Sed ne estas sonĝo. Estas pura realeco ! Mi legas en mia statistiko jen aŭdu : 30 lokoj - 51 paroladoj (28 publikaj, 4 per radio. 12 internaj, 7 vojaĝrakontoj) Veturis per 56 diversaj vagonaroj, 61 aŭtomobiloj, 1 aeroplano; faris 8 ekskursojn, 14 urbvizitojn; kontaktis kun 30 Esp.-kluboj kaj 25 U.E.A.delegitoj; vizitis 25 redakciojn. Aperis proksimume 300 kontrolataj gazetartikoloj kaj anoncoj kaj sendube aliaj nekontroleblaj....

---

Unu kunveno po monato, ne estas multe, ĉu ne ?
Tial ĉu vi venos al la ĝenerala ?

---

Mogen wij aandringen om toch eens per maand al onze leden samen te zien?'Vergeet dus niet van komen, heden woensdag avond !

---

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
**Marckesteenweg, 18, Kortrijk.**

n°25

Decembro
1931


La Estraro de la Esperantista Grupo havas la plezuron inviti vin al la dancfesto kiu okazos en la etaĝa salono de kafejo "De Tuin" Sabato, 2an de Januaro 1932, je la 7 1/2 vespere.

*La Mondfama Samideana Jaz-bando*

prezentos por la unua fojo en Kortrijk, siajn plej belajn dancariojn !

Pro la ekonomia krizo, la festo estos senpaga. Do certe ĉiu volos partopreni. Devas esti granda amaso da ĉeestantoj; sekve ni demandas ke vi invitu ankaŭ viajn amik(in)ojn, ĉiuj estos bonvenant(in)oj !

> La Esperantista Grupo
> Kortrijk
> sendas al vi siajn plej korajn
> bondeziroj okaze de la Novjaro

Merkredo, 6an de Januaro 1932, je la 8a vespere, okazos ĝenerala monata kunveno, en nia kutima ejo "De Tuin".

T a g o r d o :

Elekto de la grupestraro .

Ni rec publikas la nomon de la personoj kies mandato finiĝas je 31.12.31 :
S-ino Byltjauw, S-oj Mattelaer, Debrouwere, Steelant, Misschaert, Vanbiervliet, Verfaillie.
Restas estraranoj ĝis 12/1932: S-oj Delbaere, Casier, Bossuyt, Vanfleteren.

Samtempe necesas ke ni nomu la komitatanoj por la kongreso. Ĉu vi jam pensis ke restas nur 4 1/2 monatoj kaj ke ne jam ekzistas komitato regule elektita ?

Ankaŭ estas konsilinde ke, kiel la antaŭaj jaroj, ni starigu ŝparkason por la kongreso; la tempoj fariĝas pli kaj pli malfacilaj kaj estus granda domaĝo se ne ĉiuj povis partopreni la feston.

Post la kurso okazos ekzameno de Esperanto. La enskribo kostas 10 fr. La diplomoj estos disdonataj dum la kongreso. Ni devas fiksi taŭgan daton por tiu ekzameno.

Konsiderante la gravecon de la punktoj pritraktotaj, ni insiste petas ke vi venu ĉiuj al la ĝenerala kunveno; estas ankaŭ ĝenerala devo.

---------------

S-ro Marcelino Domingo, ministro de publika instruado de Hispanujo, decidis ke la budĝeto de la ministerio enhavu la sumon de 50.000 pesetoj kiel subvencion al la Hispana Esperanto-Instituto, por starigi liberajn katedrojn de Esperanto pagatajn. Ci tiun promeson firme faris la ministro al parlamentano Francisco Azorin, nia samideano, kiu apartenas al la budĝeta komitato de la parlamento.

Certe la tutmonda esperantistaro konscios la grandegan gravecon de la decido de l'hispana ministro.

+++++La greka ministerio de la Kultoj kaj publika Instruado, per dekreto de 7.II.31 oficiale rekomendis la lernadon de Esperanto.

+++++V.T.B. publikigos en sia bulteno "Toerisme" kurson de Esperanto. La unua leciono aperos meze de Januaro. Estos granda propagando por Esperanto, precipe se ni konsideras ke tiu asocio nombras pli ol 100.000 membrojn.

++++Jam de kelka tempo oni ne plu aŭdas ion pri la esperanto-movado en Meenen, kiu tamen havis tiel bonan komencon. Cu oni lasos perdiĝi la jam faritan laboron? Estus vere domaĝo.

++++Se en Meenen la situacio ne estas ĝojiga, tamen el aliaj anguloj la vento blovas pli favore......

En Roesalare kurso malfermiĝos la 17an de Januaro. Ni opinias ke tie la bazo estas firma.

En Aarschot, kurso komencis antaŭ kelkaj semajnoj; en Oostende estas fervoraj samideanoj kiuj volas antaŭen; en Diksmude kaj Thielt per iom da bona volo oni ankaŭ povus atingi rezultaton; En Brugge restas pluraj sinceraj verdstelanoj sed ili sin opinias ankoraŭ tro junaj por komenci memstare.... verŝajne tro da modesteco; la estonto apartenas al la junularo !

② NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.
Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso:
Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

N° 26
Januaro
1932

S-ro L.Gillon, urbestro, akceptis la honorprezidantecon de nia jubilea kongreso !

La nombro da fideluloj kiuj antaŭ 5 jaroj helpis al starigo de nia grupo,ne plu estas tre granda. Diversaj kiuj en tiuj heroaj (!) tagoj brulegis pro sankta fajro de entusiasmo falis en ne komprenebla stato de letargio... ĉu la venonta kongreso ne reenblovos iom da vigleco ? Ni esperu !

Antaŭ 1927 la granda publiko tute nenion sciis pri Esperanto, neniam aŭdis la vorton Esperanto. La situacio ŝanĝiĝis tiom ke en Kortrijk neniu publika kurso sukcesas veki tiom da intereso ol esperanta.

La urbestraro rekonis la utilecon de Esperanto,subvenciante jare la esperantajn lecionojn kiuj okazas en la urbodomo mem.

===Ĉu iu atentis ke la decembra Informilo montris n$^{on}$ 25 ? Ankaŭ estas ia sorto da jubileo, kvankam modesta... tamen reprezentas sufiĉe granda sumo da laboro.

===La nova jaro sin anoncis plej amuza por la Kortrijk-aj geesperantistoj. La dancfesto en la grupejo fariĝis sukcesplena pro la nekomparebla samideana jazbando. Ni bedaŭras la forrestintojn! Vere,estis surprizo; neniam iu pensis ke inter niaj grupanoj estas tiaj artistoj... Floreton al tiuj kiuj meritas ! Dum la kongreso ili havos okazon montri denove sian spertecon.

- Ne forgesu | Merkredo,3$^{an}$ de Februaro<br>Generala Kunveno<br>je la 8a vespere, en "De Tuin" | Ne forgesu -

===La 6an de januaro okazis ĝenerala jarkunveno,dum kiu oni parte reelektis la estraron. Anstataŭ por dujara periodo,de nun la elektoj validos nur por unu jaro.

Estis reelektataj: S-oj Mattelaer,Debrouwere,Misschaert,Steelant,S-ino Byltiauw, S-oj Doornaert kaj Devolder.

La pasintan jaron estis elektitaj ĝis 31/12/32: S-oj Delbaere,Casier,Bossuyt & Vanfleteren.

Al la regularo estas aldonita: Estrarano kiu,ne informante,forrestas el 3 kunvenoj, sinsekvaj aŭ ne,estos anstataŭata.

===La sama kunveno distribuis la diversajn oficojn por la kongresa laboro.

Direktanta komitato: S-oj Steelant,Debrouwere,Misschaert,Vanfleteren,Bassleer,Cognie Alb. kaj S-ino Byltjauw.

Loĝado: E.Vandenberghe, Vanlseghem.

Festeno: Steelant

Muzika parto kaj teatraĵo: Doornaert,Esquenet,Misschaert P.

Diversaj afero: Devolder, A.Vandenberghe.

===BIBLIOTEKO.-54 librojn enhavas nun la grupa biblioteko. 14 estas akiritaj dum la lasta jaro. 25 pruntoj estas faritaj.

Rezultas el tio ke tute ne sufiĉe da Esperantistoj legas. Sekve,ĉu mire ke pluraj ne kapablas deĉe uzi Esperanton?

Okazon por pliperfektiĝi vi havas; kaptu ĝin !

===SPARKASO. Por plifaciligi partoprenon al la kongreso estas starigata ŝparkaso. La semajna kotizo estas almenaŭ 2 fr. kion kolektas amiko Antoine Cognie.

===POR REMEMORO.La 17an de Aprilo okazos ekzamenoj por simpla kapableco kaj por supera kapableco. Enskribo kostas 10 fr. Diplomdisdono okazos en la urbodomo,dum la kongreso.

===La kongreskomitato insistas ke oni ne atendu tro longe por enskribi sin por la kongreso. Ĉar kongreso ne ĉiujare okazos en Kortrijk, profitu la okazon por partopreni !

La komitato jam pluraj fojoj kunvenis kaj fiksis provizore jenan programon :

<u>Sabate</u>: Sonorilarkoncerto
Intima dancado en la akceptejo (samideana jazbando)
<u>Dimanĉe</u>: Diservo kun esperanta prediko
Oficiala akcepto en la urbodomo.
Generala kunsido de Flandra Ligo Esperantista,en la urbodomo
Festeno en la festsalono de la urba teatro (prezo 25.- inkluzive vinon)
En la urbodomo, teatraĵoj kaj koncerto
Vespere: ĝis la 2$^{a}$ matene,balon en la salono de la teatro.
<u>Lunde</u> Vizito al la urbo, monumentoj kaj muzeoj. Komuna demokrata tagmanĝo. (10 fr.)

La komitato atente zorgis ke la kostoj estu malaltaj; vi ne devos ĉerpi tro profunde en vian monujon... Partoprenu amase ! La kongreso estos filmata, pruvu se vi estas fotogenika !

Je Pentekosto 1932 pluvos geesperantistoj en Kortrijk !

# NIA INFORMILO

ESPERANTISTA GRUPO ESPERANTO ★ KORTRIJK

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

N° 27
–
Februaro
1932


Jaùdo, 25$^{an}$ de Februaro, okazis la lasta leciono de nia vintra kurso. Ĝis la lasta tago estis notata partoprenon de 40 gelernantoj; la nombro de finstudintaj estas do trè kontentiga; ĉe le grupanoj ni insistas por aktive varbi novajn membrojn. Konsiderante la kvanton da personoj kiuj venis al la kursoj, la grupo devus nombri multe pli da membroj. Kiu enskribiĝos la plej altan nombron da novaj membroj ?

=====Enskribòj por la Kongreso jam alvenis en tre kontentiga nombro, ankaù el eksterlando. Malgraù la malfavora ekonomia situacio estas antaùvidate almenaù 200 aliĝiloj. Certe estos unu el la plej bone sukcesintaj kongresoj, kun alloga programo kaj kostoj kiom eble plej malaltaj; la fervojadministracio konsentis 35% da rabato por individua vojaĝo al la kongreso; do por tre favora prezo estos eble partopreni la plej agrablan kaj interesan esperantistan feston de la jaro.
Despli oble ni estos despli samideana nia rondo ! Partoprenu kaj propagandu !

Nun ke la kurso finiĝis, denove la grupo kunvenos ĉiun merkredon.

*Merkredo, 2an de Februaro 1932, je la 8a vespere, en Kafejo "De Zwaan", Groeningelaan,*

ĜENERALA KUNVENO

*Ne forgesu veni - post nia Kurso estos kutime fari nombradon de niaj oficoj !....*

En "Esperanto" organo de Universala Esperanto-Asocio, aperis interesa statistiko pri la Esperanto libroj aperintaj dum la jaro I93I. - Estis eldonitaj II9 libroj kaj broŝuroj, sen presaĵoj malpli ol I6 paĝojn, kun aĉetvaloro de I.505 frankoj.
La nombro de l'paĝoj kune estas I0.950. La meza paĝonombro po unu libro estus do 80.
La meza eldon-nombro de esp.libroj estanta 2.000 kaj multobligante ni atingas 3.0I0.000 frankojn. Sumo pli ol respektinda!!!!!!
Konsiderante tiujn ciferojn, kiu ankoraù kuraĝas diri ke Esperanto ne gajnas terenon ?

=====S-ro Edmond Privat, redaktoro de la gazeto "Esperanto" profesoro ĉe la universitato de Genève, akompanis Gandhi dum lia revojaĝo al Hindujo, kaj havis okazon interparoli sur la ŝipo pri Zamenhof kaj Esperanto. Mahatma Gandhi jam renkontis plurajn esperantistojn, interalie Kolonelon Pollen, lian malnovan amikon en Bombay, kiu fariĝis poste la unua prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio antaù la milito.- La gramatikon de Esperanto li tralegis kaj trovis tre simpla, tiom ke li lernus la lingvon en dudek kvar horoj, se li kiopodus, li diris. Sed nun lia zorgo estas alispeca.
En Hindujo D-ro Privat paroladis pri Esperanto kaj D-ro Zamenhof en Universitato de Delhi al aùdantaro de 300 studentoj kaj profesoroj. Lè ankaù estis akceptata de la Vic-Reĝo Lord Willingdon en la palaco de New-Delhi.

=====Ekde kelka tempo aùdiĝas en Esperantujo ripetitaj paroloj pri la centra direktado de la E.movado. - Unue priktaktis tiun dornan temon en "La Movado" S-ro Dubois, kiu en Gazeto de la XXIVa Universala Kongreso reparolas pri ĝi, sub titolo "Ordo en Laboro". Sekvis "Publika Letero pri la Reorganizado" de J.Baghy. En "Heroldo" S-ro Jung skizis planon, kaj S-ano I.Lejzernowicz skribas pri "Movado en katenoj"..... Tiuj ripetitaj artikoloj verŝajne ne estas simpatiaj al la konservativemaj granduloj de Esperantujo. Internacia Centra Komitato jam opiniis necese respondi en "Heroldo" per I00 faktoj asertantaj pri sia aktiveco. Tamen ne temas tiom pri aktiveco ol pri gvidado.
La demando: "Kiu el la legantoj jam foje voĉdonis por la ĉefaj instancoj de nia movado?" montras mankon de "organizo sur sana demokratia bazo de parlamentismo".
Al la U.E.A-oj de Belglanda teritorio same ni povus demandi kiom da fojoj ili jam kunvenis, voĉdonis aù eĉ estis konsultitaj ?

=====Sveda Laborista Esperantisto demandas: Kiel organizi kaj gvidi perfektigan kurson? El la interesa artikolo ni ĉerpas : La plej granda malfacilaĵo konsistas certe el tio, ke la partoprenantoj en daùriga kurso estas diversaj el la vidpunkto de la kono pri nia lingvo kaj tial oni devas trovi "oran mezvojon", por ke la malpli multesciantaj ne havu tro grandajn malfacilaĵojn venki kaj por ke la pli multe sciantaj ne tediĝu, pro tio ke la taskoj estas tro facilaj. - La plej granda malfacilaĵo estas laù mia opinio paroligi la anojn. Ni svedoj verŝajne estas tro ambiciaj kaj timas tial paroli se ni ne estas tute certaj ke ni pravas per ĉiu silabo dirata. Tamen se oni sufiĉe singarde marŝas en la kurso oni sukcesas iom post iom.
La supraj diroj valoras ne nur por la Svedoj sed verŝajne por ĉiuj Esp.rondoj; ankaù ĉe ni la gelernantoj tiel malvolonte parolas nian lingvon dum la kunvenoj.....

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ? Abono senpage por niaj grupanoj. Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso : Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

N° 28 - Marto 1932


Merkredo 6an de Aprilo 1932 je la 8a vespere, ĝenerala monata kunveno, en kafejo "De Tuin" Yzerweglaan. - Nepre ĉeestu ! Niemand afwezig !

- La monata kunveno de februaro certe estis modelo laŭ nombro de ĉeestantoj. Ciam devus esti tiel, rememoru tion kaj venu ankaŭ la 6.4.32.

- Dimanĉo, I7an de aprilo, je la 9 I/2 matene, okazos ekzameno de Esperanto, en la urba lernejo, Oude Vestingstraat.
Jen sekvas la programo, kun divido de la poentoj :

| | Simpla kapableco | Supera kapableco |
|---|---|---|
| Legado | I0 p. | I5 p |
| Klarigoj (esperante por supera) | I0 | I5 |
| Konversacio | - | I5 |
| Diktaĵo | I5 | I5 |
| Traduko Esp.-Fl. | I0 | I0 |
| Gramatiko (esperante por supera) | 20 | 20 |
| Traduko Fl.-Esp. | I5 | I5 |
| Redaktaĵo | 20 | 20 |

Enskriboj estos akceptataj dum la ĝenerala kunveno.

- Restas nur kelkaj semajnoj ĝis la kongreso. Multaj enskriboj jam alvenis, sed trafoliumante la aliĝilojn, ni konstatis ke ĝis nun nur 5 grupanoj sin enskribis !..... Ĉe la negrupanoj ni insistis kaj reinsistis, demandis kaj redemandis ke ili ne malfaciligu la laboron per malfrua aliĝo, sed niaj propraj membroj donas malbonan ekzemplon..... Tial, enskribu tuj, ne prokrastu pli longe.

- S-ro Lambert donacis 8.oo fr. por la flago; do ni posedas jam entute 85I,50 fr.

- Forton faras unuiĝo; faras unuiĝo forton; faras..... Estas ses manieroj diri la proverbon, ses manieroj diversaj kaj egalaj, kiel dirus profesoro. Domaĝe, ke ekzistas nur ses manieroj, ĉar se ekzistus cent, ni tute simple skribus ilin en la tuta spaco restanta en "Nia informilo"
Jes, senĉese oni devus ripeti tiun devizon, ĉar se ni ne sekvas la konsilon esprimitan de ĝi, nia peno por triumfigi Esperanton restos vana, senrezulta. Izolita esperantisto restas por la Movado senvalora batalanto. Nur en la vicoj, kun la kamaradoj oni povas bone labori por nia komuna celo.
Tion ni diras precipe al lernantoj de la lasta kurso, kiuj ne jam aliĝis al nia Grupo. Estas ilia devo tion fari kiel eble plej frue, ilia devo kaj intereso. Ilia devo, ĉar aliĝante al la Grupo, ili rekompencos tiel la klopodojn, kiujn ni faris por ebligi al ili, ke ili fariĝu esperantistoj; ilia intereso ĉar, dank' al la organizo de la Grupo, ili samtempe fariĝos membroj de la ĝenerala movado kaj subtenos ĝin.
En la momento kiam ni, Kortrejkanoj, pretiĝas inviti la aliajn membrojn de tiu bela familio al la pentekosta festo de nia grupo, la "novebakitaj" esperantistoj nepre devas veni plimultigi nian xxxxxxx lokan anaron kaj helpi al ni.
Ne forgesu ke per persona propagando, brilajn rezultatojn vi povas atingi !

- Laŭ artikolo en "Heroldo de Esperanto", la unua viktimo de la mondmilito estis esperantisto. La unua soldato mortigita dum la milito, estis hungarŝtatano-esperantisto,kiu en la momento de la militeksplodo servis sur militŝipo veturanta sur la Danubo. Sen scio de la ŝipanaro pri la eksplodo de l'milito, tuj post la militdeklaro la ŝipo estis bombardata de la Serboj, kaj la unua mortviktimo estis esperantisto.
Same la lasta militviktimo estas esperantisto, elzasgermano, ekzilata al Cayenne, post la armistico la Francoj kondamnis lin ĉar dum la milito li soldatservis en la germana armeo.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

No 29

Aprilo
1932

Merkredo, 4an de Majo 1932, je la 8a vespere, en kafejo "De Tuin"

## ĜENERALA KUNVENO

Ĉefa temo: Nia venonta festo kaj kongreso je Pentekosto.

Je fino de Aprilo, la stato de la enskriboj estas : 138 ! Krom tio ni ankoraŭ antaŭvidas minimume 50 pliajn enskribojn. Do, ni povas jam de nun paroli pri granda sukceso.

Inter niaj grupanoj restas nur 4 aŭ 5 kiuj ĝis nun ne jam aliĝis. Tute ne pravigeble estas ke Kortrijkanoj atendas ĝis lastmomente, la laboro de la komitato estas pli ol sufiĉe peza por ke oni ne malfaciligu la taskon per nemotivata atendo.

---

Vendredo, 6an de Majo, je la 8a vespere, en "De Tuin" Yzerweglaan, okazos kunveno de la kongreskomitato. Al tiu kunveno estas invitataj ĉiuj esperantistoj kiuj konsentas helpi dum la kongrestagoj. Se multaj helpas la laboro estos tre facila, do ni atendas multaj bonvolemaj samideanoj.

Toekomende Vrijdag vergadert het kongreskomiteit in het gewoon lokaal. Dringende oproep wordt gedaan aan al deze die van goeden willen kunnen een handje toesteken tijdens de kongresdagen, om deze vergadering te willen bijwonen.

---

En la programo de la kongreso okazis kelkaj negrandan ŝanĝoj. La sonorilarkoncerto komencos nur je la 8 1/2 anstataŭ je la 8a, ĉar pli frue estas tro da bruo sur la granda placo kaj ke diversaj fremdaj esperantistaj alvenas nur malfrue.

La diservo okazos je la 9 3/4 akurate, en la kapelo de la Instituto "Casino". La publiko povos ĉeesti la diservon. La prediko estos en Esperanto.

Por la festo en "Middenstandshuis" estos disdonataj invitiloj. La grupanoj kiuj deziras kartojn por familianojn bonvole avertu la komitaton

La kunveno en la urbodomo estos ankaŭ publika.

---

Inter la kongresanoj ni jam nombras Angloj, Francoj, Germanoj kaj Hindoj. Estas preskaŭ universala kongreso !

---

Por la flago, de anonimulo ni ricevis 5.00 fr. do entuje jam:855,50 fr.

La gazetoj raportas ke en la sekvantaro de la 1 Majo, en Bruselo, estis portata propagandan tukon favore al Esperanto...., Iom post iom ĉiuj medioj propagandas vigle por la internacia lingvo. Bona antaŭsigno por la estonteco!

---

Se nia gazeteto ne enhavas ĉi tiun monaton tiom da teksto ol kutime, estas la kulpo de la festo kiu sorbas tro da tempo. La venontan monaton la situacio denove estos normala.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso:
Marckesteenweg, 18, Kortrijk.

No 30
-
Majo
1932


Merkredo, 1 Junio 1932, ĝenerala monata kunveno, en "De Hooge Tuin" Yzerweglaan, je la 8a vespere.

Okazos disdono de libroj al la diplomitoj de la ekzameno kaj poste komuna kantado.

En la etaĝa salono ni prezentos la filmeton de nia kongreso. La prezentado komencos per montro de la filmeto de la Antverpena kongreso.

Ne ofte okazas ke kinematografado estas senpaga, do certe neniu povas forresti. Negrupanoj ankaŭ povas ĉeesti.-Fumado en la kinejo estos permesata.- Alia allogaĵo por veni estas ke ĉiu povos konstati proprokule se li havas "fotogenikan" vizaĝon......

Aan de ouders wordt beleefd gevraagd dat zij hunne kinderkens wat langer congé zouden geven dan naar gewoonte, gezien cinema toch maar kan gespeeld worden als het omtrent donker is. - Dank op voorhand-.

---Verŝajne ne necesas doni multe da klarigoj kaj priskriboj de la kongreso; efektive ĉiuj samideanoj ĉeestis, eĉ tiuj kiuj jam delonge ni ne plu kutimas vidi en la kunvenoj.

La nombro da enskriboj estis 202. La festenon ĉeestis 149 personoj kaj Lunde ankoraŭ estis 90 por la tagmanĝo, malgraŭ ke la Kortrejkanoj ne povis partopreni.

Estas ciferoj kiujn neniam kongreso atingis en nia lando. Kortrijk estas do rekordurbo ! Ĉu venontjare Mechelen sukcesos detroni nin ? Ni esperu, kvankam tiel ni perdos nian titolon, tamen la progreso de la movado antaŭ ĉio.

La definitivaj kontoj ni ne jam povas prezenti ĉar multaj fakturoj ankoraŭ forrestas. Ĉiuokaze la cifero estos tre alta.

Specialan laŭdon meritas la piedpilkistoj kiuj zorgis por la sportan honoron de nia grupo. Hola-hi! Hola-hi! ni venkis! 4 kontraŭ 1 ! Hola....hi Kiam en la grupkaso estos sufiĉe da mono, ni aĉetos pokalon sur kiu ĉiujare estos gravurita la nomon de la venkinta grupo. Kortrijk do staros sur la unua vico

Ĉar nia grupo nombras multe da vojaĝemuloj, estas starigita bicikla sekcio, kies provizora prezidanto estas Andreo Vandenberghe; dum la monata kunveno li akceptos novajn membrojn. Poste, la nove fondita sekcio fiksos la programon de la ekskursoj por la venonta sezono. Ĉiu kiu havas biciklon ankaŭ havas la moralan devon aliĝi. La aliaj kiuj ne havas biciklon sed tamen longan spiron, ankaŭ povas aliĝi por kuri post la verdaj radoj.....

Por la flago donacis 5 frankojn S-ro Lefevre; do,entute ni posedas nun 860,50 frankojn (kia fortuno! kiun O veh! sorbis la kongreson)

Dum la kongreso,la grupo ricevis flagon donacitan je nomo de diversaj aliaj grupoj. Ili konsideris ĝin kiel provizora flago, sed ĝi estas pli ol sufiĉe bela por servi kiel definitivan flagon. Kvankam fakte nun ni posedas flagon, tamen estas dezirinde daŭrigi la kolektadon; la akirita sumo eventuale servos por aĉeti lumbildaparaton por poŝtkartoj. Tiel estos eble fari de tempo al tempo paroladon pri iu ajn temo kaj tiel agrabligi la monatajn kunvenojn.

"Heroldo de Esperanto" enhavas tre interesan raporton pri nia kongreso, subskribitan "ĉeestantino". Estas agrabla surprizo kiun faris, al ni F-ino E.Buchty el Aachen kaj por kiu ni estas tre dankemaj al ŝi. Multe pli valoras al ni la opinio de eksterlandanoj ol tiu de niaj propraj membroj.

La venonta kongreso okazos en Mechelen, je Pentekosto 1933. Por faciligi grandnombran partoprenon el Kortrijk, denove la grupo organizos ŝparkason. 2 frankoj po semajno sufiĉas por ĉeesti du 2 tagojn.Nia amiko Antoine Cognie konsentis denove sin okupi pri tio. Se lastmomente iu estas malhelpata kunvojaĝi, la mono estas redonata.

# NIA INFORMILO

31
JUNIO
1932.

MONATA BULTENO de la ESPERANTISTA GRUPO KORTRIJK.


---

Pro manko de la necesa papero, La informilo ne aperas ĉi tiu monato sub sia kutima koloro; la venonta numero devove estos verda.....

---

## KIEL ORGANIZI kaj GVIDI PERFEKTIGAN KURSON ?

Sub tiu titolo aperis en "Svenska Arbetar Esperantisten" aperis tre interesa artikolo pri demando kiu estas aktuala por ĉiuj grupoj esperantistaj, ankaù por la nian; tial ni represas ĝin ĉi sube je intenco de niaj legantoj. Estus utile eventuale pri diskuti ĝin dum la venonta monata kunveno.

Tiun demandon mi pre zentis al mi multfoje. Ofte ja estas tiel
ke niaj novuloj en esperanto, kiuj post studado dum unu
vintro en niaj kursoj por novkomencantoj plej ofte
bezonas partopreni perfektigan kurson. En Boras
ni dum kel kaj jaroj spertis, ke multaj partopren-
intoj de niaj elementaj kursoj post ĝia finiĝo forlasas nian
aferon, ne vizitas la klubajn kunvenojn, ne abonas al esperanta gazeto,
kaj baldaù forgesas ĉion lernitan.

MERKREDO 6an de JULIO
MONATA KUNVENO
en "De [illegible]"!

Komprene ble oni ne povas postuli, ke ĉiu semo estu fruktodona, sed ni ankaù devas konstati, ke ni ne ĉiam atentas la novulojn. Certe starigo de perfektigaj kursoj por tiuj, kiuj vere interesas pri la afero estas gravega tasko de ni. Nia movado ja ĉiam bezonas alfluon de laborvolo kaj entuziasmo kaj kursgvidanto, laborinta dum du aù tri jaroj, certe baldaù trovas, kiuj el lia anaro montras emon profunde lerni koni la lingvon, kaj trovinte tiujn valorulojn, kiuj en esperanto ne nur vidas la mirindan lingvon, sed ankaù komprenas ĝian gravegan rolon por la tutmonda proletaro, estas nia absoluta devo starigi perfektigajn kursojn.

Nia loka esperanta klubo antaù kelkaj monatoj komisiis al mi aranĝi kaj gvidi tiun gravan laboron. Sed kiel plej bone solvi la problemon, jen la demando, kiun mi proponas pridiskuti en nia gazeto. Mi kredas ke tiu demando estas aktuala en multaj grupoj. Kaj mi volas iom rakonti kiel mi mem agis por solvi tiun problemon.

Nia studrondo konsistas el dek kamaradoj, kiuj dum la pasinta vintro formis la kernon en du studrondoj. La celo por ĉiu estas korekte skribi kaj paroli nian lingvon.

Ni kunvenas po unu vespero ĉiusemajne kaj ni partigas la tempon en tri partoj. Dum la unua duonhoro ni legas el Lingvaj respondoj. Poste sekvas horo, en kiu unu ĉe la antaùa kunveno elektita kamarado laùtlegas artikolon aù rakonton originale verkita de li. Mi kaj ĉiuj kamaradoj atente aùskultas kaj rimarkante gramatikan eraron, mallertan esprimon aù nebonan vortelekton, mi skribas la kritikatan frazon sur la nigran tabulon kaj ni kolektive klopodas plibonigi la frazon. Ĉiu devas verki artikolon pri ia temo decidita jam antaùe ĉe kunveno, kaj ĝis nun ĉiuj akurate plenumis tiun taskon.

La lasta kaj la plej interesa parto de niaj studkunvenoj estas la lasta horo kaj ĝi okazas ĉiam nur en esperanta lingvo en formo de interdiskuto kies celo estas igi la partoprenantojn rapide kaj korekte mem konstrui bonajn frazojn en esperanto. Tamen ni neniam hazarde diskutas temon, sed ĉe kunveno antaùa ni devidas pri la diskutota temo, kaj la partoprenantoj mem decidas pri ĝi. Jam pridiskutitaj temoj estas interalie naciismo, alkoholtrinkado, la pacismo, vegetarismo k.t.p. En la nun okazontaj kunvenoj ni pritraktos la religion. Antaù ĉiu diskuto mi faras dekminutan enkondukan paroladon pri la temo. Ni ĉiam klopodas prezenti malsimilajn opiniojn kaj okazas kelkfoje tiamaniere ke komunisto defendas la kapitalismon kaj naciismon kaj ne malofte ateisto aperas kiel eklezia pastro plena je metafiziko. Niaj diskutoj ĉiam estas viglaj kaj interesaj kaj mi kun ĝojo povis konstati ke eĉ alie silentema kamarado sentante sian opinion en momenta danĝero, vigle kaj kun elokventa ardo ekpartoprenis la diskuton.

V. Ekström.

## Novaĵoj en kelkaj linioj :

Samideano Andreo Vandenberghe ne plu ŝatas esti prezidanto de "La Verda Rado". Cu ekzistas aliaj kandidatoj ?

-Dum la ekskurso al Ruselare okazis negranda akcidento.; la verda rado de iu fraùlino rulis en verda herbejo. La samideanoj estis tuj pretaj por flegi ŝian genuon ....

-Oni diras ke ne plu okazon piedpilkludon dum la kongresoj, ĉar la "Verda pilko" estas tro forta kaj tamen devove estus "ĉampiono".....

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso: Meerschstraat, 1, Kortrijk

No 32 - 5 Septembro 1932



Merkredo, 7 Septembro 1932, ĜENERALA MONATA KUNVENO, en "De Tuin".

Tagordo:

1° Raporto pri la kaso kaj la kongreskontoj
2° Raporto Doornaert pri vojaĝo kiun li faris bicikle al Danujo.
3° Raporto Debrouwere pri la 24a Universala Kongreso en Parizo.

Pro la libertempa periodo kaj ankaŭ pro "krizo" en la grupkaso, la "Informilo" ne aperis dum la 2 antaŭaj monatoj. Tiurilate ni multe insistas ĉe niaj membroj kiuj kelkfoje forgesas regule pagi sian kotizon, por pli akurata plenumo de tiu plej elementa devo.

Dimanĉo, 11 Septembro 1932, "La Verda Rado" ekskursos al Doornijk, kie okazas la famkonata procesio kaj la foiro. La distanco estas 28 Km. ankaŭ ne profesiaj biciklistoj kapablas kuniri. Ĉiu scias ke niaj promenadoj kutime estas agrablaj, do ni esperas je granda partopreno. Foriro je la 8a; kunveno ĉe angulo doornijkstraat kaj Yzerweglaan.

La 21an de Aŭgusto, en Diksmuide estis organizata renkontiĝo esperantista. Kvankam ne ĉiuj samtempe ĉeestis, tamen multaj gesamideanoj vizitis la ejon. Tre bone efikis ĉe la fasado la verdstelan flagon.
Alia ekskurso okazis la sekvantan dimanĉon al Oost-Duinkerke, por kunestado kun la francaj amikoj el Duinkerke. Partoprenis ankaŭ la grupo el Nieuwpoort kaj kelkaj izolaj samideanoj. Plej bedaŭrindaj estas tiuj kiuj ne kunvojaĝis... Pli agrabla banloko ne ekzistas kaj la Esperantistoj ĝuis tie bonan akcepton en la "Grand Hôtel" kies estro estas la fervora samideano P.Benoit. Estis la unua ekskurso al tiu loko sed verŝajne ne la lasta !

Ni jam ricevis inviton por partopreni en Duinkerke la kongreson de la Franca Norda Regiono, je komenco de julio 1933. Kvankam estos dum plena periodo de kongresoj kaj kunvenoj, kaj do ankaŭ de malplenaj monujoj (!) restas la ebleco por la verd-rad-anoj fari la vojaĝon bicikle; jam de nun oni povas komenci ŝpari la ŝpiron.....

La lasta numero de "Literatura Mondo" favore recenzas la gvidlibreton eldonitan okaze de nia kongreso.

Pasintan monaton S-ro Moy Thomas, angla U.E.A. ĉefdelegito, el Londono, vizitis la grupkunvenon; plej agrable estis la kunesto ĉar S-ano Moy Thomas bone konas la sekreton por kapti tuj ĉies simpation Tia vivplena kaj gaja homo ni ne kutimas renkonti inter la angloj.

Baldaŭ ni devos malfermi rubrikon de la feliĉuloj ! La pasinta monato geedziĝis 2 tre fidelaj membroj de la grupo: Julien Reynaert kaj Mariette Cognie; ilin akompanis la plej bonaj deziroj de la Grupo,por eterna feliĉo. Kutime kiam iu edziĝis, tio signifas perdo de grupmembro.... ĉi tiu foje oni promesis escepton al la bedaŭrinda kaj malbona regulo.
Ne forgesu ke la verda stelo alportas feliĉon ! Tion montris dum la lastaj semajnoj la pligrandiĝo de la familioj de samideanoj Esquenet, Algoet, Vanbiervliet kaj Heffinck; kaj ŝajnas ke ne estas la fino.
Al ĉiuj niajn gratulojn, kaj ĝis revido en la venonta kunveno ?

La grupo el Roeselare ankaŭ eldonos informan bultenon. "Neniam laca" diras Honoré Braekevelt, kaj obstine li daŭrigas sian laboron por disvastigo de Esperanto. Li estu ekzemplo por tiuj kiuj tro rapide laciĝas.

La 25an de Septembro okazos en Bruselo ĝenerala kunveno de Flandra Ligo Esperantista. Tiu okaze la grupo "Nele" aranĝos ekspozicion de esperantaĵoj. Rekomendita vizito !

La komitato de la 25a Universala Kongreso de Esperanto en Kolonjo, eldonis tre belan afiŝon. Ekzemplero estas videbla ĉe la fenestro de la V.T.B. oficejo, Doornijkstraat.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj? Abono senpage por niaj grupanoj. Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso: Meerschstraat, 1, Kortrijk

n°33 - 1 Novembro 1932


Merkredo, 2an de Novembro, ĝenerala monata kunveno, en la kutima ejo kaj je la kutima horo. Ni esperas renkonti tie ĉiujn membrojn, eĉ tiujn kiuj ne plu kutimas regule veni !

Jaŭdo, 10an de Novembro, je la 7 1/2 vespere, en la granda salono de la urbodomo, komencas nia nova publika kurso. Ni esperas ke kiel la antaŭaj jaroj la ejo estos krakplena dum la malferma kunsido.
Propagando estas farata per afiŝetoj kaj flugfolioj. La necesa materialo estos je dispono de la bonvolemaj propagandistoj dum la ĝenerala kunveno. Ankaŭ deĵorantoj dum la lecionoj estos bezonataj; anoncu vin al la sekretario

Senhalte nia "ronda familio" ampleksiĝas... Nia kamarado Frans Vandommele aĉetis fileton. Elkoraj gratuloj al la feliĉaj gepatroj.

"Nia Informilo" ne aperis pasintan monaton,pro ŝparemo. Efektive en la kaso estas grandaj truoj ĉar la Urbo ne jam pagis la promesitan subvencion.

Dum la daŭro de la kurso, ĉesos la kutimaj semajnaj kunvenoj. Nur la monataj kunvenoj daŭros, la unuan merkredon de ĉiu monato. La lasta ordinara kunveno sekve okazos merkrede, 9an de novembro. Dum tiu kunveno ni trafos la lastajn aranĝojn por la kurso.

"Norda Gazeto" jam publikigas la provizoran programon de la Nordfranca Federacia Kongreso en Duinkerque, la 1an & 2an de Julio 1933. La kotizo estas 14 belgaj frankoj; pagante antaŭ 31 Dec.1932 estas nur 7 fr. Oni aliĝas pere de S-ro P.Benoit el Oost-Duinkerke.
La Belgaj fervojoj donos 35% da rabato.
Ĉu ni kelkope partoprenos ?

Radio P.T.T.Nord,Lille, komencis novan kurson kiu okazas ĉiun dimanĉon matene, je la 9a. Interesuloj povas sin turni al S-ro Benoit kiu vendas la lernolibrojn kaj korektas la taskojn de la belglandaj lernantoj.

En la jaro 1931 dissendis Esperanto-disaŭdigojn 126 sendstacioj en 26 landoj. La sumo da dissendoj en la jaro 1931 estas 2.006; ĝis fino de la jaro 1931 jam okazis 14 673 dissendoj.
Generale oni povas diri,ke Esperanto nuntempe havas gravan bazon en radio. Preskaŭ la duono de la radiofoniaj sendstacioj, parte eĉ grandpotencaj estas favoraj al Esperanto kaj disaŭdigas Esperanton regule aŭ de tempo al tempo. En la radio-sezono estas dissenditaj plejmulte 30-40 aŭ pli da Esperanto-disaŭdigoj ĉiusemajne. La Radio-gazetaro interesiĝas por nia movado kaj publikigas niajn informojn. Entute Esperanto kaj la esperantistaro havas bonajn rilatojn al ĉiuj fakoj de la radio-sfero.

Jen kelkaj informoj por tiuj kiuj sin interesas pri la gvidantaj organizaĵoj de la ĝenerala esperanto-movado :
Dum la jaro 1931 la U.E.A. en Genève, elspezis 77.838,56 svisaj frankoj aŭ proksimume 545.000 belgaj frankoj.
8.620 membroj pagis 64.944,72 sv.fr.aŭ proksimume 455.000 belgaj frankoj.
Estas impona sumo kiu atestas pri la potenco de la movado.
Ĉe U.E.A. laboras 4 konstantaj oficistoj.
Dum 1931 la oficejo dissendis 121.146 leterojn kaj presaĵojn !

La Elspezoj de I.C.K. (Internacia Centra Komitato) ankaŭ en Genève, sin ciferas je 19.689,37 sv.fr. aŭ proksimume 135.000 belgaj frankoj.

Se estus eble aldoni ĉiujn sumojn elspezitajn en la tuta mondo, per la grupoj kaj societoj, oni atingus respektindan sumon da milionoj !

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.
Adreso: Meerschstraat, 1, Kortrijk

nº 34/35 – 5 Decembro 1932


Ni havas la plezuron informi vin ke, Merkrede, 7-an de Decembro 1932, je la 8-a vespere, en "De Tuin", S-ro Paul Benoit el Oost-Duinkerke, faros parroladon kun lumbildoj pri la franca havenurbo Dunkerque.

La parolado estas publika, sekve ankaù ne-membroj povas ĉeesti. Ni alvokas niajn membrojn por propagandi inter la lernantoj de la nova kurso, por ke ili ĉeestu multnombre la paroladon. Se multaj lernantoj ĉeestas, la parolado estos laùbezone tradukata.

Samtempe ni rememoras al ĉiuj, ke komence de Julio 1933, okazos en Dunkerque la kongreso de la Nordfranca regiono. La Belgaj fervojoj konsentos 35% da rabato al la kongresanoj ĝis la landlimo (Adinkerke). La kongreskotizo estas 10 fr.; pagante antaù novjaro estas nur 7 fr. (belgaj frankoj). Ne dubinde estas ke S-ro Benoit sukcesos varbi enskribojn por tiu kongreso. La vojaĝo ne estas longa, do multaj kapablas partopreni.

---

## Al kiu apartenas Esperanto ?

Amiko mia, kiu fervore lernis Esperanton, subite ĉesis, aùdinte, ke ĝi estas lingvo proleta. Sed kiam mi klarigis, ke Esperanto apartenas ne nur al proletoj, sed ankaù al aliaj homoj, li rekomencis la lernadon.

La proleto ja rajtas uzi Esperanton por propagandi siajn kredojn, sed tiel same rajtas ĉiu homo. Esperanto apartenas al la tuta homaro, kaj ĉiu egale rajtas ĝin uzi siacele. Efektive, troviĝas inter ni multspecaj grupoj: proleta, blindula, junula, teozofa, sciencula, poŝtofica, ateista, kristana, k.t.p. Rigardante unu grupon ekskluzive, oni povas konkludi, ke Esperanto apartenas nur al ĝi. Tian idiotan ideon oni forĵetu. La lingvo mem havas en si nenian ismon: ĝi estas nur ilo. Esperanto estas kvazaù spegulo, en kiu aperas koloroj kaj figuroj ĉiuspecaj. Se belulo staras antaù ĝi, aperas figuro bela; se malbelulo, ĝi spegulas malbelaĵon. Sed pri tio neniom respondecas la spegulo. Por aspekti bele en spegulo, oni do beligu ne la vitron, sed sin mem. Kaj tute same, ĉu Esperanto esprimas ideon bonan aù malbonan, pro tio respondecas ne la lingvo, sed la uzanto.

(El: "Dansk Esperanto-Blad")

---

## La Statutaro de la Nova Internacia Esperanto-organizo.

Jam de jaroj oni diskutas pri reorganizo de la ĝenerala E.movado. Antaù nelonge aperis en iu gazeto ke la kaùzo de la tuta malinterkonsento estas la dualismo inter U.E.A. kaj I.C.K., kaj multaj esperantistoj opinias ke vere tiel estas.

Ĉu la nova U.F.A. (Universala Federacio Esperantista) donos kontentecon ? Ne, tute ne! Precipe ne al ni, ĉar denove la ligo de Flandraj esperantistoj ne povos aliĝi; nu, tio havas la avantaĝon ke oni ne misuzos nian kotizmonon. La sistemo de la U.E.A. kontraktoj povus esti pli bona, sed tiu asocio, sub influo de nerespondecaj personoj, ankaù tro fanatike forpuŝas la t.nomitajn "ne-regnajn" societojn.

Jen sekvas kelkaj ekstraktoj el la nova statuaro :

Celo: d) Publikigi kaj konservi la oficialajn dokumentojn de la Esp.movado, la oficialan jarlibron kaj la oficialan bultenon. (Kaj kio okazos kun la U.E.A. jarlibro kaj ĝia oficiala bulteno ?)

-La U.F.E. estas absolute neùtrala rilate al religio, politiko, nacieco, lingvo, aù raso. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj al ĉiuj funkcioj.

-UFE konsistas: a) el la naciaj t.e. regnaj societoj esperantistaj. (UFE sin deklaras absolute neùtrala rilate al nacieco, k.t.p., kaj aliflanke akceptos nur "regnajn" societojn. Oni priatentu ke ekzistas landoj kie la "ne-regnaj" asocioj estas pli potencaj ol la regnaj.)

-Oni povas akiri membrecon nur per aliĝo al tiuj societoj.

-La naciaj societoj pagas ĉiujaran kotizon por siaj membroj laù la sekvantaj kategorioj: Membro simpla: por ĉiu membro 0.50 svisaj frankoj. Membro simpla ricevas pere de la nacia societo la internacian membrokarton kaj la oficialan internacian bultenon. Membro aktiva pagas 2,50 Sv.fr. kaj ricevas la internacian membrokarton, la bultenon kaj la jarlibron. Membro-subtenanto pagas 12.-Sv.fr. kaj ricevos la membrokarton, la bultenon, la jarlibron kaj gazeton.

Ni restos kiel spektatoroj ekster tia eminenta societo, kaj trankvile rigardas kiel la malgrandaj... de la movado provos savi Esperanton el ĝia nuna stato de stagnacio.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso:
Meerschstraat, 1, Kortrijk

n°36
--
3I
Januaro
I933.

- Merkredo -
1-an de Februaro I933
je la 8-a Vespere
Ĝenerala kunveno, en kafejo "De Tuin" - IJzerweglaan.

Sur la tagordo: Reelekto de la estraro.

La estraro por I933 konsistis el : S-oj Mattelaer, Debrouwere, Misschaert, S-ino Biltjauw, s-oj Casier, Bossuyt, Steelant, Vanfleteren, Delbaere, Doornaert, Devolder.
S-ro Alb. Cognie, bibliotekisto, estas aldona komitatano de per siaj funkcioj.

La komitatanoj estas reelekteblaj. S-ro Mattelaer esprimis la deziron ne plu esti reelektita. S-ro Delbaere eksiĝis.
-Oni povas prezenti kandidatojn ĝis la komenco de la elektoj.
-La balotado estas sekreta. Ĉiu membro rajtas je unu voĉo.

Je komenco de la kunveno, la sekretario prezentos raporton pri la stato de la kaso.

---

Dum la pasinta kunveno ni fiksis kiel daton por la festo de la grupo, la 26-an de ~~xxxxxx~~ Februaro. Pro festo okazonta sammomente aliloke, ni ŝanĝos la daton, provizore ni elektis la I9an de Februaro. Je oportuna momento ĉiu ricevos informon

---

S-ano Palmer Misschaert zorgis por ke la mondo, kaj ankaŭ nia grupo, ne formortu. Plej korajn gratulojn la Grupo prezentas al la feliĉaj gepatroj kiel ankaŭ al nia feliĉa sekretario Petro kiu povis porti la novnaskiton al la baptokuvo!

---

La 25-an Internacia Kongreso de Esperanto okazos en Kolonjo, de la 29-an de Julio ĝis la 5-an de aŭgusto I933
La kotizo estas 20 gmk. Ĝis 3I 3.33 validas favorkotizo de I8 gmk.
Ĝis nun sin anoncis 325 personoj el 25 landoj.
La belgaj kaj la germanaj fervojoj konsentas 35% da rabato.
La loĝigon aranĝos la Fremdultrafika Oficejo de la urbo Köln. Bonaj ĉambroj kun matenmanĝo estas haveblaj por 3 - 8 gmk. La prezoj por tag- kaj vespermanĝoj varias inter gmk 0.80 kaj 2.-, inkluzive trinkmono.
Valoran kongresmemoraĵon ricevos tiuj aliĝontoj, kiuj estos pagintaj sian kotizon ĝis fino de marto I933.
La kongresa palaco de la urbo Köln situanta en bela parko apud la Rejno estas je dispono de la kongresanoj.

---

Antaŭ kelkaj monatoj ni represis informojn ĉerpitajn el statistiko pri la E.radio dissendoj. "Heroldo de Esperanto" nun enhavas la statistikon por I932 el kiu ni sciiĝas ke en tiu jaro denove estas dissenditaj pli ol 2000 Esperanto-disaŭdigoj. La listo enhavas nur la eŭropajn sendstaciojn kaj montras ke estis dissendataj 2090 Esperanto-disaŭdigoj el 94 sendstacioj en I7 eŭropaj landoj. En la jaro I932 la nombroj de la Esperanto-kursoj malgrandiĝis, malgraŭ tio, ke la tuta sumo de la disaŭdigoj pligrandiĝis. La parto de la kursoj nur estas unu kvinono, kaj kvar-kvinonoj estas ĉefe paroladoj en Esperanto. Nur kelkaj estas paroladoj pri Esperanto en nacia lingvo. La listo ankaŭ montras ke la Esperanto-dissendoj el Francujo aparte grandiĝis, dank' al la vigla klopodado de la Radio-Club Espérantiste de France.
Radio-stacio Karlskrona, Svedujo, ree komencas elsendon Esperantan, ĉiun duan dimanĉon, je la I3-a. La temo dum printempo estos "Esperanto kaj Turismo". La dissendoj komencas per la himno. Skribu al la stacio kaj danku, sed ankaŭ menciu, kiel vi povas aŭdi.
Aŭskultu ĉiujn staciojn kiuj elsendas esperante kaj ne forgesu sendi de tempo al tempo karton por danki !

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso:
Meerschstraat, 1, Kortrijk

nº 37
--
27 Februaro 1933.


M e r k r e d o
1-an de Marto 1933
je la 8-a vespere,
Ĝenerala monata kunveno en kafejo "De Tuin" - IJzerweglaan.

---

La pasintan monaton okazis elekton de la estraro, por la nuna jaro.
Estis reelektataj: S-ino Byltjauw, S-oj Misschaert, Casier, Bossuyt, Steelant, Vanfleteren kaj Doornaert.
Kiel nova komitatano estis elektata s-ro Eugene Vandenberghe. S-ro P.Mattelaer estis unuanime elektita kiel honorprezidanto.
Speciala kunveno de la estraro okazis la 19-an de februaro, por divido de la diversaj postenoj. Oni indikis kiel 1-a prezidanto: G.Debrouwere; 2-a prezidanto: O.Steelant; sekretario-kasisto: Petro Misschaert.
La estraro ankaû decidis kunveni ĉiumonate, dimanĉmatene antaû la ĝenerala kunveno.

---

Nur 3 !
Nur 3 samideanoj ĝis nun forgesis pagi sian kotizon por la pasinta jaro.....
Ĉu ni povas rememorigi tion al ili ?

Slechts 3 !
Slechts 3 leden hebben tot nu toe vergeten hunne bijdrage te betalen voor het verleden jaar.... Mogen wij hen dit herinneren ?

---

Dum la lasta ĝenerala kunveno, la sekretario-kasisto prezentis la ĝeneralan bilancon de la grupo.
Je intenco de la membroj kiuj ne ĉeestis la kunvenon, ni represas ĉi sube la situacion de la kaslibro por 1932 :

E n z p e z o j :

| | |
|---|---|
| Sumo de la enspezoj okaze de la kongreso ............ | 10.234,10 fr. |
| Kotizoj de la grupanoj por membreco.................. | 522.00 fr. |
| Donacoj............................................. | 11,25 fr. |
| Vendo de libroj kaj diversaj varoj.................. | 707,25 fr. |
| Sumoj pruntericevitaj por pago de kongreskostoj...... | 2.300.00 fr. |
| Saldo 1931.......................................... | 916.70 fr. |
| Sume........ | 14.691.30 fr. |

E l z p e z o j :

| | |
|---|---|
| Elspezoj por la kongreso............................ | 12.840.85 fr. |
| Elspezoj por la grupa vivo.......................... | 1.110.90 fr. |
| Aĉeto de libroj kaj diversaj varoj.................. | 409,85 fr. |
| Abonoj al diversaj gazetoj.......................... | 168,85 fr. |
| Saldo 1932 (enkaso)................................. | 160,85 fr. |
| Sume........ | 14.691.30 fr. |

La kaslibron kontrolis la estraranoj : Debrouwere, Steelant, Vanfleteren, Doornaert kaj Cognie.
La estraro aprobis la kaslibron kaj gratulis la sekretarion-kasiston pro la bona maniero laû kiu li prezentis la kontojn.

---

- SPECIALA ALVOKO al ĉiuj FERVORULOJ de nia GRUPO -
Dimanĉe, 12-an de marto, okazos speciala radio-disaûdigo en la radio-stacio Lille, de la 9 1/2 ĝis la 10a matene. Ni decidis helpi al tiu disaûdigo kaj prezentos tie 3 kantojn, nome: Flandroland', La Gildo Festas, kaj Jen kiu aûdigas sin. Merkrede okazos denove ĝenerala ripetado; ni insistas ĉe ĉiuj kantemuloj por ĉeesti la ripetadon. Multe da personoj, ankaû ne-esperantistoj, regule aûskultas la E.-dissendoj el Lille, nuntempe eĉ speciala propagando estos farata; sekve, por la bona famo de la Verda Movado, la prezento de la kantoj devas esti tute senmanka! Ni esperas je vi ! Aan de ouders geven wij de verzekering dat hunne medereizende kinderen onder goede bewaking staan !

---

- A n o n c e t o j -
S-ro kaj S-ino Debrouwere-Boudens havas la plezuron anonci vin la feliĉan naskiĝon de filineto.
Patrino kaj infano fartas tre bonaj......

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono seapage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso :
Meerschstraat, 1, Kortrijk

n° 38
—
3
Aprilo
1933


Ĝenerala Monata Kunveno
Merkredo, 5-an de Aprilo, je la 8-a vespere

---

Ĉiusemajne, dum la grupkunvenoj, okazos perfektiga kurso, sub formo de konversaciaj vesperoj. La leciono komencas akurate je la 8 1/2 h. kaj daŭras ĝis la 9 1/4; poste restas sufiĉe da tempo por laŭvolaj diskutoj aŭ ludoj. Absolute necesas ke ĉiuj, eĉ la plej modesta membro, akiru perfektan elparoladon. La pasinta semajno, je intenco de la korespondemuloj, okazis pristudo de letermodelo, venontan merkredon ni daŭrigos per la sama temo.

La konversaciajn vesperojn gvidos alterne S-oj Misschaert, Doornaert kaj Debrouwere .

---

Ĉar la 12-an de marto, la plej granda parto de la grupo kunvojaĝis al Lille, por helpi al la speciala radio-dissendo, ne necesas raporti tro longe pri tiu memorinda ekskurso; tamen por ĵaluzigi tiujn kiuj restis hejmen, ni rakontos tion -kaj nur tion- kio povas esti publikigata.....

La unua parto de la vojaĝo okazis senakcidente; nur iom da bruo sur la vagonaro. La koncerto okazis laŭŝajne bone, ĉar la grupo ricevis multe da gratuloj; la gazetaro diskonigis la koncerton kaj granda nombro da neesperantistoj el Kortrijk aŭskultis ĝin, tiel ke laŭ propaganda vidpunkto estis bonega afero.

Post la dissendo, S-ro Trotin, radioparoladisto, estis tiel afabla konduki nin al la ejo kie troviĝas la sendaparatoj, kio treege interesis ĉiujn.

Post tiu vizito oni vagis tra la stratoj ĝis "Cabaret Flamand" ejo de la esperantista grupo. Baldaŭ ŝvebis en la kabared' verdstelaj bonodoroj; de biero ne ŝatant' kelkiuj gustumis la bonajn francajn trinkaĵojn, kaj jen baldaŭ saĝeco kuŝas en pokal' kaj rezonas kanto post kanto !....

Tagmeze, en la restoracio, pli multe da plezuro ol da manĝaĵoj.

Posttagmeze, plua vizito al la urbo, bela vetero, varmiga suno kaj la rezultato: sekaj gorĝoj kiujn, komprenemble, ne per akvo oni saturigis.

Resume: Tre, tre interesan kaj agrablan ekskurson, kaj dankon al la Francaj gesamideanoj kiuj tiel ĝentile akompanis nin la tutan tagon.

---

La lundon de Pasko, posttagmeze, vizitos nin la esperantista grupo el Roeselare; sin anoncis ankaŭ samideanoj el Halluin. Ĉar estos foiro, la programo konsistas plejparte el vizito al la amuzejoj kaj en personaj interfratiĝoj. Tamen estus utile profiti de tiu kunesto por priparoli regulajn distriktajn kunvenojn; en la regiono jam estas tre multe da esperantistoj, kaj pli oftaj rilatoj faciligus sisteman propagandon.

Partoprenu multope ! Kunveno en kafejo "De Tuin", je la 3a posttagmeze.

---

Kunveno de Flandra Ligo Esperantista

Okaze de la "Floraliën" en Gent, F.L.E. kunvenos en tiu urbo, la 30-an de aprilo, posttagmeze.

Matene, oni vizitos grupe la florajn mirindaĵojn.

Kunveno antaŭ la stacidomo - foriro je la 9 1/2 h.akurate, al la ekspozicio.

Estos ebleco por komuna tagmanĝo en restoracio "'t Groot Vleeschhuis" Groenselmarkt. Prezo: 10 fr.(inkluzive servado) sen la trinkaĵoj.

M e n u o : Supo - almanĝaĵo - 2 specoj da viando - deserto.

Post la tagmanĝo, kunveno en la sama ejo, unua etaĝa ĉambro.

La geamikoj, kiuj deziras antaŭmendi enirbileton por la "Floraliën", pagu 5 frankojn antaŭ la 10-an de aprilo, al la poŝtĉekkonto n°3309.23 de F-ino Juliette Terryn, Raapstraat, 82, Gent.

Tiuj kiuj volas partopreni la komunan tagmanĝon, pagu 10 fr. al la sama poŝtkonto, antaŭ la 15-an de Aprilo.

Dum nia monata kunveno la sekretario-kasisto kolektos la enskribojn de la membroj kiuj kunvojaĝos, kaj ekspedos la monon.

Tamen, estos ĉiam okazo aĉeti enirbileton ĉe la "Floraliën"; antaŭaĉeto multe plifaciligos rapidan eniron, precipe se ni estas multnombre.

Tagmezmanĝi ankaŭ estos ebla, sed prefere antaŭmendu.

---

nur 2 nur
slechts 2 slechts

La pasinta semajno ni anoncis ke nur 3 el niaj membroj forgesis regule pagi sian kotizon.
Hodiaŭ ili restas nur duope. La kaso estas en deficito; memoru tion !

De verleden maand hebben wij medegedeeld dat slechts 3 onzer leden niet in orde waren met hunne bijdrage.
Gedenkt den armentierigen toestand onder kas. Dank op voorhand !

# NIA INFORMILO

ESPERANTISTA GRUPO ESPERANTO ★ KORTRIJK

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.

Adreso: Meerschstraat, 1, Kortrijk

No 39 - 1 Majo 1933


Merkredo, 3-an de Majo 1933
ĝ e n e r a l a   k u n v e n o
je la 8-a vespere, en kafejo "De Tuin" Yzerweglaan

Ekde kelkaj semajnoj okazas perfektigaj lecionoj, laŭ diversaj temoj, en la ejo. Ni insistas ĉe ĉiuj por regula ĉeestado de la lecionoj; estas bona okazo por lerni la praktikan uzon de Esperanto; ĉiu membro devas esti kapabla flue paroli la lingvon. Tom da aplikado, kaj ĉiuj jam kapabloŝ oratori dum la kongreso en Mechelen !

---

4a FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO
MECHELEN 3-5 JUNIO 1933 · PENTEKOSTO

Tre rapide alproksimiĝas la dato de la venonta E.kongreso. I6 Kortrejkano, ĝis nun aliĝis. Certe bona nombro, sed kie restas la aliaj? Ne prokrastu vian decidon ĝis lastmomente. Jam de nûn ni promesas belan plezuron. Palmero konsentis kunporti sian "tirsakon" tiel ke eĉ survoje oni muzikos Estos tagoj de Flandra bonhumoro - vlaamsche leute -.

La kongreskomitato ankaŭ demandis ne prokrasti tro longe la mendadon de loĝado; ŝajnas ke en Mechelen estas malpli da loĝadebleco ol en Kortrijk. Se ni volas resti kiel eble plej multe en sama hotelo, ni tuj enskribu. Necesas ke ĉ i u j   k o n g r e s o n t o j   v e n u   a l   l a   ĝ e n e r a l a   k u n v e n o venontan merkredon.

Jen kelkaj informoj por tiuj kiuj jam forgesis ilin : kostoj


kongreskarto:........................10.00 fr.
festeno (dimanĉo)...................25.00 fr.
tagmanĝo(lundo).....................10.00 fr.
loĝado (1persono)....15.00 aŭ 20.00 fr.
(2 pers. )....25.00 aŭ 30.00 fr.

La sekretario-kasisto kolektiĝos la enskribojn.

Sabate vespere, 3-an de junio, la Katolikaj esperantistoj estos akceptataj en la episkopa palaĉo de Ŝia Moŝto Kardinalo Van Roey; estas instiĝo por jam foriri sabate

Kiel kutime, okaze de ekskursoj, ni promesas al la gepatroj kies infanoj kunvojaĝos, ke la estraro bone priatentos ke ili sin konduku bone.......

---



"LA VERDA PILKO jam komencis ekzerci sin por la fama konkurso de Mechelen. Jam diversaj gazetoj anoncis tiun gravan sportokazaĵon. Tial, Kortrejkaj sportistoj, ĉampionoj de Esperantujo, konservu vian titolon; ne forpilku la honoron de nia klubo. La suportoj grandamase apogos kaj kuraĝigos vin !

---

LA MODERNA SINJORINO.

La juna sinjorino estas vestita kaj kontrolas la enhavon de sia saketo: ĉiuj malgrandaĵoj estas metitaj tien. Ĉio en ordo.

Nun ŝi iras al sia edzo. Ŝiaj brakoj estas metataj ĉirkaŭ lian kolon kaj ŝi flustras ;

"Kara mia, bone atentu ĉion dum mia foresto ! Prizorgu la infanojn kaj estu bona al ili. Kaj speciale kontrolu la hejmtaskojn de Ludviko ! Estas rakontite al mi el la lernejo, ke li lastatempe estis maldiligenta. Kaj...."

Tra la larmoj de la juna edzino estas vidata rideto: "Kaj ne vizitu restoraciojn kaj aliajn amuzejojn, sed gardu bone nian karan, ŝatatan hejmon ! Kaj - pensu pri mi ! "

" Vi povas fidi je mi," diras la edzo kun terurita voĉo: "Mi pensos pri vi la tutan tempon, kaj mi atendos vin."

Lasta kiso - kaj la edzino iras for el la hejmo por - permanent-ondigi siajn harojn !

---

L a s t a   R e m e m o r o :

1. Ne forgesu veni al la kunveno venontan merkredon.
2. Decidu vin rapide por partopreni la kongreson en Mechelen.
3. Pripensu se vi ne forgesas pagi regule vian grupkotizon !

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso :
Meerschstraat, 1, Kortrijk

Nº 40
1
3
Julio
1933

Merkredo, 5-an de Julio 1933
ĝ e n e r a l a   k u n v e n o
je la 8-a vespere, en kafejo "De Tuin", Yzerweglaan

---

La kutima redaktoro de Nia Informilo jam estis pretiganta kompletan raporton pri la Kongreso en Mechelen kiam, neatendite, la komitato ricevis riman raporton pri la sama subjekto.
Post atenta pristudo, la komisiono de redaktado de "Nia Informilo" unuanime preferis la poetan raporton, ĉar ĝi enhavas nekontestablan verkistan talenton. La verkisto humile petis ne malkaŝi sian nomon, ĉar li ne deziras esti prezentata por la premio de la Esperantista Akademio.

Al kongreso, esperanta,
Estas jam la kvara jar',
Tra Flandrujo verdiĝanta
Rapidegas vagonar'.
Kortrejkanoj, ne pakaĵon
kun si prenis en la man',
por helpporti tirsakaĵon :
sed atendis ĝin en van' !

Baldaù, nova malsukceso,
Pro haltigo malkontent',
Sed la tedo de l'impreso,
Malaperos post moment'.
Dendermondo per biero,
Eklumiĝas la mien' ;
Ŝvebos gajo en l'aero
Daùre, ĝis en Meĥlen ven'.

Nun grandpaŝe, al akcepto
Kardinala en palac'.
Al favoro de l'escepto
Decas inda ĝa donac'.
Kiam nun ĉe Moŝto Nia,
Dum kreskado de l'intim'
France sonas voĉo lia,
Ne domaĝas al estim'.

Pentekosto, ektagiĝas !
Suno en printempa glor'
Sur la urbo ekleviĝas,
Bruas tinto kaj sonor'.
Sed mi ĉerpis, jen konfeso,
Diron supran el konfid'.
Mi daùrigus, se permeso
Nun laù spert' de propra vid'.

En urbdomo nin ombrelas
De l'arkaĵoj malvarmec';
Ne esperu ke ĝin pelas
La proforma rigidec'.
Sed en rondo amikara
Vaporiĝas for la ĝen'
Dum laboro ordinara
De estrada ekzamen'.

Nun komencas, en festeno
Ŝpite ŝvito, rid' kaj kant':
Manĝoj eftaj en soleno
Al servadon atendant'.
Do ne miru, se post tostoj
Ne plu ŝaùmas ie vin';
Nur ŝtopilcj, korkaj ostoj
Al ni restas antaù fin'.

Post parado fotografa
Trans aleoj de la park',
Diplomado sukcestrafa:
Ĉar ne mankis kisa mark'.
Nun al supro de la ĝojo,
Dum kongresa ŝatata bal',
Kiam ja la "Rekta Vojo"
Vice zorgis por regal'.

Lundon! Kial frumatene
Ellitiĝi: jam femur'
nur permesos iom pene
la grimpadon sur la tur'.
Sed trans stratoj, ĉe angulcj,
Kie haltas ie tram':
Tie vagas videmuloj
Nekonforme al program'.

Piedpilka vetludado :
Jen la ĉefa sensaci'.
Sed al kampo misirado :
Jen la lasta emoci'.
Ĉar konvenas venko fina
Al "La Steloj", sen kompar',
Nin por venĝo al la kvina
Veturigos vagonar'.

–Dum la lastaj semajnoj J.Reynaert aĉetis filineton kaj C.Vanbiervliet [fi]leton. Estas do nenia kaùzo por timi formorton de nia grupo. Al la [ge]patroj multe da gratuloj kaj ke ili ne haltu sur la bona vojo !

[B]edaùrindaj estas la grupanoj kiuj ne kunvojaĝis al Dunkerque. Precipe por [la] gejunuloj estis organizita ekskurso nokta, dum kompleta malhelo, ĝis [Mal]o-les-Bains. Oni ankaù foje provu tion dum niaj kongresoj ! Krom kelkaj [mal]gravaj detaloj, la organizo estis bona. La multaj bonegaj francaj vinoj [ankaŭ] helpis krei gajan atmosferon kaj kun bona ...

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso:
Meerschstraat, 1, Kortrijk

nº 41 - 1 Aùgusto 1933


Merkredo, 2-an de Aùgusto 1933
ĝ e n e r a l a k u n v e n o
je la 8-a vespere, en kafejo "De Tuin",Yzerweglaan

Merkredo, 16-an de Aùgusto 1933
la prezidanto raportos pri la
25-a Universala Kongreso en Köln. ---------------------------------------

La pasintan sezonon la Grupo ricevis la viziton de germana samideano kiu venis de Hispanujo,post tramigrado de tuta Eùropo; eble kelkaj amikoj sin rememoros ke li rakontis pri la facila maniero vojaĝi senpage en Hispanujo kiam oni uzas ŝarĝvagonarojn.
Tiu germana samideano nun atingis la finon de sia vojaĝo ; per cirkulero li dankas la grupojn kie li ĝuis gastadon kaj demandas por korespondi; jen la adreso je intenco de la skribemuloj: Paùlo Koester, Karl-strato 34, Rostock, Germanujo.

---------------------------------------------------------------------

La abonantoj al FLANDRA ESPERANTISTO estas petataj repagi sian abonon por 1933-1934 kaj varbi novajn legantojn. La lasta numero suferas iom da prokrasto pro ŝanĝo je presisto, sed poste la apero denove fariĝos regule kiel antaùe. S-ro Bassleer promesis veni al la kunveno por ricevi la kotizon

---------------------------------------------------------------------

Hungarlando eldonas oficialajn poŝtkartojn kun ilustraĵoj kies signifoj estas presitaj en hugara lingvo, en franca lingvo kaj en Esperanto. La serio nombras 16 diversajn kartojn.

---------------------------------------------------------------------

La malgranda duklando Liechtenstein, apenaù pligranda ol manplato, sendependa ŝtato en la mezo de Eùropo, en la lastaj jaroj tre ellevis sin de sia malgraveco. Nome la riĉuloj el la diversaj landoj tre preferis ĝin ĉar ili tien ĉi savas iliajn havaĵojn. La ĉefurbo de Liechtenstein estas Vaduz, kiu havas apenaù 1500 da loĝantoj, sed nuntempe ekzistas en la urbo almenaù 4000 diversaj akciaj societoj.

---------------------------------------------------------------------

Germanaj judoj post la "manifestacio" kontraùjuda.
Abraham Rosenblatt renkontas sian amikon Isidor Kohn, kiu estas riĉa sed ne tre instruita homo.
-"Nu, Isidor, ĉu vi komprenas nun la signifon de la vorto bojkoto ? "
-"Nun jes, Gi konsistas el du partoj: Boji kaj koto."

La movado kontraù ne-arianaj kuracistoj kaj advokatoj.
Hitlerano : "ĉu vi estas aùtentika ariano, D-ro Levi ?"
D-ro Levi : "Sendube, mi ja vivas nur de miaj honorarioj."
Hitlerano : "Kion tio pruvas ?"
D-ro Levi : "Ke mi estas honor-ariano !"

- Ni aĉetis porkon, patro! Sed vi ne havas porkejon.
- Ne grave, - ĝi loĝos kun ni.
- Jes, sed kio pri la odoro ?
- Nu, - bestoj devas alkutimiĝi al ĉio .

- "Ĉu vi estas la akuzato ? "
- "Tute ne. Mi estas la sinjoro, kiu ŝtelis la juvelojn."

Inspektisto : "Do la krimulo eskapès ? "
Policano : "Jes, sinjoro. Ni trasercis ĉiun elirejon, do ni supozas, ke li foriris per unu el la enirejoj."

- "Oni diras, ke mia infaneto similas min."
- "Ne, tio ne gravas, se li estas sana."

- Li: "Kiam estos via naskotago ?"
- Ŝi: "kiam estos plej oportune por vi."

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.
Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso:
Meerschstraat, 1, Kortrijk

N° 42 - 5 Septembro 1933

Merkredo, 6-an de Septembro 1933
ĝ e n e r a l a   k u n v e n o
je la 8-a vespere, en kafejo "De Tuin", Yzerweglaan

Tagordo :

Pravado de lumbildaparato kiun intencas aĉeti la grupestraron, por pliagrabligi la kunvenojn kaj ankaù la lecionojn de nia venonta vintra kurso. Ni esperas je la ĉeesto de ĉiuj, eĉ tiuj kiuj preskaù neniam venas.

---

Het gebeurt weleens dat klitiek uitgeoefend wordt op onze vergaderingen en konversatie-avonden, die niet belangwekkend genoeg zouden zijn.

't Is waar, aan belangwekkendheid laten de vergaderingen wat te wenschen over. Maar dit wijte men niet aan het bestuur. Wanneer de meeste aanwezigen liever in alle talen zwijgen, dan in de diskusies te mengen, dan wete men, waar de schuld te zoeken is. Aan belangstelling in ons werk ontbreekt het !

Slechts zelden draagt een lid bij tot veraangenaming van onze wekelijksche bijeenkomsten. Bijna elk voorstel hiervoor moet van het bestuur uitgaan, dat tenslotte ook in voorstellen en ontwerpen uitgeput raakt. En wanneer een aangenaam plannetje bedacht is, geven de leden over 't algemeen zoo weinig blijk van hun belangstelling, dat het bestuur ervan weerhoudt verdere plannen uit te werken.

Toen vroeger alles rond één persoon draaide, telkens dezelfde, was er nog wat leven; sedert werd overgegaan tot het aanduiden van een lid dat zich zou gelasten met de fietsuitstappen, een voor muziekavonden, een voor de feesten, en nog andere, doch wat is ervan terecht gekomen ? Volmakingslessen werden al evenmin ernstig opgenomen.

Thans hopen wij met meer sukces onze avonden te kunnen veraangenamen door gebruik van een lichtbeeldapparaat; volkomen welslagen ligt nochtans in de handen der leden; ieder moet helpen en van tijd tot tijd als spreker optreden. Daarom, niemand afwezig in de naaste vergadering ! Eenieder heeft als plicht zijn uiterste best te doen om het vereenigingsleven tot hooger peil op te voeren. Tot Woensdag dus !

---

La 5-a llandra Kongreso de Esperanto okazos en Oostende, je Pentekosto 1934.

Amiko Antoon denove zorgos por la ŝparkaso. Laù promeso, la kongreso en Oostende estos ankoraù pli bona ol tiu el Mechelen. Do, ŝparu multon kaj kunvojaĝu multope !

---

Dum la pasintaj semajnoj ne okazis multe da interesaj aferoj. Nu, estas la libertempa periodo. La poetoj diras ke dum tiu tempo ripozas kaj dormetas la naturo, sekve ne estas mirinde se la aliaj kreitaĵoj faras la sezonon..... Sed nun ke la varmaj tagoj pasis, ni esperas revidi regule niajn amikojn dum la grupkunvenoj.

---

La administracio de la komerca foiro de Marseille ankaù eldonis reklamfoliojn en Esperanto, por la foiro kiu okazos de la 16-an de Septembro ĝis la 1-an de Oktobro 1933.

Tio pruvas ke iom post iom la gravaj foiroj komencas konscii pri la valoro de Esperanto por la internaciaj rilatoj.

---

Unu generalo volis rigardi, kiel oni nutras la soldatojn. Neatendite li venas en la soldatan kuirejon. Sur la korto li renkontas du soldatojn, kiuj portas kaldronon. - Haltu! li ordonas: alportu kuleron!- Sed, Via Generala Moŝto....komencas la alkurinta adjudanto... -Silentu! krias la generalo. Li prenas kuleron. -Levu la kovrilon! Lia ordono estas plenumata. Li ĉerpas per la kulero la fluidaĵon, provas kaj kun abomeno kraĉas. -Kio tio ĉi estas? ĝi estas tia supo? ĝi estas kotaĵo!! -Jes, Via Generala Moŝto, murmuretas la timigita adjudanto, mi tion ĉi ja volis diri al vi.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la stato de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso :
Keerschstraat. 1, Kortrijk

n° 44

Novembro 1933


Kiom ? Kiom ? Kiom ? Kiom ? Kiom ? Kiom ? Kiom ?
Kiom ? Kiom ? Kiom ? Kiom ? Kiom ?
Kiom ? Kiom ? Kiom ?
Kiom ?
?

Kiom da novaj lernantoj vi jam varbis por nia kurso de Esperanto ?

La kurso komencos Jaùde, I6-an de novembro, je la 7 I/2 vespere, en la granda salono de la urbodomo. Kiel kutime la unua vespero okazos propaganda parolado kaj klarigo de la lingvo-sistemo de Esperanto. Alkonduku ĉiujn konatulojn viajn al la urbodomo !

Komence de la 2-a aù 3-a leciono, la klarigoj okazos parte kun uzo de la lumbildaparato.

Ni alvokas la komplezemajn samideanojn kaj precipe inojn, por helpi la sekretarion en la kursa salono; okaze de la enskriboj kaj librovendoj.

Propagandu !Propagandu ! Propagandu ! Propagandu ! Propagandu !
Propagandu ! Propagandu ! Propagandu !
P r o p a g a n d u !
Propagandu !
!

Merkredo
8 Novembro
I933

Ĝenerala kunveno
je la 8a vespere
en ejo "De Tuin"

Ni esperas je ĉeesto de ĉiuj geamikoj.
Dum la kunveno ni lernos la kanton : "Sub signo de la nova lun'"
Majstro Doornaert alportos novan direktan bastonon, la kantemuloj zorgu por nova kaj bona voĉo, kaj ĉio estos perfekte.

Dum la kunveno ni ankaù definitive fiksos la daton por la venonta vintra festo al kiu ni invitos ĉiujn esperantistojn el la regiono .
Samtempe ni skizos la programon. Inter la artistoj kiuj promesis kunlaboro sin trovas amikoj Cambien kaj Van Iseghem; Palmer flikos sian tirsakon je plezuro de la dancemuloj. Ah ! ah, ! oh ! oh ! La eniro estos senpage por la verdstelanoj.

---

Ĉu vi jam aliĝis al la Ŝparkaso por la kongreso de Oostende ?
Al la pasinto kongreso ni partoprenis 24-ope; ĉu nun ni ne povus esti iom pli grandnombre ?
Oostende, la reĝino de'l maro ! La plej taùga loko por kongresoj. La Esperantistoj de en- kaj eksterlando flugos Oostenden kiel muŝoj al peco da sukero..... Samideanoj kiuj neniam iras al kongresoj volos esti tie !
La kongreso prezentas ion por la gusto de ĉiuj: laborkunsidoj, promenado, teatro, balo (kun ŝvito), akvo, k.t.p.

---

"Flandra Esperantisto" denove aperos regule; ĉu vi ĝin abonas ? En la grupaj kronikoj troviĝas ankaù la informoj pri Kortrijk. Krome interesaj literaturaj legaĵoj. Abonprezo nur I5 fr. por I2 numeroj.

---

La kurso de la grupo Roeselare komencas la I2-an de novembro. Por ĝin propagandi estas eldonita bele presita propagandilo.
En Lichtervelde kaj Kortemark estas fervoraj samideanoj kiuj promesis malfermi kurson. Bonan sukceson al ili !

---

La komitato de la komerca foiro de Lyon denove eldonis belan afiŝon, poŝtkartoj kaj glumarkoj. Kontraùuloj de Esperanto ĉiam argumentas ke neniam la Komerco alprenos Esperanton..... tamen Lyon faras tion jam de pluraj jaroj, kaj estas certe ke tio ne estas farate por la belaj okuloj de la esperantistoj! Kiu diras komerco diras profito.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso:
Meerschstraat, 1, Kortrijk

nº 46
-
Januaro
1934


*La Estraro de la Esperantista Grupo,*
*deziras al vi plej feliĉan Novjaron!*

---

Merkredo, 3-an de Januaro 1933
ĝ e n e r a l a   k u n v e n o
je la 8-a vespere, en kafejo "De Tuin" Yzerweglaan

Estas nun la momento por varbi novajn grupanojn inter la parpoprenantoj de la kurso; propagandu do vigle !

---

Dum la monata kunveno ni trafos definitivajn decidojn pri la festo de la 21-an de Januaro.
Ĉiuj tiuj kiuj jam promesis helpi nepre devas ĉeesti. F-ino Dewachter kaj S-ro E. Vandenberghe zorgos por deklamaĵon; por malgranda teatraĵeto ni ankoraŭ bezonas 2 sinjorojn kaj 1 fraŭlinon, kiu prenos sur sin la taskon ? Ni esperas ke S-roj Doornaert kaj Cambien ne forgesos veni al la kunsido, ĉar urĝe necesas aranĝi la orĥestron. Do, neniu manku !

---

En la gazeto "Svenska Arbetar Esperantisten" de Nov. 1933, ni legis hazarde sekvantan tekston:
"Kortrijks stadsfullmäktige ha beviljat ett anslag av 500 frcs till esperantokurser, vilka anordnas av därvarande esperantoklubb".
Kiu prizorgos al ni la tradukon de ĉi tiu teksto ?

---

La monato Januaro, kun la novjarfestoj, ne multe instigas al serioza legado..... Sekve por la distro de niaj legantoj, ni represas ĉi sube kelkajn humoraĵojn.

LA EKZAMENO.
- Nu, knabo, kiel vi pasigis la ekzamenon ?
- Ĉio en bonordo, paĉjo, La profesoro estis tre afabla kaj pia.
- kial do pia ?
- post ĉiuj miaj respondoj li klakis per la manoj kaj kriis: Mia dio, mia di(o)

METAFORE.
Metalisto staras antaŭ la tribunalo. La akuzo temas pri ofendo al la ĉefroluloj en Hitlerio. La juĝisto ne volas malkonfesi sian komprenemon kaj demandas la kulpulon: -ĉu vi ne opinias, ke ni ricevis la paradizon per la nova reĝimo en nia lando ?
-Jes la paradizon, sed ne la anĝelojn ni havas, sonis la respondo.

ADVOKATO kaj ATESTANTO.
En Londono iu advokato estis defendonta iun domŝteliston kaj, laŭ konata kutimo, li penis plej eble malestimigi la ĉefan kulpigan atestanton.
-Vi nomiĝas Jakobo Smit, li diris. "Ĉu vi ne estus tiu Smit, kiu en la jaro 1895 estis kondamnata pro ŝtelo al dujara enkarcerigo?" - "Ne, sinjoro advokato, tiu Smit mi ne estas". - "Tiam vi estas kredeble tie Smit, kiu en Liverpolo estis kondamnata pro trompo?" - "Tiu mi ankaŭ ne estas." -
"Ĉu vi neniam estis en pundomo?"
"Jes, jes; mi laŭ metio estas masonisto, kaj foje mi estis vokata al la urba karcero, por tie masoni ĉelon, en kiu oni estis enŝlosonta iun advokaton, kiu pro falsado estis kondamnita al kvin jaroj da enkarcerigo."
La advokato ne plu starigis iun demandon.

MODERNA RACIISMO.
- Kiom longe vi rilatis kun via lasta amato ?
- Ho, nur ses salajrotagojn.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso:
Meerschstraat. 1. Kortrijk

nº 47
-
Februaro
1934


| | |
|---|---|
| Merkredo, 7-an de Februaro | Woensdag, 7-n Februari |
| Ĝenerala kunveno | algemeene vergadering |
| en la ejo : | in het lokaal : |

" DE TUIN" Yzerweglaan

| | |
|---|---|
| je la 8-a vespere . | te 8 uur 's avonds . |

T a g o r d o :

1. Raporto de la kasisto, pri la jaro 1933.
2. Elekto de la estraro.

---

Funkcias nun kiel estraranoj : 1-a prezidanto : G. Debrouwere
2-a prezidanto : O. Steelant
Sekretario-kasisto: P. Misschaert
Komitatanoj : S-ino Pyltjauw,
S-oj Cassier, Bossuyt,
Vanfleteren, Doornaert,
Vandenberghe Eugene.

La elirantaj estraranoj estas reelekteblaj.
Oni povas prezenti novajn kandidatojn ĝis la komenco de la kunveno

---

La jara festo de la grupo superis ĉiujn esperojn. Pro ne konata kaŭzo, ne al venis la francaj samideanoj; kontraŭe, la taĉmento el Roeselare nombris 17 gesamideanojn.

La unua parto konsistis el deklamaĵoj. Regis tre multe da bona volo ĉe la artistoj, sed la tasko estis tro peza por ĉiuj senescepte. Kompreneble, por amatoroj oni ne povas esti tiom postulema ol por profesiuloj, sed, konsiderante eĉ tion, estis fiasko... feliĉe la publiko estis tre toleremа kaj ne jam estis la sezono de putraj pomoj !

La "prima-dona" de la vespero estis Palmero, la fraŭlinoj konstante ĉirkaŭis lin kaj okulumis por ke li ludu per sia tirsako. La sperto montris la oazo de verdaj vestoj, la favoro de la geesperantistoj iras al la orĥestro; tiel ankaŭ rezultis ke la muzikantoj estis dorlotitaj de la grupa sekretario, kiu plenigis ilian stomakon per biero kaj bulkoj.

En la februara numero de Flandra Esperantisto, oni povas legi ke la Kortrejka orĥestro estas survoje por akiri mondfamon; se ĝi ne jam akiris tiun famon, tamen ĝi jam alprenis liksan titolon : s"mideanaj boys",- (kial ne bojo? tiel almenaŭ oni restus en la Esperanta stilo !)- Estos en atendo certe grava okazaĵo la koncerto de tiuj "bojojs" kaj ni absolute ne dubas ke la entusiasma kongresanaro donacos al la gvidanto Mastro Doornaert, novan bastoneton por bati la mezuron.

... por reveni al la Kortrejka dancfesto, ni povas aserti ke ĝi estis [illegible] brila, laŭ ĉiuj vidpunktoj. En la publiko, ĉiuj surhavis siajn [illegible] vestaĵojn, -eĉ kelkaj sinjoroj la jako el la edziĝa tempo. Plej [illegible] brilis (pro la ŝvito) la vizaĝoj de la novaj grupaninoj, kiuj demandis [illegible] ĉu esperantistaj festoj estas tiom gajaj? Estas almenaŭ pruvo ke ili [illegible] ne enuis. Sur la muroj de la salono estas freŝe pentritaj levigantaj [illegible] kaj verdaj koloroj, tiel ke eĉ la konstruaĵo helpis por krei printempan [illegible]atmosferon (eble estas pro tio ke la prezidanto sin opinis devova 3x7 [illegible] dancadis kun ĉiuj junulinoj!).

[illegible] la amikoj kiuj promenis ĝis lunde matene por rekonduki la fraŭlinojn [illegible] hejmoj, ni ne parolos, ta temo estante tro delikata.

---Kritikulo.---

[illegible] nur ankoraŭ 3 lecionoj antaŭ la fino de la kurso. Ni esperas je la [illegible] helpo de ĉiuj por varbi novaj grupanoj. Ĉiujare okazas ke membroj [illegible] la sanktan fajron nin forlasas; estas inter la novaj kursanoj [illegible] devas ĉerpi novajn fortojn; ne forgesu tion kaj varbu !

---

[illegible] jam preparas vin por la kongreso en Oostende, je pente [illegible] ? [illegible] decidi vin kiel eble plej frue por esti certe pri konvena loĝado

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso :
Meerschstraat, 1, Kortrijk

n° 48
-
Marto
1934

Merkredo
7-an de Marto
ĝenerala kunveno
je la 8-a vespere, en la ejo "De Tuin" Yzerweglaan.

La kurso de la grupo finis kun kontentiga nombro da gelernantoj; estas nun la devo de la membroj alkonduki ilin al la klubaj vesperoj. Ĉiumerkrede, je la 8a akurate, komencos perfektigan kurson; eĉ se je la 8-a ĉeestus nur 1 lernanto, la leciono komenciĝos. ni ne atendos la malfruiĝintoj !

---

- KONGRESO de OOSTENDE -

La grupo de Oostende konstante alvokas por ke oni sin anoncu kiel eble plej tuj kiel partoprenanto; sufiĉas ke de nun oni sendu la kotizon de 12 fr.; la resto de la mono, por loĝado kaj bankedo, oni sendu dum la monato aprilo; ĉiuj el vi certe disponas pri 12 fr. en la monujo, do, ne hezitu kaj aliĝu poŝtrevene.

---

Kelkaj membroj de la Kortrejka grupo iris al la festo de la najbara Poeselare, kaj revenis entusiasmigitaj, precipe pro la bonaj kukoj. Certa junulo revenis kun kolekto da poŝtkartoj kiujn li fiere montris, efektive, oni (la fraŭlinoj?) nomis lin per la plej delikataj aludoj; post nelonge la Kortrejka grupo ankaŭ aranĝos tian poŝtkartkonkurson.

---

De la 19 ĝis la 24 Majo 1934 okazos en Vieno internacia konferenco "Esperanto en la lernejon kaj la praktikon". La konferenco staros sub la protekto de la konfederacia prezidanto de Aŭstrio, Vilhelm Miklas, kaj sub la honora prezido de la konfederacia kanceliero D-ro E. Dolfuss. La ministerio por komerco kaj trafiko disponigis la necesan monon por la preparaj laboroj. Speciala amiko de Esperanto estas la ministro por komerco kaj trafiko, kiu jam dum januaro nunjara estis en Stokholmo okaze de la malfermo de modaĵa ekspozicio, kaj kiu tie sin esprimis pri Esperanto jene: "Mi subtenas Esperanton ĉiam, ĉie kaj ĉiel. Mi klopodas, por ke ĝi estu studata en la lernejoj, precipe en la komercaj lernejoj, ĉar la nuna generacio ne havas tempon nek monon por studi multajn lingvojn. Kaj mi vidas en Esperanto tre bonan rimedon por interpacigi la popolojn. Pro tio ni kunvokis al Vieno internacian konferencon, kiu pritraktu dum pentekosto la temon: Esperanto, en lernejo, komerco kaj trafiko. Ni esperas gravan rezulton de tiu konferenco. Nepre sendu reprezentantojn el Svedlando!"
Certe ankaŭ interesos vin ke gravaj ŝipkompanioj kiel Cunard Line, Red Star Line, White Star Line kaj Nord-deutscher Lloyd deziras fari propagandon por la Konferenco.
Ĉiun merkredon vespere proksimume je la 20-21 h. la Esperanto-Servon por Eksterlando, el Radio-Vieno, dissendas aktualajn sciigojn pri la "Internacia Konferenco". Je fino de ĉiu parolado oni aŭdas la anoncon de la venonta dissendigo.

---

Esperanto-Centro Itala organizas por eksterlandaj esperantistoj turisman viziton de la plej belaj partoj en Italujo.
La titolo de la programo indikas: Sur la fajra Vesuvo...per Esperanto ! La Italoj majstre pentras la naturon por kapti la vojaĝemajn samideanojn; ni tamen dubas se la grupanoj el Kortrijk multope partoprenos la karavanon, sed tamen legu: Oni supreniras per aŭtomobilo la grandan vulkanon, la Vesuvon, kies lafo brulanta estas preskaŭ tuŝebla, pro la ĵusa erupcio. Neforgesebla, profunda impreso aŭdi de tridek metroj distance la surdajn muegojn, la kolosajn grumblojn de la fajra giganto terura; flirtigi la verdan standardon antaŭ ĝia flama ruĝa kratero, eniri la krateron, paŝi sur la varma lafo ankoraŭ moviĝanta, senti en la vizaĝo ties ardon netolereblan, ekbruligi la cigaredon per lafero !
Certe estas granda emocio ekbruligi cigaredon al la Vesuvo; Dum la marĉpoko, Eŭlenspiegel uzis pli simplan metodon, sufiĉis al li fumantan ĉeval ....

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.
Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso:
Meerschstraat, 1. Kortrijk

Majo 1934.
n° 49


## KUNVENO

Merkredo, 2-an de majo 1934, ĝenerala monata kunveno en kafejo "De Tuin" Yzerweglaan.
Ni esperas je la ĉeesto de ĉiuj niaj geamikoj.

---

## KONGRESO

Rapide alproksimiĝas la dato de la Ostenda kongreso. Ĉu estas samideanoj kiuj ankoraù hezitas pri la partopreno? Oni tuj prenu firman decidon! Prokrasto ĝis la lasta momento malfaciligas la taskon de la organiza komitato kaj alifranke oni riskas ne plu trovi konvenan loĝadon.
Estas nun certe ke la orĥestro "Majstro Doornaert and his boys" zorgos por la dancado sabate vespere, estas do certeco pri sukceso; hola-hi-hi !
Dum la kongreso estos okazo por lerni multe da novaj kaj ĝojaj kantoj.
Ni rememoras ke ankaù ne-esperantistoj povas kunvojaĝi kaj ĝui pri la favoraj prezoj; necesas tamen ke ili tiam pagu la kongreskotizon.
Estos la plej agrabla kongreso kiu jam okazis; profitu pri ĝi por travivi kelkajn verdstelajn tagojn en la granda ronda familio.
Partoprenu amase !

---

## EKSKURSO

Sekve al demando de pluraj grupanoj, la estraro planas ekskurson al Oost-Duinkerke, dum la monato Julio.
Antaù . jaroj okazis samspeca ekskurso kiu tre bone sukcesis.
Nunjare ĝi okazus per granda aùtobuso, kun 50 sidlokoj
La ekskurso irus laù Roeselare, Diksmuide, Veurne, por reveni laù la vojo Oostende-Brugge.
La vojaĝpreze estus proksimume 15 fr. por persono.
Verŝajne ni povus renkonti en Oostduinkerke la grupojn el Nieuwpoort kaj Duinkerke.
Necesas tamen ankoraù interrilati kun S-ro Benoit el Oostduinkerke, por interkonsenti pri la dato kaj aliaj detaloj.
Ni esperas renkonti dum la kongreso en Ostendo la samideanojn el la norda regiono, por aranĝi la la aferon.



---

## LA ANGULO DE LA — FELIĈULOJ —

Antaù paro da semajnoj, edziĝis nia bona amiko Roger Duynslager.
Edziĝi estas granda paŝo en la vivo, sed li opiniis tio ne sufiĉe kaj decidis translokiĝi al Montevideo- Urugvay .... Kiu estus pensinta tion de la malgranda Roger ?
Ni adiaùas lin ĝis iama revido kaj elkore bondeziras lin feliĉan vojaĝon, sub signo de la nova lun' ! .

---

## NOVAĴOJ en KELKAJ LINIOJ :

Komencas la nova sezono, ekkantas la birdoj, ekfloras la plantoj.... tio ŝajne ne restas senefike sur la stato de la verda popolo. Dum la pasintaj semajnoj estis videblaj "gesamideanoj" rilatantaj ne en Esperanto, sed en la lingvo de la koroj.. Ĉu al ili jam de nun ni povas bondeziri ? ------------
Fondiĝis Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj. La simpla jarkotizo estas 5 fr. pagebla al S-ro I. Calloens, Aalst, poŝtkonto 209034.

NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso :
Meerschstraat. 1, Kortrijk

Junio
1934
-
nº 50.

..erkredo, 6 Junio, je la 8-a vespere, monata kunveno en kafejo "De Tuin".-

---

Merkredo, I3 Junio, ne okazos la kutima semajna klub-vespero, ĝi estos anstataŭata per vespera promenado, la estraro invitas la gepartoprenantojn verki redaktaĵon pri tiu promenado, la plej bona laboro ricevos premion. La promenado okazos laŭ sistemo de la surpriz-vagonaroj, tio estas ke la celo de la promenado restas sekreta.

Ni alvokas ĉiujn por ĉeesti merkrede, I3-an de Junio, je la 20a tre akurate, je sekvanta kunvenloko: Meerschstraat. La estraro elektis tiun lokon ĉar tie ne okazas granda trafiko kaj ke tiel ne estas danĝero ke amasiĝo de granda nombro da geesperantistoj povus okazigi trafik-akcidentoj...

Woensdag, I3 Juni, zal de gewone bijeenkomst vervangen worden door eene avondwandeling; onderweg wordt de vertaling gegeven van de verschillige zaken die we tegenkomen, dit zal dienen tot het maken van een opstel waarvan de verbetering zal gedaan worden tijdens de volgende vergadering; voor het beste opstel wordt eene premie toegekend.

De bijeenkomst heeft plaats aan de Meerschstraat (Beheerstraat) te 8 uur stipt. Klokslag 8 uur vertrekken wij, ten einde nog met den klaren terug te zijn.

Het is vanzelfsprekend dat in geval van ongunstig weder, zooals gewoonte vergadert wordt in De Tuin.

---

Jam de diversaj monatoj pluraj membroj petis por organizi ekskurson al la banloko Oostduinkerke.

Dum la lasta klubvespero, la ĉeestantoj konsentis pri I5 julio kiel dato por la ekskurso. Ĝi okazos per aŭtobuso kaj iros laŭ la vojo Kortrijk-Roeselare-Diksmuide-Nieuwpoort-Oostduinkerke-Veurne-Yper-Meenen-Kortrijk.

Foriro je la 8-a matene; realveno plej laste je la IO-a vespere. Laŭvole oni povas kunporti manĝaĵojn aŭ antaŭmendi tagmanĝon en la hotelo de samideano Benoit.

La autobuso enhavas 50 sidlokojn; veturprezo I5 fr., jam I7 samideanoj sin enskribigis; partopreno de familianoj estas permesata.

Voor Zondag I5 Juli I934, is een uitstap ontworpen naar het zeestrand te Oostduinkerke; de reis geschiedt per autobus en kost I5 fr. per persoon; familieleden mogen ook medereizen. Onmiddelijk hebben zich reeds I7 leden laten inschrijven en wij denken niet dat het zal noodig zijn veel aan te dringen om tot het vereischte getal 50 te geraken. Onderweg bezoek aan den IJzertoren te Diksmuide, aan Nieuwpoort, Veurne en Yper. Wellicht vergezelt ook de groep Roeselare in afzonderlijke autobus. Oostduinkerke werd gekozen als uitstappunt omdat het een der weinige strandplaatsen is die ongerept het natuurschoon bewaard heeft; daar ook worden we steeds vriendelijk onthaald bij samideano P. Benoit, eigenaar van het "Grand Hôtel".

---

!!!!!!! 50 !!!!!!!

Karaj gemembroj! Ĉu vi rimarkis sur la nuna bulteno la ejrnumeron ? 50 ja ne estas giganta cifero sed tamen ĝi signifas konstatindan fakton en la vivo de grupa bulteno; rememorante pri tiu cifero 50, la grupanon rememoru ankoraŭ kiom da fojoj jam aperis alvoko por kunlaboro kaj kiom da fojoj ili jam respondis al ĝi... Tamen kun nova kuraĝo antaŭen al numero IOO ! Per persisto kaj obstino ni venkos !

---

Pri la kongreso de Ostendo verŝajne ne necesas raporti longe kaj detale. La duono de la grupo ĝis partoprenis kaj estis la plej bone reprezentata sekcio de Flandra Ligo. Ŝparu nun por Bruselo, I935 !

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso:
Meerschstraat, 1, Kortrijk

Julio
1934
-
n° 5I


P r o g r a m m a

- voor de maand Juli 1934 -

Woensdag, 4 Juli, te 8 uur 's avonds, maandelijksche bijeenkomst in "De Tuin". Overhandiging der belooningen aan de leden die een opstel ingeleverd hebben betrekkelijk de laatste wandeling.

Woensdag, 11 Juli, - geene vergadering, om reden der feestelijkheden ingericht in het Plein.

Woensdag, 18 Juli, - 2e avondwandeling, naar onbekende bestemming Bijeenkomst aan den ingang van den Beverlaai, doornijkwijk, te 8 uur stipt, van waar vertrokken wordt in de richting van het Putkapelleke; deze voor wie het nader is komen bijeen te 8,5 uur aan het kapelleke. Er wordt ten zeerste aangedrongen op het stipte uur, ten einde bij tijds terug te zijn. In geval van ongunstig weder, bijeenkomst in de Tuin. Er wordt opnieuw gevraagd voor het indienen van een opstel.

---

Zondag, 22 Juli, - UITSTAP met autobus naar Oost-Duinkerke, met bezoek aan het IJzermonument te Diksmuide en aan Nieuwpoort; terug over Veurne en Yper, met stilstand in beide steden.
Vertrek: te 8uur stipt; aan het Halleke, op de Groote Markt.
Vertrek uit Oost-duinkerke, te 7 uur 's avonds.
Prijs: 15 frank. Een groot deel onzer leden hebben reeds ongeschreven. Er blijven nog 14 plaatsen beschikbaar; er mag geen enkele plaats overblijven, anders is er verlies, gezien deze gerekend zijn tegen den kostprijs. De eerst ingeschreven genieten natuurlijk de voorkeur. Om de deelname van de familievaders aan te moedigen, mogen de kinders die op vader's knieën zitten, kosteloos medereizen.....
Te Oost-duinkerke is gelegenheid om te middagmalen in het Grand Hotel, langs den zeedijk, voor 11 frank, bediening inbegrepen. op de spijskaart: soep, 2 gerechten, dessert en 1/2 flesch bier. Wie daaraan deel neemt moet inschrijven ten laatste tegen Woensdag 18 juli, gezien het moet op voorhand besteld worden. Eenieder is nochtans vrij voedes mede te nemen. De betaling van den reisprijs dient op voorhand gedaan te worden aan den hulpkassier, Antoine Coigné, Moskroenstraat, 11. = De autobus telt 42 plaatsen en wij twijfelen niet dat hij rap zal volbezet zijn. Ook niet-leden mogen inschrijven.

---

Wij herinneren aan onze leden dat het abonnement op "Flandra Esperantisto" dient vernieuwd te worden, den prijs ervan is gesteld geweest op 20 fr. per jaar. Wij verhopen dat eenieder zal helpen tot het aanwerven van nieuwe abonnementen; in de moeielijke tijden dient met des te meer ijver gewerkt te worden voor het bondsblad, zeker zal niemand den kleinen steun van 37 centiemen per week weigeren , waarvoor iedere maand een degelijk tijdschrift geleverd wordt.

---

Er is gevraagd aan diegenen die eenigerlijk betrekking hebben met handelaars en nijveraars, van reklamen aan te werven voor "Flandra Esperantisto"; het tarief is verscheidene maal overgedrukt geweest in F.E. en is verder ter beschikking der belangstellenden.

---

La 25-an de junio 1934 okazis en Brusele kunveno inter delegitoj de la Flandra kaj Belga ligoj, sub prezido de S-ro Wadham, Brita ĉefdelegito. La kunsido decidis ellabori planon de reorganizo laŭ la sekvantaj principoj:

1° Ekzistu en Belglando du Federacioj, nome: Flandra kaj Valona kun apartaj estraroj;
2° La du Federacioj formu kune unu Landan Asocion, kies estraro estu elektata de ambaŭ Federacioj laŭ proporcio de la membraro;
3° Ke la Landa Asocio aligu siajn membrojn al U.E.A. difinante unu ĉefdelegiton por la Teritorio.

---


# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso:
Meerschstraat, 1. Kortrijk

n° 52
Oktobro
1934

WOENSDAG, 3 Oktober 1934, te 20 uur

VOORDRACHT
MET
LICHTBEELDEN =

Het Bestuur der Esperanto-vereeniging heeft de eer en het genoegen zijne leden uit te noodigen tot deze zeer belangrijke en interessante voordracht, die zal gegeven worden in het lokaal "De Tuin", door Mijnheer August Vermeulen van Roeselare, die zal handelen over zijne reis per fiets door Nederland, Duitschland, Oostenrijk, Liechtenstein, Zwitserland, Saargebied en Frankrijk. Eene onvergelijkbare prachtige reeks foto's uit deze landen zal verdoond worden.

Ten einde de voordracht zoo nuttig mogelijk te maken ook voor de jonge leerlingen, zal deze in het Vlaamsch geschieden.

Gustje Vermeulen zal ons op de meest boeiende wijze weten te vertellen hoe hij te Oberammergau verrast is geweest midden in de bergen door een verschrikkelijk onweder en haast in het nieuw gewasschen er uit geraakt is; hoe aan de Oostenrijksche grens zijn fiets in beslag genomen werd en hij slechts zijn leven te danken heeft aan de tusschenkomst van de Belgische diplomatie; hoe hij in Zwitserland zijn pull-over verloren heeft en 's nachts lag te bibberen van de koude op een hoopke hooi in een berghutje staande midden eene vlakte van eeuwige sneeuw; hoe hij te Munchen in eene kollosale nazzi-vergadering binnen gesukkeld is en er in gesprek geraakt is met den minister-president Goering; hoe hij langs den Rhyn door mandoline-gespeel een duitschen boer tot tranen toe wist te bewegen en daardoor toelating kreeg bij zijn koeien te slapen; en hoe.....enz.....enz.....te lang om hier over te drukken.

- Wij hopen dat niet één onzer leden zal nalaten tegenwoordig te zijn om onzen moedigen samideano toe te juichen en te bedanken omdat hij zijn eerste optreden voorbehouden heeft aan onzen club.

Heil Gust !

---

De zomer en het verlof zijn voorbij. De tijd is gekomen om eene nieuwe periode van werkzaamheid in te luiden. In de laatste maanden zijn vele leden weggebleven, tot zelfs het "Informilo" is twee maal niet verschenen.

Wij doen een oproep tot~~xxxxx~~ sommige leden die vroeger de steunpilaren waren van den club en in de laatste tijden slechts zeer onregelmatig of zelfs in het geheel niet meer naar de vergaderingen komen. Eerst de fraŭlinoj: Vercruysse, Dewachter, Wybaillie, Boudens, Vansteenkiste; dan de samideanoj Voet, Doornaert, Maes, Debree, Dewerchin, Vanroye, Vandenberghe Eug. en nog vele anderen, bijzonderlijk ook den sekretaris-schatbewaarder, die op zijn Kortrijksch gezegd "van pijkens gebaart" en ons in plan laat. Zelfde kompliment voor deze welke van zoohaast zij in het bestuur gekozen zijn, niet meer omzien....

Een nog een goed woordje voor kameraad Bassleer opdat hij zou willen ne keer de bus ledigen van de omhaling die verleden winter gedaan is geweest.

Ernstig gesproken, het is niet aannemelijk dat onze vereeniging beschouwd wordt als eene duivenbeet, waar men komt en weggaat met of zonder ontslag te geven of herinschrijving te vragen, of bijdrage te betalen. Wie wenscht door te gaan voor idealist, moet anders te werk gaan. - Nu de puntjes op de i's gezet werden, rekenen wij dat eenieder terug tot inkeer zal komen en ijvervol studeelen. Het is niet voldoende een leerboekje te koopen en zich in te beelden dat men Esperanto machtig is. Zonder moeite garaakt men tot niets..

KLEINE BERICHTEN: Sedert vier maand ligt in het lokaal ter beschikking van Rafael Vansteenkiste, eene kongresfoto van Oostende. Komen afhalen a.u.b. aanstaande Woensdag.

=== Niettegenstaande voorafgaande en schriftelijke verwittiging, hebben een drietal leden het abonnementkwijtschrift op "Flandra Esperantisto" onbetaald laten terugkeeren, zoodoende nuttelooze kosten veroorzakend aan den bond; daarvoor geven wij geen diploma.....

=== La 26an de aŭgusto edziĝis en Reckem nia amiko Raoul Vanfleteren, delegito de UEA kaj estrarano de nia grupo. Al li ni deziras plej grandan feliĉon kaj prosperon.

=== La nova kurso komencos verŝajne la 8-an de Novembro, en la urbodomo.

ESPERANTISTA GRUPO ESPERANTO KORTRIJK

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso :
Meerschstraat, 1. Kortrijk

nº 55
-
Novembro
-1934-

## 7 NOVEMBER, MAANDELIJKSCHE BIJEENKOMST

La estraro insistas por ke la grupanoj ĉeestu multnombre tiun kunvenon, la 8-an de novembro komencas novan kurson, por kiu necesas havi helpantojn La gesamideanoj kiuj povas kunlabori estas elkore invitataj

---

S-ro Petro Misschaert, sekretario-kasisto de la grupo, demetis siajn funkciojn kaj eksiĝis el la grupo.

La estraro dankis lin por la faritaj servoj kaj esprimis la esperon iam vidi lin refoje en niaj rangoj.

Antoine Cognie funkcios kiel sekretario-kasisto ĝis la reelektado de la estraro, komence de 1935; la grupa adreso sekve estas provizore : Moskroenstraat, 11, Kortrijk.

---

La pasintan monaton ne havis la plezuron renkonti en "De Tuin", preskaŭ senescepte ĉiujn grupanojn, novajn kaj malnovajn, pro la anoncita parolado de kamarado Aŭgusto Vermeulen.

Bedaŭrinde, ni ne povas anonci ĉiun monaton tian paroladon, por allogi niajn membrojn... La montro de lumbildoj daŭris ĝis la 11ª vespere la aŭskultantoj aplaŭde dankis la simpatian parolanton kaj multaj el ni deziras ke Aŭgusto faru ankoraŭ multe da similaj vojaĝoj por havi la okazon aŭdi ofte tiajn vojaĝrakontojn.

===

## ONZEN AANSTAANDEN LEERGANG !

Donderdag, 8 november aanstaande beginnen wij eenen nieuwen kursus, waarvoor de beschikking over de groote benedenzaal van het stadhuis is toegestaan geweest.

De eerste donderdag, zal uitleg gegeven worden over Esperanto en een overzicht van de grammatika. Enkele brave jongens (en fraŭlinoj) zullen postkaarten en briefwisseling tentoon stellen en zorgen voor wat versiering aan de muren. Wij moeten dan zargen dat er veel publiek aanwezig zij

Vanaf de tweede les, op donderdag 15 november, zal gebruik gemaakt worden van lichtbeelden

Er is propaganda gemaakt geweest met plakbrieven, in de reklaambladen en in de pers, waarbij dan nog hoofdzakelijk in radio-Kortrijk Wij rekenen dan ook op groote belangstelling.

===

## RADIO

Kiel vi certe jam scias, ni akiris grandan sukceson ricevante permeson por disaŭdigi kurson de Esperanto pere de la regiona stacio Radio-Kortrijk

Ni spertis ke granda amaso da personoj aŭskultas la dissendojn, unue pro kuriozeco kaj poste pro intereso; efektive, multaj personoj opiniis Esperanton ian misbakitaĵon sen scienca bazo. Per la radio ni povis penetri en la domojn kaj dissemi la bonan parolon. Konsiderante ke la stacio estas bone aŭdebla je distanco de 50 ĝis 60 kilometrojn kaj eĉ pli, oni povas aserti ke estas propagando plej valora kaj efika.

Reciproke ni subtenu la stacion per aliĝo al la ascoio "De Luistervinke: la kotizo estas 10 frankoj por jaro kaj rajtigas je partopreno de multaj loterioj Fariĝu membro kaj pagu vian kotizon pere de la grupo !

===

Mortis en Kortrijk, kun nur tri tagojn da intertempo, la gepatroj de nia estrarano Sinjoro Albert Cognie. Al la funebranta familio ni prezentas la esprimon de niaj plej sinceraj kondolencoj

===

HERINNERING VOOR ALLEN: Woensdag, 7 november, vergadering
Donderdag, 8 november, 1e les.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj?
Abono senpage por niaj grupanoj.
Aliuloj pagas kiom eble plej multe.  Adreso:
Meerschstraat, 1, Kortrijk

n° 54

Decembro 1934.


Merkredo, 5-an de Decembro 1934
Monata Kunveno
je la 8a Vespere,
en la ejo "De Tuin"

Woensdag, 5 December 1934
Maandelijksche Bijeenkomst
te 8 uur 's avonds
in het lokaal "De Tuin"

Ĉar dumvintre okazas nun unu konveno en la monato, ni esperas firme ke ĉiu membro nia, konsideros kiel devo nepre ĉeesti !

=========================================

En Heroldo de esperanto, subskribite "M.MOVO", aperis interesa artikolo, kiun ni represas ĉi sube je intenco de niaj gemembroj.

"Ne estas bone por la homo esti sola", validas ne nur en la biblia kunteksto - tiu tezo konservas sian decidan signifon en ĉiuj regionoj de la homa vivo, de la homa agado: en scienco, arto, politiko. La homo estas nur tiam kontenta kaj feliĉa, se liaj travivaĵoj, liaj sentoj, liaj pensoj estas dividitaj de aliaj.

Oni ĝenerale vojaĝas al tiuj banlokoj, al kiuj "ĉiuj" vojaĝas; vizitas tiujn teatrojn, kiujn "ĉiujn" vizitas; legas tiujn librojn, kiujn "ĉiujn" legas, kaj aniĝas al tiu movado, al kiu "ĉiuj" apartenas. Nur tute malmultaj personoj serĉas en la vivo izolitajn vojojn. Homoj timas la solecon.

La nombro donas la senton de certeco. La nombro allogas. Pro tio la eldonistoj trograndigas la eldonnombron de siaj revuoj, pro tio la komercistoj fanfaronas pri la kvanto da venditaj artikloj, kaj la politikistoj multobligas la efektivan nombron de siaj adeptoj.

La nombro allogas. Tiun magian forton, ni, esperantistoj, utiligu kaj devigu labori por nia afero. Nia nombro estas sufiĉe granda por sukcesplene servi al ni, efike varbante por la movado. Necesas nur, ke nia nombro estu konstante kaj obstine deklarata. Ĉiam kaj ĉie ni devas manifesti, ke ni estas esperantistoj, kaj tio estas tute facila kaj tute simpla.

Imagu la impreson, kiu estus produktita, se ĉiuj niaj leterfolioj enhavus mencion pri Esperanto, se sur niaj privataj kaj aferaj vizitkartoj estus enpresita nia stelo, se ĉiuj -ĉiuj senescepte- de ni ekspedataj poŝtaĵoj estus provizitaj per Esperanto-sigelmarkoj, - se niaj bicikloj, infanveturiloj kaj aŭtomobiloj estus ornamitaj per Esperanto-standardoj !

Memkompreneble ankaŭ ĉiu el ni devas ĉiam esti dekoraciita per Esperanto-insigno - sur la strato, en teatro, en kafejo, en la oficejo, dum vojaĝo. (En unu loko estu nur permesite aperi sen stelo: en la Esperanto-kunvenejoj). Ni ja devas montri, ke oni povas alparoli al ni esperantlingve ! Neniu prudentulo riproĉos nin pri nia fervoro. Cetere eventuala ironia kritikò ne ĝenu nin. Ni imitu la antikvan Katonon, kiu ne ĝenis sin, je ĉiu konveno kaj malkonvena okazo ripetadi: "Kartago estas detruenta".

Ni utiligu la magian forton de la nombro kaj ne forgesu, ke mil homoj, manifestaciantaj tra la stratoj, multege pli impresas ol cent mil restantaj en la domoj.

---

Ĉi-tiu semajno trafis nin tre malĝoja informo : mortis pro akcidento en Oostende, samideano Marcel Troch, 24 jara. Li sufokis en lia oficejo, pro gasoj elirintaj la karbofornon.

M. Troch estis la ĉefa laboranto dum la 5-a flandra kongreso de Esperanto pasintjare en Oostende, kaj niaj membroj kiuj ĉeestis la kongreson certe rememoros pri tiu simpatia junulo, kiu estis videbla ĉie kie estis laboro.

Al la funebranta familio kaj al la Esperantista grupo el Oostende, ni esprimas niajn plej sincerajn kondolencojn pro tiu terura sortobato.

---

Pasintjare ne okazis en Kortrijk ekzameno de Esperanto, kion bedaŭris pluraj grupanoj emaj por partopreni tian ekzamenoj kaj akiri diplomon. La ekzameno ne okazis, ĉar rezultis ke ĉiuj ne ĝisfunde konis la gramatikon. Kun bedaŭro, ni konstatas ke tiuj personoj denove forrestas el la kurso, kiu tamen estas bonega okazo por refoje tralerni la gramatikon. Ni esperas ke la nuna admono sufiĉos por instigi regulan ĉeeston al la lecionoj.

# NIA INFORMILO

Ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono.

Aperos monate, tiom longe ol la sano de la grupkaso tion permesos.

Kiu subtenos nin kaj helpos al varbado de abonantoj ? Abono senpage por niaj grupanoj. Aliuloj pagas kiom eble plej multe. Adreso : Meerschstraat. 1. Kortrijk

nº 55

Januaro 1935


MERKREDO, 2AN de JANUARO 1935, je la 8-a vespere, en "De Tuin"

Ĝ e n e r a l a   K u n v e n o

Estas la unua kunveno de la nova jaro. Devas esti ĝenerala renkontiĝo por ke ni havu la okazon prezenti al ĉiuj la tradiciajn novjarbondezirojn.

---

## GRUPFESTO !

Dimanĉe, 27-an de Januaro 1935, okazos la jara festo de la loka grupo. C tiu jaro, la estraro zorgis por ke al la plezura flanko, estu aldonata utila parto.

Ni invitis S-on De Kegel el Aalst, kiun multaj el ni jam konas pro lia arta muziko dum la kongreso en Oostende, por ke li donu okaze de nia festo, provlecionon de Esperanto, laŭ la konata metodo de la rumana pastro Cseh.

S-ro DeKegel estas diplomita instruisto de la internacia Cseh-Instituto kaj jam akiris famon pro la Cseh-kursoj kiujn li sukcesplene gvidis en diversaj komunumoj.

La Cseh-metodo estas bazita sur jenaj principoj:

1) ĝi estas nova instrumetodo;
2) nacia lingvo ne estas uzata dum la instruo;
3) oni lernas absolute sen lernolibro;
4) Hejma laboro estas malpermesita;
5) la lecionoj estas agrablaj konversacioj;
6) post la kurso oni povas paroli kaj skribi la lingvon.....!

Kiel kutime, ni esperas je la ĉeestado de la samideanoj el la tuta regiono kaj ankaŭ el norda Francujo.

Post la demonstracia leciono okazos intima dancfesto, dum paro da horoj.

La festo komencos je la 3-a aŭ la 4-a posttagmeze; la ekzaktan horon fi..os la ĝenerala kunveno de 2-I-35, kaj poste ni informos ĉiujn.

Gardu libera la 27-an de Januaro 1935 !!!!!!!!!

---

## RADIO – Dimanĉe, 30-an de Decembro 1934, okazis la lasta leciono de la radio-kurso.

Ni ricevis permeson por prezenti al la aŭskultantoj de Radio-Kortrijk la novjarsalutojn de la Esperantista Grupo. La dissendo okazos Mardo, 1-an de Januaro, proksimume je la 9 3/4 matene, tuj post la dissendo de la katolika asocio. Estos ankaŭ disaŭdigata diskon kun "La Espero" kaj "La Tagiĝo". Ĉar temas pri propaganda parolado, ĝi okazos plejparte en Flandra lingvo.

---

Jaŭdo 3-an de Januaro 1935, okazos la 8-a leciono de la publika kurso en la urbodomo. Al la antaŭa leciono ĉeestis 5 aŭ 6 personoj, kio estas ridinda nombro kompare al la faritaj penoj kaj kostoj; estas la unua fojo ke tio okazas.

Pasintjare, multaj grupanoj plendis ĉar ne okazis ekzameno; la ekzameno ne okazis tiutempe ĉar la gramatika nivelo de la lernantoj ne estis sufiĉe alta. Ĉu vi nun konas la diferencon inter adverbo kaj adjektivo ? ĉu vi konas perfekte la regulon pri la akuzativo ? Tial revenu tuj al la lecionoj, ĉar estas nur tie kaj ne dum la dancfestoj de la grupo ke vi lernos la gramatikon!

---

NEKROLOGO.- Ĉi tiu monato mortis la patrino de S-anoj Petro kaj Palmer Misschaert. La grupo prezentas siajn plej sincerajn kondolencojn.

---

## 1935 • BRUSELO 1935 BRUSELO • 1935




Bruselo 1935 ! Kio do okazos en Bruselo 1935? Ĉu en Bruselo okazos io grava dum 1935 ?

Ĉu vi ignoras kamarado ke en Bruselo, je pentekosto 1935 okazos la 6a FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO ?

Aliĝu al Bruselo 1935; karavanoj da esperantistoj jam sin anoncis el Anglujo, Francujo kaj Nederlando.

Rapidu por pagi vian kotizon, alie vi riskas ke oni devos rifuzi vin en Bruselo 1935 ...

# NIA INFORMILO

Monata Bulteno de la Esperantista Grupo Kortrijk.-
Februaro 1935.
n° 56
Sekretariejo: Moskroenstraat, 11

INFORMO: La nuna informilo ne estas presata sur la kutima papero, ĉar la papero elĉerpiĝis; nova stoko estas en represo.

---

Karaj gesamideanoj,

Ĉu la grupa festo de la 27-an de januaro plaĉis al vi? Dum la festo ni aùdis nur plezurajn ridojn kaj je noktomezo kostis grandan penon por ĉesigi la dancadon kiu komencis je la 5-a.

La karavano el Ruselare estis tre multnombra ĉar ĝi ampleksis 22 gesamideanojn plus diversajn el Lichtervelde. Unu fraùlino tamen ploris pro la forresto de Gustje. Kiam la Ruselaranoj forkuris por kapti la lastan vagonaron, ili formis longan sekvantaron de la grupejo ĝis la stacidomo !

Se ĉiujare ni havas la plezuron renkonti plurajn Francojn, ĉi-jare impona estis la partopreno el ra regiono Roubaix-Tourcoing-Lille kaj Halluin, tiel ke ni havis kvazaù internacian kongreseton.

Por kompletigi la sukceson mankis nur la grupo Ronse; ni ne malesperas tamen ke ĉiuj samideanoj el la tuta regiono unu fojo en la jaro senescepte kunvenos en Kortrijk, kiu estas bone lokita kiel centra urbo por tiaj manifestacioj.

La centra punkto de la programo certe estis la Cseh-leciono de S-ro DeKegel el Aalst, kiu klarigis la meĥanikon de tia kurso, per kiu oni povas plensukcese gvidi amaslecionojn. Multe da literaturo oni jam legis pri tiuj kursoj, por kaj kontraù; la sukceso dependas de la profesoro kiu devas kunvivi sian lecionon; ne ĉiuj personoj taùgas por tia instrumetodo; se S-ro DeKegel sukcesis en pluraj lokoj estas ĉar li posedas la necesajn ecojn por perfekte "ludi" sian rolon.

S-ro DeKegel riproĉis ke tiom malmulte da Flandroj sin interasas pri la Cseh-metodo. Pri tio oni povus diskuti; tute ne estas la intereso kiu mankas, sed la mono; kiam mi gajnos la milionon de la loterio, mi trecerte iros al Arnhem por pristudi Cseh-metodon de Esperanto !

S-ro DeKegel malkovris al ni la interesan flankon de la metodo kaj la aùskultantoj aplaùde dankis lin por lia bonega demonstracio.

En Kortrijk fariĝis kutimo ke la jara festo konsistas precipe el dancado; nunjare estis aldonita loterion por kiu fervoraj gesamideanoj kolektis 50 valorajn prezojn. Kamarado Honoré Braekevelt, kiu nuntempe estas soltato, ĉeestis vestita per bela uniformo kun orumitaj butonoj, verŝajne pro tio la sorto favoris lin, ĉar li gajnis grandan kukopanon....

Amiko Curnelle el Lille, kiu kelksorte jam fariĝis indiĝeno de la loka grupo, gajnis la plej belan premion, por kiu ni esperas ke la doganoj ne prizorgas tro da enuo.

La delegacio el Dunkerque konsistis nur el unu persono: Maurice Dewaele, sed ni povas diri ke li sole reprezentis minimume duonan grupon, tion asertis al ni la fraùlinoj kiuj ĉiuj senescepte devis konferi: ankaù kun mi dancadis tiu ĝentila franco... kaj ĉiuj deziras revidi venontjare tiun ĉampionon de la danco !

La rakonto povus tiel kovri tutan gazeton, sed mi devas halti, ĝis 1936!

---

MERKREDO, 6-an de februaro, monata kunveno en la ejo "De Tuin" Yzerweglaan, je la 8-a vespere. Sur la tagordo: Estrarelekto
Raporto de la Kasisto.

Neniu povas manki ĉi-tiu foje. Estas ankaù bona okazo por varbi novajn membrojn inter la kursanoj. Helpu por trovi novajn adeptojn al nia movado !

---

Dimanĉe, 10-an de februaro, je la 3-a Posttagmeze, okazas la jara festo de la grupo Roeselare, en kafejo "Java", Roeselare. Kvankam pro la bonaj moroj (!) ne estas permesate danci en Roeselare, oni ĉiam estas certe ĝui agrablan kunestadon. Dum la merkreda kunsido ni decidos pri la vojaĝhoro. Pluraj gesamideanoj promesis kuniron.

---

Jaùdo, 14-an de februaro, okazas la lasta leciono de la vintra kurso organizita en la urbodomo. Komence de la 20-an de februaro, la grupo denove regule kunvenos en la kutima ejo, le ja 8-a vespere. Okazos perfektiga kurso je intenco de la personoj kiuj deziras iri al la ekzameno.

# NIA INFORMILO

Monata bulteno de la E. Grupo, Kortrijk
Fondita en 1929. – Jarabono : 12 fr.
Administracio : Moskroenstraat, 11, KORTRIJK

n° 57 – Marto 1935

Pr. H. B. R.


Dum la jarkunveno okazinta la 7-an de februaro, estis elektitaj kiel estraranoj por la jaro 1935 :
S-oj Debrouwere, Steelant, Vanfleteren, Bossuyt, Casier, Doornaert, Ant. Cognie, F-ino V. Lecossois, S-oj André Vandenberghe kaj Maelfait.

La 3 lastaj eniras la estraron por la unua fojo: ilia pasinteco montras ke ili estas senlacaj propagandistoj kaj la membroj esperas ke ili daŭre kaj vigle pioniros por progresadi la grupan vivon.

Antoine Cognie akceptis funkcii kiel sekretario-kasisto: kutime, la bona funkciado de asocio dependas grandskale de la sekretario kaj ni esperas ke la nova sekretario daŭrigos la bonan tradicion.

---

INFORMO de la SEKRETARIO al la GEMEMBROJ !

Ĝis nun ŝajne oni neniam serioze priatentis la statutojn koncerne la akcepton kaj eksiĝon de membroj de la grupo. - Venis la momento por enkonduki novan ordon en la laboro. Ĉi sube sekvas la listo de la gemembroj kiuj ĝis nun pli malpli regule pagis la kotizon. Kelkaj eble miros ke ili ne vidas sian nomon en ĝi. Ankaŭ mi miras ke kelkaj samideanoj kiuj tamen volas havi la reputacion esti tre fidelaj samideanoj, tiom longtempe forgesis ke estas normale ke por aparteni al asocio, necesas pagi kotizon. Mi ne pensas ke por unu franko -valoranta apenaŭ 7 antaŭmilitaj centimoj- oni kuraĝus sin deteni de idealista movado, pro la ne akceptebla kialo : estas krizo ! Aliflanke, mi konstatas ke tiuj kiuj forgesas pagi, estas ne la senlaboruloj, sed ĝuste tiuj kiuj ne povas plendi pri krizo. Al la membroj mi demandas, se en la listo vi ne trovas la nomon de amiko via, uzu vian personan influon por rekonduki la perditan ŝafon al la ŝafidejon. Per komuna helpo ni sukcesos revarbi almenaŭ 100 iamajn fidelulojn!

| | | |
|---|---|---|
| S-oj P. Mattelaer | M. Van Iseghem | R. Van Roye |
| G. Debrouwere | M. Dermaut | R. Van Wayenberg |
| S-ino Debrouwere | F-ino D.Vercruysse | A. Scheerlinck |
| S-oj Raoul Vanfleteren | G. Dewachter | N. Demmet |
| P. Casier | V. Lecossois | A. Windels |
| R. Bossuyt | D. Lecossois | O. Steelant |
| Cognie Albert | S.Wybaillie | |
| Cognie Antoine | M.Catteeuw | |
| J. Reynaert | M.Six | |
| B. Bassleer | S-ro M.Hoebeke | |
| K Debrouwere | A. Dewerchin | |
| André Vandenberghe | E. Demuynck | |
| A. Doornaert | M. Maelfait | |

Hierboven drukken wij de lijst af der leden die tot op heden in orde zijn met hunne bijdrage. Er zijn er nochtans een paar bij die noch niet gansch vereffend hebben; maar ik hoop toch dat dit in orde komt binnen enkele dagen. Ieder onderzoeke zijn geweten !

Por la estonteco: ĉiam kiam ni enskribas novan membron aŭ ke iu forlasas la grupon, tio aperos en la Informilo; mi tamen firme esperas ke la lasta punkto ne ampleksos grandan rubrikon !

La sekretario-kasisto,
Ant. Cognie.

---

+ Enkele dagen geleden hebben wij aan de leden ter kennis gebracht dat een feestmaal zou ingericht worden. Gezien de aangegeven datum niet vrij was in het lokaal, is dit moeten verzet worden tot Zaterdag 23 Maart a.s. Alle schikkingen desbetreffend, zullen getroffen worden tijdens de maandelijksche bijeenkomst van Woensdag 7 Maart, te 8 u. in het lokaal "De Tuin" De inschrijvingen worden opgenomen door den sekretaris. Den deelname-prijs bedraagt I5 frank. Een gemoedelijk avond is in het vooruitzicht. Iedereen zal willen deelnemen !

---

Ĉu vi jam aliĝis al la 6a Flandra Kongreso de Esperanto en Bruselo ? Ne prokrastu tro longe vian enskribon !

# NIA INFORMILO

Monata bulteno de la E. Grupo, Kortrijk

Fondita en 1929. – Jarabono : 12 fr.

Administracio : Moskroenstraat, 11, KORTRIJK

no 58

Aprilo

1935

Pr. H. B. R.


Merkredo 3?-3-1935 Woensdag

Ĝenerala Kunveno je la 8-a vespere in het lokaal "De Tuin"

Algemeene Vergadering te 8 uur 's avonds en la ejo de la Grupo "De Tuin"

---

Sabate 23-an de marto, okazis interamika bankedo en la grupejo, partoprenis 18 gesamideanoj, estis kunestado plej agrabla kaj ĝentila. Kiel puno por tiuj kiuj ne venis, ni diskrete silentos kaj ne raportos pri la okazintaĵoj. Nur unu rimarkon: la festo daŭris ĝis la 2a matene !

---

CITAS NI EL "HUNGARA HEROLDO" :

La homoj trinkas estante malsataj, por ĉesigi malsaton, ili trinkas estante sataj, por bone digesti, ili trinkas estante dormemaj, por ne fali en dormon kaj ili trinkas, se ili ne povas ekdormi, por ke la palpebroj fermiĝu. Ili trinkas sentante malvarmon, por varmigi la korpon kaj ili trinkas sentante varmon, por malvarmiĝi. Ili trinkas estante sanaj, por eviti malsanon kaj trinkas estante malsanaj por farigi sanaj. Ili trinkas, se oni baptas kaj trinkas, se oni enterigas, ili trinkas, se ĝojas, kaj trinkas, se malĝojas. Ili trinkadas per ĉiuj kapabloj.

---

G. Gardonyi, hungara verkisto, mortinta antaŭ kelkaj jaroj, skribis la jenajn notojn de 19 Aŭgusto 1915 :

Militdragono flugas super urbon (Londono) kaj defaligas bombon.
-Sukcesis! - oni diras supre kun ĝojo.
La bombo mortigis maljunulon kaj infanon
-Sukcesis!
Malamikaro ĉirkaŭfermas urbon (Kovno), mortintoj kaj vunditoj faladas milope
Triumfa kriego, mortanta ĝemveo
Sukcesis !
"Te Deum" aŭdiĝas de la venkintoj. "Miserere" de la venkitoj.
La kapitalistoj ridetante rigardas la borsan rubrikon: Sukcesis!

---

El la poemo N e n i o - I o de R. Schwartz :

Patriot-iste la publikon
Inciti kontraŭ malamikon,
Estas nenio,
Sed sincere kun konsci'
Mortfali sur la frontlini',
Jen estas io !

La krizon solvi sur papero
Per silogismo aŭ cifero,
Estas nenio,
Sed malaltigi, laŭ tarif' ,la prezon ankaŭ de l'rosbif',
Jen estas io !

Promesi, kiel kandidato,
Ke ordo regos en la ŝtato,
Estas nenio,
Sed en la parlamenta dom'
Restadi mem honesta hom',
Jen estas io !

(Franca Esperantisto. Jan. 1935.

# NIA INFORMILO

Monata bulteno de la E. Grupo, Kortrijk

Fondita en 1929. – Jarabono : 12 fr.

Administracio : Moskroenstraat, 11, KORTRIJK

n° 61

Julio 1935-

Pr. H. B. R.


M e r k r e d o

3-an de Julio

ĜENERALA MONATA KUNVENO en de TUIN

---

Dum la ordinaraj kunvenoj de la pasintaj semajnoj, la ĉeestantaj membroj pridiskutis la rimedojn por revarbi la multajn samideanojn kiuj forrestas el la grupkunvenoj.

Provo estos farata per sendo de kartoj al la iamaj fideluloj. Jam tre ofte ni traktis pri la kaŭzoj kial ni ne sukcesas konservi la membrojn. La restantaj membroj de la grupo decidis paroli nur Esperanton dum la kunvenoj. Ni esperu ke oni ne tro rapide forgesos la decidon....

---

Antaŭ 3 semajnoj kelkaj grupanoj vizitis la grupon de Roeselare, por tie konstati kiel oni laboras por fari instruaj la grupaj kunvenoj. Malfeliĉe, aŭ pli bone tamen feliĉe, ne okazis ordinara kunveno, ĉar tiun vesperon la grupo Roeselare ricevis la viziton de S-ano Moy Thomas el Londono, kiu zorgis por muzikprogramo, anstataŭ por lernprogramo; oni tuj forgesis la studan celon de la vojaĝo por plengorĝe kanti ĉiujn ariojn el la esperanta repertuaro.

La Kortrejkanoj plej multe enviis la Ruselaranoj ĉar ili disponas pri tiom bonega pianistino. Komprenleble, en la Kortrejka grupejo troviĝas aŭtomata piano, sed malfeliĉe ĝi ne kapablas ludi verdajn ariojn. Absolute necesas ke ĉiu rigardu en sia ĉirkaŭaĵo, se li ne havas konatulinon kiu povas bone ludi. Dum kelka tempo S-ano Doornaert plenumis la rolon de pianistino, sed nun li ankaŭ troviĝas sur la nigra listo, ĉar ekde pluraj monatoj li ne plu metis la piedojn en la grupejo. Allo, Antonio! pripensu la gajajn vesperojn kaj la koncerto por Radio-Lille de antaŭ 3 jaroj kaj revenu. Psstt ! Psstt ! Antonio ! Psstt ! Psstt ! Antonio ! revenu al la grupvesperoj !

---

- KORESPONDA ANGULO -

Ĉi tie ni malfermas novas rubrikon. Ĉiu membro kiu regule pagas sian kotizon, povas skribi mallongan letereton aŭ alvokon al alia grupano. Ĉi sube ni represas la unuan serion da leteroj. Komprenleble la leteroj ne povas enhavi ion kio povus vundi la adresitojn.

-Al F-ino M.L.: Ĉu io balbone okazis al vi ? Pluraj grupanoj subskribis karton al vi, sed ne ricevis respondon. Ĉu vi eble estas malsana ? ni ne povas kredi tion, ĉar la prezidanto diras ke ĉiuvespere vi ŝvingas per la naztuko kiam vi pasis sidante en la bela vagonaro. Ĉu eble vi ne jam ripozis de la lacigaj promenadoj okaze de la Brusela kongreso? Vi ĉiam estis fidela membrino kaj ne ekzistas kialo por resti hejmen. Do, ni atendas vin venontan merkredon. Dada !

-Al S-ino B ,kasisto de F.L.E.: Tre multe da abonantoj al Flandra Esperantisto deziras repagi sian abonon. Do necesas urĝe ke vi venu al la grupkunvenon de merkredo.

-Al F-ino S.D. kaj A.D.: Vi pretendis ke vi ne havis tempon por veni al la kunveno pro tro granda laboro; antaŭ du semajnoj iu flustris ke dum la grupkunveno vi ambaŭ sidis je kafejo sur la Granda Placo, post grandaj demiojda biero.. . Ĉu vi nun fariĝis drinkemuloj? Oh! Oh! Do, rapidu por veni denove al la kunveno aŭ ni rakontos al viaj gepatroj !

-Markus la Bakisto denove loĝas en Kortrijk. Li jam venis unu fojo al la grupkunveno; de la tempo kiam li forlasis la urbon, li faris multe da progreso kaj fariĝis perfekta Esperantisto. Honoro al Markus !

# NIA INFORMILO

Monata bulteno

Fondita en 1929. - Jarabono : 18 fr.

Administracio : Moeskroenstraat - 11 - KORTRIJK

N° 88
Aùgusto
1937


La hodiaùa numero de "Nia Informilo" estas speciala dediĉita al la komerca foiro de Kortrijk, kie la loka grupo disponos pri stando.

La foiro malfermiĝos Dimanĉe, 8-an de aùgusto kaj ĝi daùros ĝis la 15-an de aùgusto. Estas la plej grava komerca manifestacio el la tuta regiono. Kortrijk estas grava centro, ĉirkaùita de aro da popoldensaj komunumoj, kies suma loĝantaro atingas proksimume 375.000 personoj. Multe vizitantoj vizitos la foiron kaj la propaganda valoro de la stando estos tre granda, despli ĉar ĝi lokiĝos kun fasado sur la granda korto.

Ni invitas ĉiujn geesperantistojn el la regiono por ĉeesti la inaùguron de nia stando, Dimanĉe, 8-an de aùgusto, je la 3-a posttagmeze, en la ejoj de la kolegio Sankta Amando. Sammomente okazos la oficiala inaùguro de la foiro kaj ĉeestos la aùtoritatuloj; ne nur la stando devas fari bonan impreson sed ankaù kaj speciale la granda nombro da esperantistoj. Ankaù ĉeestos la estraro de Flandra Ligo Esperantisto. Ĝis la lasta esperantisto el la regiono devas sin trovi en Kortrijk, la 8-an de Aùgusto !!!!!!!!!!!

La esperantistoj kunvenos en la ejo de la grupo "De Tuin", IJzerweglaan 5. Ni zorgos por ke elpendu la verstelan flagon. De la 2-a ĝis la 3-a posttagmeze okazos interfratiĝa horo en la ejò; je la 3-a precize ni foriros al la foiro, por ĝin atingi je la 3,15 h.

Rememoru la daton, la horon kaj la kunvenlokon !

2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+2+

En'la lasta tempo fondiĝis diversaj novaj grupoj en la regiono. Ĉar ni jam kelkfoje ricevis demandojn por koni la adresojn, ni publikigas ilin ĉi sube :

| | | |
|---|---|---|
| Vichte | "La Frateco", Harelbekestraat 29-a | |
| Wervik | "Fratiĝo" | Zuidlaan 18 |
| Anzegem | "La Juna Espero" | Statiestraat 38 |
| Deinze | "Deinza Esperanto Klubo" Dorp 54, Astene | |
| Evegem | "Paco per Esperanto" | S-rò G. Libbrecht |
| Wevelgem | "Per Esperanto al Mondpaco", L.Claus, Hoogweg | |
| Meenen | Kamiel Depypere, Kortrijkstraat 160 (en ĉi tiu loko okazis kurso, sed ni ne scias se grupo estis fondita) ni esperas ke tio okazos venontan vintron.) | |

---

MERKREDO, 4 Aùgusto, okazos ĝenerala kunveno de la grupo Kortrijk, en la ejo "De Tuin", je la 7 1/2 vespere. Ni trafos tie la lastajn aranĝojn por la komerca foiro ; ni esperas je la ĉeesto de ĉiuj membroj.

La pasinta ĝenerala kunveno elektis redakcian komitaton por "Nia informilo"; la gvidantoj estas F-ino DeCaluwe kaj S-ro M. Malfait. Tiu komitato estis fondita por malŝarĝi la prezidanton pri la redakcia laboro; multo estis promesita sed ŝajnas ke la promesoj estis forgesataj ĉar la "redakcia komitato" ne donis unu linion da teksto nek ankaù klarigis kial ĝi nenion faris... La nuna redaktanto esperas ke la novaj funkciuloj post ĉi tiu publika admono revekiĝos el la letargio.

---

Esperantista Grupo VICHTE.- Sub influo de la varma (?) somera vetero, la grupa vivo iris "pianisimo". Gerardo Bekaert zorgis por "parolanta gazeto" dum la unua kunveno kaj rakontis interesaĵojn pri la vetero, Presten's Beke, Rubbens, Ingooigem, k.t.p.

Pli malagrable estis la sekvinta diskuto pri la prezidanteco; kvankam devus esti simpla afero, ĝi fariĝis komplikaĵo kaj endanĝerigis la intereson de la kunveno. La Viĥtanoj ŝajne ne ŝatas la prezidantan funkcion kaj eble preferas iun specon da libera respubliko kun "sovjet" estraro ? Strangaj vilaĝanoj....!

Dimanĉe 8-an de aùgusto, la grupo vizitos la ekspozicion en Kortrijk. Foriro je la 1-a posttagmeze en la knablernejo, Stacistrato.
La 10-an de aùgusto, je la 7 1/2, kunveno en la lernejo. La samideanoj el Deerlijk partoprenos la ekskurson al Kortrijk kaj la kunvenon en Vichte.
La gazeto "De Vrede" el Waregem malfermis E-rubrikon; ĉiuj do legu tiun gazeton !

---

BERICHT aan de afdeelingen uit het gewest Kortrijk.
Ieder maand wordt door de Kortrijksche afdeeling een bladje rondgestuurd met oproepingen tot vergaderingen en andere mededeelingen. De groepen welke begeeren hunne nieuwstijdingen hierin opgenomen te zien, mogen deze sturen aan Mr A. Cognie, Moeskroenstraat 1, tegen eéne week vóór den eersten woensdag der volgende maand. Wij zijn bereid dit bladje te sturen aan al de leden der afdeelingen welke zulks aanvragen, mits terugbetaling der onkosten. Vichte heeft reeds zijne toetreding hiervoor gegeven. Op deeze wijze zullen wij

NIA INFORMILO

Monata bulteno de la E. Grupo Kortrijk

Fondita en 1929. – Jarabono: 12 fr.

[illegible]

n° [illegible] Decembro [illegible]

[illegible]

... [illegible] in het lokaal [illegible]

[illegible]

[illegible]